



LA VERDA PRALINGVO



**aldono al
Fundamenta Esperanto**

**fare de
Manuel Halvelik**

v. 2

Definitiva Eldono 2006



Tiu-ĉi libro estas destinita al jam tute spertaj uzantoj de nia Internacia Lingvo, kiuj povas eventuale profiti el ĝi.

Komencantoj male detenu sin de legado, je risko konfuzi esencon kaj akcesoraĵon.

DIFINOJ NECESAJ AL ĜUSTA KOMPRENO

- dialekto** - Loka aŭ regiona devio de lingvo.
Popido: *Zi balait lo kamen*
- efemerismo** - Vorto aŭ esprimo kiu ĝuas popularecon dum nur relative kurta periodo; ekzemple la iama termino “*provo*” por “*provokanto*”.
- eŭfemismo** - Nepreciza dirmaniero por mildigi la krudecon de iu vorto; ekzemple: “*ellasi venton*” anstataŭ “*furzi*”.
- homonimo** - Vorto kiu estas same skribata kiel alia, en donita lingvo, sed havas malsaman signifon; ekzemple “*informoj*” kaj “*in |formoj*”.
- jargono** - Fakulaj terminoj kaj esprimoj.
Ekzemploj: “*poto*” = *potencometro*
“*suko*” = *elektrokurento*
- klikismo** - Vorto aŭ esprimo uzata nur interne de iu partieto; ekzemple “*la sultano*” por direktisto de entrepreno.
- koineo** - Norma, oficiala lingvo.
Fundamente: *Ili balais la kamenon (laŭvorte)*
- ksenismo** - Vorto prunteprenita el alia lingvo, foje pro malesto de koncerna propralingva egalajo, foje pro manko je ĝi; ekzemple “*truco*” en loko de “*artifiko*”.
- sinonimo** - Vorto kiu havas plimalpli la saman signifon kiel alia en donita lingvo; ekzemple “*arida*” kaj “*mal-fekunda*”.
- slango** - Vortoj kaj esprimoj kun sekreta etoso. Ankaŭ “*disfemismo*”.
Gavaro: *Ili balais la kamenon = Ili sekskuniĝis.*
- triviala** - Vulgare en la plej fia aŭ aĉa senco; vulgarega; ekzemple: “*fiki, kakajo*” anstataŭ “*koiti, fekaĵo*”.

INDEKSO

1. Enkonduko

1.1	Kio estas slango	007
1.2	Kiel ĝi estiĝas ?	012
1.3	Sociaj kaj individuaj faktoroj	015
1.4	Historia skizo pri ĝia evoluo	018
1.5	Ĉu slango ankaŭ en Esperanto ?	026
1.6	Anatemo	029

2. Metodo

2.1	Vortfarado (radikoj, afiksoj, ĝeneralajoj)	031
2.2	Lingvoteknikaj rimedoj	032
2.3	Kiel ne verki slangon	037
2.4	Gramatiko kaj Sintakso	040
2.5	Principo de Simileco	050
2.6	Principo de Simpleco	053
2.7	Kritikoj	054

3. Teknikaj Terminoj (Ĵargono)

3.1	Antaŭparolo	057
3.2	Mallongigoj	059
3.3	Akronimoj kaj Ĥimeronimoj	062

4. Krestomatia

4.1	Antaŭparolo	075
4.2	M.J. Brusse – Amo de Piĉulino	077
4.3	Ida Van Swieten – Cerbumado de Gorilo	084
4.4	Édouard Bourdet – Ebria Konfeso	087
4.5	M. Halvelik – El la Agendo de Murdisto	096
4.6	Henri Vatré – La Ezoko	100
4.7	G.B. Shaw – Fuŝita Eksperimento	104
4.8	Goat Laven – Ladokolportistoj	110
4.9	Karel Groen – La Sovaĝa Okcidento	114
4.10	François Villon – Enigma Epitafo	119
4.11	Blaise Cendrars – Kiel festeni sen mono	121
4.12	R.L. Stevenson – Pri tio kion mi aŭdis	128
4.13	Eugène Sue – La Lukto	134

4.14	Louis Forton – La Milionula Adoptofilo	139
4.15	Jan de Hartog – Militpaŭzo kun la Medio	145
4.16	Auguste le Breton – Fatala Pokerludo	149
4.17	Ed McBain – Pridemandado	154
4.18	E.F. Vidocq – Ruzo de Policestro	161
4.19	D.S. de Queiroz – La Slango de la Malbenitoj	170
4.20	Marc Stéphane – Vagabonda Venĝo	172
4.21	Hans-Henning Claer – La Tranĉilheroo	177
4.22	Emile Zola – Vomkapeco	182
4.23	Jevgenij Gerzon – Ŝuzoj el Brokantejo	185
4.24	Howard Hawks – Ŝajnkrimulino	189
4.25	Howard Hawks - Kviz-demandoj	194
4.26	René de Obaldia - Eduardo kaj Agripina	204
4.27	Fóti Andor – Ĉantaĝo	214

5. Bibliografio 221

6. Vortaroj

6.1	Esperanto → Gavaro	223
6.2	Gavaro → Esperanto	269

Marjorie Boulton – Tri Versioj de Esperanto
 Aleksandr Soljenicin – Perfida Amiko

Juan de Zunzunegui – Spadosvingantoj

(Anonima) – Kiel Lazarillo edukigis

Molière – La turka ceremonio

M. de Cervantes – Anguloĉjo kaj Tajloreto

N.V. Lozgaĉof – Premisoj de Esperanta Slango ...

Efraim Kishon – Entrepreno Babel

1. Enkonduko

1.1 Kio estas slango ?

Dirante “lasu min trankvila” al sintruda persono, vi estus eble malĝentila, sed certe ne maldeca. Dirante al li “frandu el mia kakajuto” vi estus kaj malĝentila kaj maldeca. Vi parolus slange; ŝoke kaj senĝene. Sed ja ... efike.

Memkompreneble, tiaspeca kruda lingvaĵo estas kutime pli parolata kaj aŭdata ol ĝi estas skribata kaj legata, escepte en kloakaj kulturperiodaĵoj kia nia *Kancerkliniko*. Tamen, ne malhelpas ke ĝi estas populara, ke ĝi vivas, ke ĝi floras, ombroflanke de la severe ĝusta koineo, en kvazaŭ ĉiuj naturlingvoj de la mondo, kaj ke en almenaŭ du inter ili ĝi naskis eĉ specialan sublitteraturon: la slangolitteraturon.

Estas filologoj kaj lingvistoj — tiaj de la severa normojn diktanta skolo — kiuj, el la altaj nuboj de sia erudicio, okulumas kun minaca fruntosulkigo al tiu fi-kondata stratobubo, ĵetas al ĝi pereigajn akademiajn fulmojn aŭ preferas malestimege ignori ĝian ne permesatan ekziston.

Estas kleruloj en ilia sekvantaro, kiuj simple ne komprenas ĝian karakteron kaj vidas en ĝi nur sapeilon, subfosilon de la “bona”, de la “norma” lingvo. Kiel iam skribis al mi samideana instruisto, rilate aplikon de dialekteca slango en popularega porinfana bildoserio flandra: “Povas esti ke la humoraĵoj de (tiu aŭtoro) plaĉas al multaj, eĉ al plenkreskuloj. Aliflanke, mi opinias, ke ankaŭ multaj taksas ilin malaltnivelaj. Bedaŭrinde, mi troviĝas inter tiuj-ĉi lastaj. En la lernejo ni luktas por la koineo, sed en tiaj historietoj oni instruas ion alian.”

Sed estas feliĉe ankaŭ nacilingvaj fakuloj (de la moderna observada kaj registrada skolo), ĉe kiuj tia politiko nomiĝas nur strutopolitiko. Kiuj anstataŭe degnas kaj kuraĝas aliri slangon por serioze ekzameni ĝin. Kun tre tipa rezulto ke ili preskaŭ unuanime kantas ĝiajn laŭdojn. Jen kelkaj el tiuj lirikaĵoj opinioj:

A.F. POTT – “Estas ne al mallertaj cerboj, ke ĝi dankas sian ekziston, tiu-ĉi monumento de (...) brila inventemo kaj fekunda imagopovo, plena je plej malrespektaj saltoj kaj vivoplenaj bildoj; en ĝi kutime partoprenas ŝerco — eĉ se konfesende de imperti-

nentega kaj timiga speco — kiu, malgraŭ la fakto ke ĝi ofte troodoras laŭ la fiaj profesioj de ĝiaj kreantoj kaj pludonantoj, tamen surprizas kaj fascinas pro trafa ĝusteco de siaj fulme en lumon starigitaj observoj.”

Enno ENDT – “Kiam parolanto de koineo — de tiu abstrakta kaj relative stabila lingvo de racieco — ekkonas la popolan lingvaĵon, li estas komence konsternita pro ĉi-ties abundo je metaforoj, pro la floregado de sinonimoj. Li ekkonscias ke (kaj kiel) lingvo, ne ĝenata de tradicia regularo en sia evoluo, ne fiksata de instruado, de skriba bildo en la presado, kapablas vivi kaj ŝanĝiĝi, povas moviĝi en ĉiutaga uzado; ke (kaj kiel) sentemo povas ludi gravan rolon en interkompreniĝo, multe pli gravan ol en lia klera lingvo.”

[Samcite] : “La popola lingvo konkretigas; ĝi estas la lingvo de realo kiel komuna saĝo ĝin perceptas, ĝi restas intime ligita al la objektiva mondo de la aferoj. Tial la popola lingvo estas ankaŭ pli viva kaj senpera (ol koineo). Kiam elegante vestita sinjoro rakontas ke li laboregis la tutan tagon, tiam la aŭskultanto ion ekscias enpense. Sed li ion emocie eksentas kiam popolano diras ke li la tutan tagon “**pavianis**” aŭ “**azenis**” aŭ “**eltordis al si la brakojn**” . Jen plu ne paliĝintaj dekoktaĵoj, senkolorigitaj de la racio, distilitaj de la moralo; jen plu ne koineaj mumioj entombigitaj en la oficialaj vortaroj. Eskapi al nekonvencieco estas kvazaŭ transiro de la prema kaj sufoka atmosfero de civilizita vivo enĉambra al la freŝiga vivo en libera naturo.”

Johann ERNST – “Laŭ racia rezono la ĝenerala devigo al lingvo-instruado en elementa, mezgrada kaj altaŝtupa lernejoj, estus jam delonge devinta doni finan mortobaton al populara slango, por sendiskute venkigi la lingvaĵon de la lernolibroj. Sed ne: la triviala popollingvaĵo senĝene kaj senbride floradas kia libernatura floro, kiun ne tuŝas la impona nobeleco de ĝia moŝt-kultura parenco en la aŭtoritata kultivejo. Oni malkovras ĝin kiel fortiksanan, klaŭnecan estaĵon, kiu ĝuas la vivon kaj primokas la oficialan klerigon. Se tiel estas, ke ankaŭ ĝi spertas velkoprocezon, ĝi tamen tute trankvile povas al si permesi tiun lukson, ĉar el ĝiaj profundaj radikoj daŭre sprosas ĉarme novaj petaloj. // Se dialektoj perdas batalojn en la granda, senĉesa milito kun koineoj — ne lastvice pro la intensa kaj organizita nunepoka interŝanĝado de informoj, de varoj kaj homoj — tiukaze estas la populara slango kiu transprenas kaj plu portas la torĉon de vereco, natureco, freŝeco. Spite la severajn diktaĵojn de instancoj kaj de akademioj. // Plej bona pruvo pri tio estas la konsterniĝo de fremdulo, vizitanta la

landon kaj popolon de sia elekto, kun sia koncerna lerneja lingvodiplomo sub la brako, kiam li malkovras ke la ordinaraĵoj homoj tie ŝajnas konversadi per nura karikaturo de sia propra lingvo. Jen la distanco, la socia abismo, kiu disigas kaj probable ĉiam disigos la adaptiĝeman popularan esprimilon disde la konservema intelektulara esprimo; aŭ se oni preferas: kiu disigas parolatan lingvon disde skribata lingvo. // La konversacia lingvo havas la vivon antaŭ si, la alia nur la muzeon. En lernejoj oni instruas la lingvon de la gepatroj kaj en lernejaj lernolibroj tiun de la geavoj, dum sur la strato parolatas la lingvo de morgaŭ. Ĉar tio kio hodiaŭ estas <malĝusta, maldeca, triviala>, tio morgaŭ fariĝos konvena kaj taŭga, se nur sufiĉe da homoj ĝin uzados dum sufiĉe longa tempo. Per tio mi neniel volas argumenti kontraŭ la ekziston aŭ neceson de aŭtoritataj strukturoj, kia estas ankaŭ la oficiala koineo, sed jes kontraŭ ties mankon je vivanta aktualeco.”

Anonime – “Se poeto aŭ oratoro drapiras la lingvon ĉirkaŭ si, kiel belegan imperiestran mantelon, tiukaze ordinara civitano pavas per bunta slangopijamo.”

* * * * *

Ĉiel ajn, inter la abomeno de unuj kaj admiro de aliaj, elstaras la nuda fakto, ke slango ekzistas kaj vivegas en naturlingvoj. Pro tiu nerefutebla fakto sola ĝi meritas esti konsiderata, se ne pro ĝiaj tre interesaj specifaj kvalitoj. Sed, inter abstrakta diro kaj konkreta faro estas maro. La nocio “slango” ja montriĝas ege kompleksa en praktika analizo. Tio manifestas sin jam en la **nomoj** mem kiujn naciaj lingvoj donas al ĝi [laŭ O.B. FAHLKE]:

afĥane	abdolti	islende	slangur, hrognamål
angle	cant, slang	itale	furbesco, gergo
arabe	asstalaah, qurf	japane	fuĉoo, ingo
armene	goĝalezu	ĵide	ĉesen loŝen
bulgare	tarikata	koree	iinò, sang-mal
ĉeĥe	hantýrka	latine	furum sermo
ĉine	heei-hua, kiee-kòú	malaje	télor
dane	rotvælsk, slang	norvege	fantesprog, sjargong
dice	bargoens, dieventaal	perse	zabaan-e zargari
estone	argoo, žargoon	pole	žargon
france	argot, langue verte	portugale	calão, giria
germane	Gaunersprache, Rotwelsch	rumene	argou, cracă uscată

greke	korakjiistika
hebree	aagaah
helene	logos tapeinos
hispane	germania, jerga
hindie	katthbolii
hungare	szleng, tolvajnyelv

ruse	ĵargon, suĥaja vjétv
suome	katukieli
sŭahile	msemo wa kinyume
svede	rotvålska, slang
taŝkente	arapaĉa
turke	hèrsèz dili

La radikoj *slang*, *argo*, *ĵargon* retroviĝas ofte en tiu bunteco, sed kun malsamaj nuancoj. Aldone, oni ne kredu ke slango estas ekskluzivaĵo de nia propra tempo. Male, kiel atestas Latino kaj la helena, ĝi havas malantaŭ si jam respektindan historion. Eĉ la nomoj en supra listo ŝanĝiĝis laŭ formo kaj laŭ enhavo tra la tempoj. Do, kiel povas konstati la leganto: unueco aŭ eĉ nur firma komuna bazo estas apenaŭ trovebla, ĝis eĉ en la nomoj mem.

Pro tio, koncerne al **difinoj** : Kiam oni konsultas malsamajn vortarojn, oni renkontas ankaŭ tiom da malsamaj klarigoj, sub referencovortoj rilate al slango. Plejofte tiuj emfazas “konvenciecon” kaj “sekretecon” sed, kiel mi pli poste klopodos demonstri, slango miaopinie estas nur enparte konvencia, kaj sekreteco estas nur unu inter aliaj ĝiaj aspektoj.

Vide al tiu diverseco kaj malakordo, kaj por ke ne okazu miskompreno pri miaj personaj eksponoj en postaj ĉapitroj, oni cedu al mi la lukson sendepende (re)formuli la difinojn “triviala” kaj “slango” en PIV jene — cetere sen garantio je nepra ĝusteco:

triviala = vulgara en la plej fia aŭ aĉa senco; vulgarega;

slango = pli malpli triviala lingvaĵo, konsistanta el kriplitaj kaj fremd-originaj vortoj, el kaŝaj metaforoj kaj stilfiguroj, uzata ĉefe sed ne ekskluzive de malsuperaj sociaj klasoj (precipe sed ne ekskluzive de krimuloj), kiun lingvaĵon plejparte ne komprenas kaj malofte uzas la superaj koineon parolantaj klasoj, escepte ene de iu specifa fako.

Ni nun provu iom situigi la fenomenon en ĝia lingvistika kadro. Mi jam atentigis pri tio ke “slango” estas nur ĝeneraliga nocio, universala flago, sub kiu velas multe da ŝipoj, ĉar en realo oni renkontas plurajn formojn, plurajn slangojn: tiun de la armeo, de la universitato, de la teatro, de la maristoj, de la muzikistoj, de la sportistoj, kaj tiel pli kaj tiel plu. Ĉiu medio havas sian propran tipan ĵargonon el kiu daŭre eskapas terminoj kaj esprimoj al la

ekstera mondo; plej ofte iom aliigante sian signifon kaj tiel iĝante komuna slango.

Notindas ja ke ĵargona vorto ne estas tiel ekskluziva kaj deviga kiel scienca aŭ teknika termino. Ĉarpentisto ne rajtas nomi sian martelon “segilo”, ĉar tio kondukus al agacaj miskomprenoj. Sed li povas sendanĝere nomi ĝin “bateŝo” aŭ “frapkapo” aŭ io simila.

Duavice ni malkovras gradiĝojn en la nocio “slango”. La trivialeco kaj/aŭ malnormeco dependas de la mezuro en kiu ĝi estas ŝoka, maldeca, fremda, ĵargona, kotopo laŭ kiuj multaj kriterioj oni malkovras tutan gamon, kvazaŭ stratigrafian tavoloĝon, irantan de slangajetoj, propraj al la plej superaj sociaj medioj, ĝis tiu de la plej malsuperaj, de plej “pura” lingvo al plej “trufita”. Slango povas esti naiva aŭ ellaborita, kruda aŭ kulturita, triviala aŭ vigle spita, sengusta aŭ sukoplenta, same kiel ĝia koineo; ĉio-ĉi depende de kunteksto kaj grado de familiareco. Malbona slango naskiĝas el spirita malvigleco; ĝi endormigas la imagopovon. Bona slango provizas novan vivopuŝon al malnovaj aŭ abstraktaj ideoj. *Encyclopaedia Britannica*, sub la plumo de Eric PARTRIDGE, distingas de supre malsupren ne malpli ol **naŭ** tavolojn en sia lingvoskalo: *standard, informal or colloquial, slang, cant, jargon, argot, dialect, non standard, taboo or vulgar*. En praktiko tiu disdivido laŭ sociolingvistikaj niveloj estas kompreneble delikata tasko.

Slango do estas “slanga” en pli aŭ malpli forta mezuro, laŭ la kvanto da deviaj vortoj kaj esprimoj kiujn ĝi ampleksas, laŭ la tekniko de ilia enformigado, kaj laŭ la kunteksto en kiu ili estas aplikataj. Ju pli da deviaj elementoj, des pli slanga la lingvaĵo estas. Ĉiu vorto kaj esprimo ja posedas sian propran pasintecon, sian propran kuntekston. Vivanta lingvo, kiel ni jam notis, estas evoluema komunikilo. Neniam ĝi estas aŭ restas en absoluta signifo ekskluziva propraĵo de tiu aŭ alia socia grupo, nete distranĉita de aliaj grupoj. Pro sia naturo mem, lingvotrezoro en pli aŭ malpli alta grado estas disdonata, kundividata. La limo inter tiuj kiuj pli intense partoprenas en donita tavolo, kaj tiuj kiuj partoprenas malpli intense, estas maloftege strekebla per neta kontrasto.

Krom tio notindas ke — ĉar slango kaj dialekto ambaŭ estas naturaj lingvotrajtoj de dubasociaj homgrupoj — ili du ofte interpenetriĝas; alidire ke slango kutimas aperi en dialekt(ec)a robo. [Vd “Vagabonda Venĝo” 4.20]. Oni tamen ne iru ĝis la ekstremo

identigi ilin ĉar, kiom ajn organizita slango estu kelkafoje — kun propra fonologio, propra sintakso, propra morfologio — kaj kiom ajn en akompano de dialekto, ĝi neniam konsistigas memstaran lingvon disde la koineo. Aliturne: slango kapablas ekzisti kaj vivi nur en la kadro de kaj sur la fundamento de la norma lingvo; sen tiu ĝi tuje malaperus. Tio ne validas por dialektoj.

1.2 Kiel ĝi estiĝas ?

Plej ofte uzata “teknika” rimedo por krei slangon estas anstataŭigo de malagrabla vorto per alia pli plaĉa (eufemismo), aŭ malpli forta (disfemismo). Diris John BROPHY rilate al la Unua Mondo-milito: “Iom el la teruro malaperis kune kun la falsa gloro de la milito, kiam la soldatoj decidis nomi sian ŝtorkaskon “**ladoĉapelo**”, sian bajoneton “**dentopikilo**”, sian tranĉeatan fosilon “**porkosovilo**”, kaj murdegan bombadon “**ataketo**”. Tiun teknikon oni trovas en esprimoj kiaj: “**pedbati la sitelon**” (laŭ angla *to kick the bucket*) = morti; “**lia cerbo estas najlita**” (laŭ germana *sein Gehirn ist vernagelt*) = li estas stulta; “**estos via festotago**” (laŭ franca *ce sera ta fête*) = malfeliĉon al vi; “**porti ĝardenon sur la ventro**” (laŭ nederlanda *een tuin op zijn buik hebben*) = esti entombigita.

Tiajn-ĉi vortojn aŭ vortludojn oni nomas ankaŭ “efemerismoj”, tial ke ili same facile forgesatas kiel ili kreas. Slangaĵoj ĝeneral-regule estas ja aferoj de estanteco kaj por la estanteco, modaĵoj, kvankam oni renkontas ilin en kvazaŭ ĉiuj historiaj epokoj kaj en ĉiuj organizitaj lingvoj. Pro tio regas ioma polemiko inter fakuloj ĉu slango evoluas rapide aŭ ne rapide. Oni povas ja liveri materialon kiel pruvon por kaj kontraŭ. Ni traktu kelkajn el tiuj argumentoj.

1- Slangaĵo de unu generacio ne malofte iĝas tute ĝuste koineajo (foje eĉ beletraĵo!) de la sekvanta, pro la senĉesa ripetado, inverse kiel deca vorto povas estiĝi maldeca post forpaso de jaroj. Ekzemplo: la nuna dica *aarzelen* (heziti) origine signifis “anusumi” (iri malantaŭen, malkuraĝiĝi) dum *tronie* (vizaĝaĉo) signifis tut-simple nur “vizaĝo” en la tempo de VONDEL (17-a jarcento).

2 - Kiam iu metio malaperas — ofta fenomeno en nia daŭre pli teknologia mondo — tiam ĝia specifa nomenklaturado, kaj ĝia jargono kune, sporade persistas en la ĝenerala lingvo en la kadro de metaforaj esprimoj, pri kies fakta kaj konkreta signifo origina nunaj uzantoj plu ne konscias. Grupo kaj ilaro ja kune perdis sian signifon por la popolo. Ekzemplo: *to rig prices* en la angla

signifas “kaŝmanipuli la merkaton” sed la verbo mem (“rigi” en Esperanto) fakte devenas de la velsĉpa terminaro.

3 - Kutimoj kaj moroj ŝanĝiĝas. Kiam higieno estiĝis pli efika kaj ĝeneraligita en Okcidentujo, skabio kaj similaj haŭtmalsanoj tie estingiĝis. La multenombraj iamaj sinonimoj por tiuj malsanoj ĉe la malpuraj mizeruloj do ankaŭ forgesiĝis. Aŭ la malsanoj perdis sian iaman enigmecon kaj fatalecon pro la progresoj de medicino, kiu diskonigis kaj altrudis sciencajn nomojn anstataŭ la popularajn. Ekzemple: francaj *fièvre lente*, *écrouelles*, *miserere* iĝis respektive *tuberculose*, *adénite*, *obstruction intestinale*.

4 - Nocioj kiuj persistas tra la tempo pro sia baza natureco (korpopartoj, iuj sociaj strukturoj, loĝadaj aspektoj ks.) pli facile konservas ankaŭ sian originan slangonomon. Ili ŝanĝas iam-tiam sole la “eksteran formon”, do sian eventualan ortografion, same kiel faras la kutimaj vortoj. Tiele en la franca: *corner* (feteri) notita jam en 1558, *gaffre* (gardisto) el 1455, *quilles* (gamboj) el 1450, kiujn mi prezentas en Gavaro respektive per “**stinki**, **strajisto**, **ĵernoj**”. Similajoj ekzistas en aliaj lingvoj.

5 - Tiel — laŭ la eminenta filologo PARTRIDGE — la tute moderna angla (ĉefe usona) slangovorto *phoney* (falsa) estis uzata jam en 1890 kaj ĝia plej originala ortografio *fawny* datumas eĉ de 1770 ! Estas tiu sama fenomeno kiu fakte, kaj rilate al kutimaj vortoj koineaj, helpis al filologoj malkovri kaj skeme rekonstrui la tn. “hindeŭropan patrinlingvon”.

6 - Italismoj enpenetris la francan slangon de la 18-a jarcento sub influo de komediistoj, ludantaj laŭ la improviza stilo de la ital-devena *Commedia del' Arte*, same kiel oni povas atendi enpenetron de italismoj ĉe usonaj gangsteroj aktualaj, pro la infiltrado de multaj italaj (siciliaj) mafianoj. Arabismoj abundas ankoraŭ en la nuna franca slango pro la longa restado de francaj soldatoj en Nord-Afriko. Ekzemple la franca vorto *alkif* (bona).

7 - Ĉe tiaj-ĉi lastaj ismoj fakte temas pri alia klaso de slangaĵoj, kaj rimedo por kreadi ilin; nome pri vortoj kiuj estas komplete inventitaj aŭ pruntitaj el tiu aŭ alia fremda lingvo kaj ofte provizitaj per propra afikso, kiujn mi tial nomas ksenismoj (= fremdvortaj pruntaĵoj). Ilia signifo estas ne senpere divenebla aŭ komprenebla, kaj ili ŝajnas pro tio ankaŭ pli rezistemaj kontraŭ la dentoj de la tempo.

Ĉiel ajn, miaopinie tiaj ekzemploj demonstras ke — se la tempo-vento certe kaj daŭre forbalaas slangaĵojn — tamen iu kernego de slango, spite ĉiujn sortobatojn, restas rimarkinde tenaca tra la eraoj; kio estus klarigebla per la simpla ideo ke sen tiu aŭ alia firma bazo, sen tiu aŭ alia forma “korpo”, slango ne povus ekzisti same kiel neniuj koineaj lingvoj povus ekzisti sen plimalpli konstantaj gramatikaj kaj vortaroj. Ekzistus tiel nur malfiksa ŝelo de efemerismoj kaj klikismoj — vortoj specifaj por nur unu limigita homgrupo — kiuj dronus en la ondoj, dum kerno postvivas. Tio cetere ne forprenas la intereson de efemerismoj, ĉar slango sekvas la kapricojn de kultura, ekonomia, sociologia historio tiel fidele, ke oni ofte kapablas situigi tekstojn en la tempo, laŭ la jargonaĵoj en ili.

Ambaŭ tendaroj pri evoluemo de slango do pravas. Sed, eĉ se spertuloj ne kapablas interkonsenti pri la rapideco de slango-ŝanĝiĝoj el antaŭaj epokoj, ili certe unuanime agnoskas la dinamikan ritmon modernan. Ĉiu ajn, kiu konsultas vortarojn el la pasinta 20-a jarcento, povas facile konstati la malaperon de multaj terminoj, kaj aperon de freŝe novaj, jaron post jaro. La fenomeno estas rimarkebla eĉ en nia internacia lingvo. La leganto mem pripensu kiom da ĵargonaĵoj nomoj, en lia gepatra lingvo, jam ricevis (aŭ al si mem donis) la kontestanta, aŭ senpere krimanta junularo en la ĵus pasintaj jar(dek)oj. Sen detaligo pri iliaj “fak-ĵargonoj”. Neniel mirige ke unu fakulo certigas ke slango re-juniĝas en cikloj de proksimume dek jaroj, kaj ke la aŭtoroj de la spritega lernolibro pri franca slango *La méthode à Mimile* — vortludo aluda al la konata *Méthode Assimil* — certigas ke oni, por lerni slangon meminstrue, povas fidi nur vortarojn treege freŝdatajn.

Kiom koncernas la etiketon “sekreta”, kiun vortaristoj tiel senmanke ŝatas glui al slango kune kun la eĉ “krima”, ĝi ege dependas de psikosociaj faktoroj kaj de historia kadro. Ĝenerale kaj aktuale slango certe ne estas sekretema en la vera signifo. Ja povas okazi ke ĝi rolas kiel kripta lingvaĵo, kaj en tiu-ĉi traktajo aperas ankaŭ tiaspecaj modeloj, sed tiuokaze estas nur incidente, por ke tria persono alimedia ne kunprofitu de la momentaj informoj. Ĝi estas por tiu celo je dispono, jes, sed ne tiucele kreata aŭ konservata intence. Tiu ĝia hazarda funkcio do ne estas ĉefmotivo por ĝia ekzisto, sed temas pri nur unu kaj okaza faceto inter multaj aliaj. Notende: en tiuj formoj kaj kunteksto ĝi estas plejege devia kaj sin apartiga, kio meritigas en kelkaj lingvoj eĉ

apartan nomon por ĝi (*cant, Rotwelsch*) distinge de kutima, mal-kaŝa slango.

Aliflanke, kiel mi skizos pli poste, la sekretecon de iamaj rabistaj slangoj elstaris tiel forte pro historiaj cirkonstancoj, ke aliaj formoj ne ricevis la atenton, kiun ili meritis. Tamen, ĝis hodiaŭ la brul-stampo “sekreta” persistas. Interesa konstato: estas specife ksenismoj kiuj plej facile rolas kiel sekretigiloj.

Kaj ĉi-tiel ni venas al pli detala situigo de la fenomeno en ĝia sociolingvistika kadro.

1.3 Sociaj kaj individuaj faktoroj

Konvencia koinea lingvo estas destinita al la distanco; ĝi funkcias de grupo al grupo, de generacio al generacio, de epoko al epoko. Ĝi strebas al la konstanteco de la formo.

Nekonvencia lingvaĵo male estas sentojn-esprima pli ol pensojn-komunika. Ĝi funkcias per kaj por penetremo, sentigo, dialogo; ĝi funkcias de homo al homo, intime. Sekve ĝi estas nete individua afero. Estas individuo kiu en tiu aŭ alia situacio vipe mokas aŭ defendas sin per sprita novovorto. En tiu rilato oni certe povas nomi lin poeto en sia modesta maniero.

Jen kial unu tendaro de lingvistoj opinias slangon pure spontane estiĝinta kaj estiĝanta fenomeno.

Inter la personaj **psikologiaj motivoj** kiuj estigas slangon, Eric PARTRIDGE mencias: esprimi sian vivoĝojon, ekzerci sian spritecon, rimarkigi sin, liberigi sin de konvencio, inciti la aliajn, freŝigi paliĝintajn kliŝojn, trafi pli forte kaj penetre per koncizeco, transformi tro abstraktajn ideojn al palpebla konkreteco, malgravigi la penojn kaj dramojn de la homa vivo, alproksimigi sin pli intime al la aŭskultantoj, montri ke oni estas laŭmoda kaj ĝisdata, sentigi ke la alia ne estas tia, demonstri sian apartenon al donita kasto aŭ metio, kaj fine malkomprenebliĝi al eksteruloj kion oni volas teni sekreta inter elektita anaro.

Similtone rezonas la fama lingvisto Otto JESPERSEN (*Mankind, Nation and Individual*): La plejekstrema impulso, por krei slangon, estas iu sento pri intelekta supereco. Oni trovas ke tiu aŭ alia vorto aŭ esprimo de la normala lingvo iĝis banala, tro bonkonata, enuiga, kaj tial oni serĉas novan vorton por tikli la fantazion kaj

por kontentigi la deziron je io amuza, aŭ almenaŭ plezuriga, por alporti ŝanĝon. Tiel, slango estas rezulto de la homa ludemo; estas porluda kreo de io nova, kie — laŭprincipe — nenio nova necesis... Slango estas lingva luksaĵo, ĝi estas iu sporto.”

Certe elstara inter psikaj motivoj por krei kaj uzi slangon estas ankaŭ **timo antaŭ tabuaj nocioj** kiaj: sekso, gravedeco, nasko, malsano, morto. Anstataŭ la verajn vortojn tiu timo kreskigas ĉirkaŭvojojn. Kaj pro la nepre ĉiutaga kaj ĉiuhoma rolo de tiuj konceptoj, oni ne miru pri la labirinto de metaforoj ĉirkaŭ ili.

Precipe **sekso** alpremas tian stampon. Puritana mensostato ja zorgis ke seks-objektoj kaj seks-meĥanismoj disponu en koineo nur medicinajn fremdvortojn aŭ ekstreme palajn, kamuflantajn esprimojn kiaj “organo, procedo”. Dume, la seksa instinkto estas laŭnature sintruda kaj malkovra. En stato de seksa ekscitiĝo la homo reestiĝas beste primitiva, lia/ŝia korpo postulas senrezerve ĉion realigeblan, kaj liaj/ŝiaj pensoj tiam emas ĉion ĉirkaŭan “seksigi”, ankaŭ pere de la lingvo. Tio klarigas la grandan inventemon de slango ĉi-rilate, en ĉiu ajn lingvo, same kiel la floradon de pornografia literaturo. Estas cetere facila tasko, ĝuste pro la primitiveco de seksaj gestoj kaj korpopartoj; eblas aludoj el plej malsamaj direktoj: *piŝti, pruno, klabo, butonoj*.

Ion saman oni povas diri pri **blasfemoj**: “Sur la maro de la vivo la velado ne ĉiam estas flegme trankvila. Povas ŝanĝiĝi la vetero kaj ekfuriozi uragano. Tiukaze la homo povas perdi sian spiritan egalpezon kaj li ekuzos ‘fortajn’ vortojn kiujn li kutime ne uzus: li blasfemos, sakros, insultos, akre mokos aŭ vundos, ellasante la galon bolanta en lia interno.” [G. FAULHABER]

El ĉiuj tiaj fontoj de temperamento kaj emocio la homo ŝprucigas slangajojn. Aliflanke, mi opinias **la rolon de la komunumo**, de la socio mem almenaŭ same grava. Persona invento ja trafus en vakuon se ĝin ne akceptus kaj pludonus koncerna grupo; persona spritaĵo iĝas “slango” nur se ĝi plaĉas al la grupo kaj estas imitata de ties anoj. Sociologia kondiĉo por ekesto de slango estos do ankaŭ la formiĝo de sufiĉe hierarĥia strukturiĝo en la grupo, tiele ke eblas kontrasto inter kasto, inter parolantoj de akceptinda kaj ne-akceptinda lingvaĵo. Grupo al kiu mankas sento pri komuna unueco, kiel foje kamparanoj, malofte inventas slangovortojn.

Sen fonetiko aŭ sintakso aliaj ol tiuj de la grupo, sen alia semantiko ol tiu de la grupo, slanga vorto plaĉas al novico kaj/aŭ aperas al li deviga kondiĉo por grup-aparteno. Se la individuo do

kreas laŭ momenta inspiro, li same ricevas kaj lernas de siaj kunuloj, kaj li lernas la apartan lingvaĵon kune kun ceterajn grupajn morojn.

* * * * *

Cetere, **popolanoj ofte ne konscias ke ili uzas slangon**, tial ke la nocioj “slango” kaj “dialekto” — kiel jam pli frue asertite — ĉe ili kutime interpenetriĝas. Konscio pri propra al ili lingvouzo, strukture kaj ne nur formale kaj ankaŭ sendepende de la dialekto, ja signifus por ili, por ilia (sub)socia tavolo, sufiĉe altan gradon de abstraktiga kapablo. Tian oni akiras normale nur per skriba, do lerneja kleriga figurigo. Parolata lingvo ja estas tiel natura al ĝiaj parolantoj kiel spirado. Ili ne cerbumas pri tio. Subsocioj kutime ankaŭ ne konas aŭ ne aplikas la oficialan nomon por tiu sia lingvaĵo, por sia slango, sed ili uzas — se vere bezone — iun alternativan nomon aŭ ĉirkaŭfrazon kia “lingvo de la anaro” aŭ “lingvo de la medio” aŭ “nia parolmaniero”.

Se slango tamen ekaperas en skriba formo aŭ eĉ ekfloras en aparta “anatema” romanliteraturo, estas pro inventemo de iu klera esploristo pri lingvofenomenoj, de spitema beletristo kiu — pro tiuj aŭ aliaj cirkonstancoj — sinkis ĝis la fundo de mizero, de filmfaristo kiu malkovras en ĝi pafcertan kaj pitoreskan esprimilon. Ne el la (malklera) medio de la slanguloj mem ...

Kiel mi jam menciis, “slangeco” dependas senpere de la sin-apartigo de koncerna grupo, same kiel trivialeco kreskas kun socia malalteco de la grupo. Lingvo ja spegulas la spiriton de la homo. Se la grupo forte sin fermas antaŭ kaj kontraŭ la ekstera mondo, tiam ankaŭ ĝia slango iĝas afero specife “por interna uzo”. Samgrade kiel la grupo mem estas koncentrita je si mem. Tiele, kvazaŭ aŭtomate, krimularoj — precipe bandoj laŭ historia modelo — kreas al si **sekretan lingvaĵon**, eĉ sendepende de la intenca kreopovo de iliaj individuaj membroj.

Aliflanke notindas, ke ankaŭ ĵargonaj terminoj de specifa metia grupo, estante internen direktitaj en alia kadro, montras tendencon al “fremdeco” kaj sekve al sekreteco, sed ties membroj ne sentos rezervon, uzante sian lingvaĵon antaŭ anoj de aliaj grupoj, tiele malgraŭ ĉio “eksportante” sian slangon. Se slango do estas afero praktike de la kompleta homsocio, ĝi aperas en sia plej akra lumo kiam en sekreta vesto.

Ankoraŭ kroma faktoro kiu influas la aperon de slangaĵoj, precipe de ksenismoj (fremdvortaj slangaĵoj), estas apudeco de kaj **kontakto kun alilingva popolo**. Konscio pri ekzisto de alia idiomo, estu tiu eĉ sen altruda forto, rompas la hermetikan unuecon inter vorto kaj ideo, nedisigeblaj ĉe homoj de nur unu lingvo. En konkreta najbareco de fremduloj, de fremda grupo, la parolanto ekkonscias ke lia lingvo ne estas **la** lingvo, sed nur **unu** lingvo. Tiel li plus aŭ minus facile akceptos kaj kreos, proporcie al ofteco kaj daŭro de la interrilatoj, ksenismojn. Kaj kiam la fremda altrudo estas forta, tiam la slango, en formo de jargonajoj, infektas eĉ la koineon mem, kiel pruvas la hodiaŭtempa inundo de anglismoj en multajn lingvojn. [Vd. Ŝuzoj el Brokantejo 4.23]

La lulilon de slango mi do situigus nek unuflanke en la individuo sola nek aliflanke en la grupo sola, sed en ilia reciprokaj interŝanĝoj, analoge al la naskiĝo de fulmotondroj inter kaj el oponaj elektroŝarĝoj.

Sed, ĉar tiaj lingvaj interŝanĝoj dependas intens-mezure de ŝanĝigemaj faktoroj moralaj, sociaj, kaj kulturaj — mi jam menciis la netranĉeblan diskuton sociolingvistikan koncerne al (mal)-rapideco de slanga evoluo — ni devas ankaŭ iom ekzameni la kulturhistorion generale; je kio la magreco de miaj amatoraj scioj, samkiel la malfacileco de esplorado sur internacia nivelo, devigas min limigi la trarigardon ĉefe al parto de Okcident-Eŭropo, lasante la ceteron ne plugita.

1.4 Historia Skizo pri ĝia evoluo

Se oni volas rigardi la fenomenon slango en iom pli vasta senco, do certe ne kiel sekreteman kodon krimulan, tiukaze estas baldaŭ klare ke ĝi apartenas al ĉiuj tempoj kaj lokoj, kie homa komunumo sufiĉe organiziĝis por rezultigi sociajn klasnivelejn. Modernaj lingvistoj do ne hezitas situigi ĝin tre fore en la tempo, ĉar tiele ni malkovras ĝin en ĉiuj veraj lingvoj, ĉe ĉiuj veraj popoloj, eĉ ĉe agrokultivaj triboj kaj ĉe nomadoj; kiel en Afriko kaj Azio, tiel en Eŭropo kaj Ameriko.

Oni detektas ĝiajn spurojn en postlasitaj skribaĵoj de Helenujo kaj de la Romena Imperio, ĉe Keltoj, Gaŭloj, kaj Vikingoj — la termino *slang* supozeble devenas de tiuj-ĉi lastaj. Jam la granda filozofo

Plato faris notojn pri dialektaĵoj kaj lingvaj deviaĵoj, kiujn ni hodiaŭ etikededus slangaj.

Kiom koncernas specife la eŭropan kultursferon, mezepokaj eposoj kiaj la *Roman de Renard* uzas la trivialan vortaron de la “popolaĉo” same kiel popolfarsoj kiaj *Till Eulenspiegel* [por ambaŭ vidu Arkaika Esperanto]. La angla poeto Geoffrey CHAUCER en la 14-a jarcento plancele utiligis slangajojn por distingi inter la diversdevenaj pilgrimantoj rolantaj en lia klasika *Canterbury Tales*. Ni trovas slangon ankaŭ en la buŝo de popolanoj aŭ krimuloj rolantaj en la tiel nomataj “Misteroludoj” — tiuj estis teatrigitaj vivo kaj morto de Jesuo Kristo aŭ de iu katolika sanktulo — de 15-a kaj 16-a jarcentoj. SHAKESPEARE ĝin aplikas en iuj siaj klasikaj dramoj, samkiel John GAY en sia *The Beggars* (1728) kaj Charles DICKENS (19-a jc) kiu lasta ĝin aplikis en romanoj pri la surstrata vivo de Londono, paralele al Mark TWAIN en Usono pri la vivo de ordinaraj homoj laŭlonge de la riverego Missisipi. La fama germana *Dreigroschenoper* de Berthold BRECHT en la ĵus pasinta 20-a jarcento estas plena je ĝi, samkiel la muzikfilmo *My Fair Lady*, laŭ la verko de G.B. SHAW. Jen do slango ĝis en mejloŝtonaj klasikajoj de la eŭropa kulturhistorio, eĉ se ni fkankenlasas enmikson de dialektoj. Kaj mi certe ne citis ĉiujn !

Tamen, tiuj beletraĵoj ĝenerale nur eksponis kaj utiligis slangon sen antaŭa vere lingvistika esploro aŭ sen iu popolmora analizo. Kiom mi eksciis, ni devas atendi la jaron 1426 en Francujo por vidi la unuan efektivan agnoskon oficialan pri la naturo kaj aparteco de slango. Estas tiu agnosko policana dokumento pri friponuloj, en kiu ni legas:

Lequel NOBIS dist au suppliant qu'il alast avec lui en l'ostel où pend l'enseigne des petits soliers et que il avait trouvé son homme ou la DUPPE, qui est leur manière de parler, et que ils nomment JARGON, quant ilz trouvoient aucun fol ou innocent qu'ils veullent decevoir par jeu ou jeux et avoir son argent.

Aŭ, tradukita per Arkaika Esperanto:

Cuyu NOBIS ad Plendantom dirit que lii in Gasteyom irit cuyoe Anontztabulom prid Trid Shuetoy expendat, char ityahem Homon sihan trowintam estit au DUPON, cuyel Parolmanierom del ilui estat, cay cuyun ZHARGONOM nomait, cuyahem trowintay estait heyun Malsaghulon au

Naiwulon cuyun trompir wolait per Ludom aù Ludoy ed Monon lüian exprenir.

Kiam slango do fine ricevas oficialan stampon pri ĝia ekzisto, estas sambate brulstampo pri krimeco, kvazaŭ estus tio ĝia ununura karakterizo.

Baldaŭ poste, en 1455 estas la vico al arĥivoj pri granda proceso en la urbo Dijon, kontraŭ la rabista bandego de tn. *Coquillards* (Konkuloj) al kiuj tre verŝajne aniĝis ankaŭ la fama poeto François VILLON, studento fuĝinta el Parizo pro iu misfaro. Por esti nekomprenataj de ne-iniciitoj, ili utiligis sekretlingvaĵon tiel hermetikan, ke daŭris ĝis la 20-a jarcento antaŭ ol esploranto — retrovinte la antikvajn dokumentojn, plenajn je notoj kaj klarigoj pri ilia lingvaĵo — sukcesis malĉifri la poetaĵojn de VILLON, verkitajn en tiu slango [vd. “Enigma Epitafo” 4.10].

Tiaj rabistaj bandoj estis kreitaĵo, en unua fazo, de la mezepokaj landvojoj, en posta fazo de la estiĝantaj urboj. Tiuj-ĉi lastaj estis pli malfermitaj al invado de nedezirataj individuoj ol estis abatejoj kaj kasteloj. Materia bonfarto ekvivis en ili pli interpenetre kun terura mizero. Aliflanke vastigis kaj variigis la socian homfatrason la senĉesaj militoj inter urboj kaj regionoj, same kiel la religiaj Reformo-tumulto kaj la Renesanco-kritikemo (14-a ĝis 18-a jarcentoj) skuis la spiritan egalpezon. Tiel estiĝis grandega nombro da senhejmuloj, da ostracitoj fare de leĝo kaj klasorganizo, kiuj venis en kontakto unu kun la aliaj, sur la longaj vojoj, sur la merkatojplacoj, en la urbaj kvartalaĉoj: migrantaj brokantistoj, foiraj artistoj, pilgrimantoj, almoz-petantoj, nomadaj popoloj, senlaboraj soldatoj.

Estis fekunda grundo por kristaliĝo de slango, ĉar ĝi kunigis du esencajn kondiĉojn: vasta subsocia tavolo kaj libera senhalta interrilatado de popoloj. El tiu hom-amaso do kreskis bandoj kun efektiva sekretkodo, organizitaj laŭ la modelo de metiaj gildoj, kun hierarkia strukturo, kondutoreguloj, iniciadaj ceremonioj, kaj tiel plu.

Kontraŭ tiu organizita krimomaŝino, la normala komunumo devis kompreneble serĉi defendorimedojn. Unu el tiuj estis enpenetro de la sekreta krimulara lingvokodo. Aliaj formoj kaj vortotezaŭroj de la (fi)popola slango ne estis danĝeraj kaj do ankaŭ ne okupis la aŭtoritatulojn kaj instancojn. Tiel okazis, kune pro malesto de serioza lingva intereso ĉe kleruloj, ke la tuta cetera slango ordinara, ne postlasis al ni same netajn dokumentojn kun oficiala

karaktero. Estiĝis sekve la falsa impresio ke slango ĉiam, pro-necese kaj origine, estas kaj devas esti nur sekreta konvencio; falsa impresio kiu eĥas ĝis la hodiaŭa tago en multe da eksplikaj vortaroj.

Por la germana lingvogrupo kaj ekster la sfero de oficialaj dokumentoj, plej antikva aŭtoritata verko pri — evidente kaj denove¹ — sekreta friponlingvaĵo estas latintitole la *Liber Vagatorum* (Libro pri la Vagabondoj) el Köln 1510, en kiu la leganto povas lerni, krom la *Wortarom Phriponeys, Banduleys, ed Crimuleys*, ankaŭ la *Ruzay Manieroy del Almozpetantoy aŭ -petantinnoy, per cuyuy ilii multoe del Homeys trompait*. Novafoje tiu libro celas defendi la bonan publikon (= riĉan burĝaron) kontraŭ kanajlojn, informante pri ties sekreta lingvaĵo *porque cheyu sihin contrez ityo gardu*. La sufiĉe ampleksa kompilaĵo mem apogiĝas grandparte sur *Die Basler Betrügnisse der Gylter (Bazelaj Trompazhoj del Phiuloj)* el ± 1450, kredeble la tutunua tiaspeca vortara verko en Eŭropo. La “Libro pri la Vagabondoj” siavice estis kopiata kaj konsultata de kleraj interesiĝantoj ĝis en la 19-a jarcento !

Notindas, ke multaj ĝiaj vortoj estas de ĵida aŭ cigana deveno, tial ke estis multe da Judoj kaj Ciganoj inter la translimen migrantaj komercistoj de tiu tempo. La unuaj, ĉar kristana ostracismo malpermesis al ili plenumon de administradaj oficoj aŭ organizitaj metioj, la duaj pro sia ne kvietigebla nomada sango. Ekzemple: germana *Schurer* (krastisto) = ŝtelisto, devenas de cigana |TŠOR|, kaj dica *goochem* (ŝruda) = ruza, lerta, de ĵida |XOXOM|.

Tiu lingva enpenetro tamen ne aŭtomate pravigas la konkludon ke estis ankaŭ multe da Judoj kaj Ciganoj en la rabistobandoj ! La sola fakto mem de ilia forta religiamo aŭ severa grupmoralo male faras ke la procento de krimeco ĉe ili ambaŭ, tiutempe kiel hodiaŭ, estas kompare minimuma. Tiu fakto bedaŭrinde ne malhelpas ke oni jam plurfoje prezentis la supre menciitan vortaron kiel “pruvon” pri ĉiama krimemo, precipe de Judoj. En niaj tempoj tion faris la Nazioj; en 1528 estis ... Maarten LUTHER proprapersono, kiu en tiu jaro reeldonis la *Liber* sub titolo “*Von der falschen Bettler Būberei*” (*Prid phalseys Almozuleys Phriponazhoj*), asertante en sia antaŭparolo, ke la germana krimoslango certe devenas de la Judoj.

La tie-ĉi menciitaj unuaj verkoj estis sekvataj de similaĵoj en multaj aliaj landoj de Eŭropo: 1549 en Italujo, 1566 en Anglujo, 1609 en Hispanujo, kotopo. Post longatempa vojflanka vivado, slango do tiel dire establiĝis oficiale, almenaŭ per sia krimfaceto.

Alifanke, antikvaj dokumentoj kiaj tiaj-ĉi informas nin pri interesaj situacioj kaj homoj, hodiaŭ en Eŭropo jam ne ekzistantaj, ekzemple pri tiu “raso” de vagantaj studentoj (Germane: *Kannesierer*) kiuj migris de unu universitato al alia, dume redaktante leterojn por analfabetoj aŭ ĉarletanante ĉe simplaj kamparanoj, por monprofitigi sian klerecon.

Ĉiel ajn, ekde tiu malfrua Mezepoko, la tempo de grandaj bandoj estas plene lanĉita en tuta Eŭropo, margene de la ĝenerala kultura aŭ politika historio. La terura mizero, la ĉiama malsato de la popoloj, kune kun subpremado kaj ekspluatigado fare de despotaj reĝimoj, ofte ornamis tiujn rabistarojn per aŭreolo de heroa ribelemo kontraŭ maljustecon, ĉar estis ja unuavice riĉaj administrantoj kaj fifieraj nobeloj aŭ la fremdaj okupadantoj, kiuj iĝis iliaj preferataj viktimoj. (Verdire, oni povas al si demandi ĉu nia epoko estas vere diferenca...)

Ne mirige ke rabistoĉefoj, ekde la 18-a jarcento, estante ofte tre inteligentaj bravuloj, facile iĝis legendaj figuroj.² Kiel modelon kaj ekzemplon oni prenis la francan rabistestron CARTOUCHE, kies eposajn agojn proklamis teatraĵoj kaj popularaj kantoj, jam antaŭ ol li ricevis morton sur la eŝafodo, kaj ankoraŭ longe poste. Eĉ la francaj korteganoj de Reĝo Louis XV trovis modoplezuron parolante, kiom de ili sciate, krimulan slangon. Kaj ankoraŭ pli poste tiu modo renkonteblis, nome sub la *Ancien Régime*, ĝis eĉ en Anglujo sub Reĝino Victoria, kaŭze de kultura aspekto: iuj kleraj rondoj volis per ribela trivialeco spiteme respondi al la artifika kulto pri “pura, nobla, bela, klasika lingvo” flegata de la aristokrataro.

La bandoj kontaktis unu la aliajn trans landlimoj kaj ili uzis plus minus sekretan lingvaĵon, kio eksplikas — kiel mi jam en la antaŭa ĉapitro menciis — ke iom da komunaj internaciaj slang-aĵoj estas retrovebla en malsamaj sed najbaraj lingvoj. Kompreneble, ĉe la rabistoj mem tiu uzado de slango kutime neniel estis ludo aŭ nura sinapartigita gesto, sed ĝismorte serioza afero.

1. La germana vorto por slango, *Rotwelsch*, aperis jam en la 13-a jarcento !
2. Legu “Enigma Epitafio” - 4.10.

Post la Franca Revolucio venas la teroro de tn. Bruligantoj, kiuj maskite elpremis de izolite loĝantaj terkultivistoj la lokon de ilia monkaŝejo, rostante al ili la piedoplandojn super kamena fajro. Sed tiam la erao de grandorganizitaj krimularoj komencas jam velki. Rimarkinda literaturaĵo, kiu iel markas tiun subeniron, estas la “Memuaroj” de VIDOCQ, legenda policisto kaj estinta punlaboranto, kies verko plenas je krimula slango³. Sin anoncas la 19-a jarcento kun industriigo, administrada organizo, demokratiigo de oficoj, sed ankaŭ kun estiĝanta proletaro kaj marksisma klasbatalado.

Disfalo de rabistaroj havis kiel naturan sekvon, unue ke ilia pli malpli hermetika slango vaste diskrevis, enpenetrante la ordinaran lingvon kaj ties dialektojn. Tiel ĝi tute perdis sian faceton de sekretaĵo, mergiĝante en la kutiman slangon. Sed dua-loke ĝi tiel ankaŭ plene eniris la beletron, precipe de Francujo kaj de Anglosaksonaj landoj. Aŭtoroj de la Romanecismo, malkovrinte slangon kiel reprezentan trajton de subsociaj tavoloj, ŝatas meti ĝin en la buŝojn de siaj fiktivaj kanajloj. Ili volonte ĉerpas inspiron en la malnovaj vortaroj kaj ĉe VIDOCQ, sed tute ne hontas kompletigi sian mankon je scio per propraj inventaĵoj — planlingva principo en naturlingvo ! Tiel SUE⁴ kaj BALZAC, sed ankaŭ la monumenta Victor HUGO en sia *Les Misérables* (La Mizeruloj).

Tiu laŭmoda literatura ondo atingas sian kreston en posta Naturalismo, kiu ja intencas prezenti la fie kaj aĉe nudan veron de realaj homoj kaj vivokondiĉoj. Elstaran ekzemplon de tia slanga beletro ni trovas en *L'Assommoir* (“La Buĉejo” = la drinkejo) de Émile ZOLA kies malfeliĉa heroino iom post iom fiigas kaj aĉiĝas pro sortobatoj, kion atestas akompana trivialiĝo de ŝia vortuzado.⁵

Sed ankaŭ socialisme pensantaj verkistoj kiaj Gerhardt HAUPTMANN, danke aplikis slangon⁶ kaj satiristoj kiaj George Bernard SHAW en sia senkompara teatraĵo *Pygmalion* kies heroino, kontraŭe al la ĵus citita malfeliĉulino, suprengrimpas la socian eskalon, laŭŝtupe delasante sian dialekton kaj sian slangon, sub instruado de lingvoprofesoro.⁷

3. Legu “Ruzo de Policestro” - 4.18.

4. “La Lukto” - 4.13.

5. “Vomkapeco” - 4.22.

6. Vidu “Proleta Protesto” en “Popido, la Verda Dialekto”.

Kompreneble estis ne nur romanoj aŭ teatraĵoj kiuj sisteme aplikadis la popolan slangon, sed ankaŭ poetaĵoj. Proksimiĝe al la 20-a jarcento tiel okazis proliferado de parizmodelaj kanzonoj el varieetoj kaj *café-concert* kies rolon baldaŭ transprenos gramofondiskoj kaj filmoj, kaj tiuj-ĉi eĉ abunde. La deca burĝo ja spertas tiujn distraĵojn kiel specon de katarso en kiuj la aŭdataj kaj vidataj krudaĵoj iel senkatenigas liajn primitivajn instinktojn — samtempe ilin ankaŭ ekscitante — donante impreson pri liberiĝo el la karceriga “bonmora” mondo ĉirkaŭa.

Estus do eraro esperi ke ĝenerala plialtiĝo de la vivonivelo en plene industriigitaj landoj de nia propra tempo malkonstruus kaj komplete elradikigus aktive uzatan slangon en sia 19-jarcenta krimula vesto, favore al la sola koineo. Vere, provincaj kaj agrokultivaj regionoj perdiĝis, kune kun siaj rabistoj, kaj do ankaŭ la slango en krimula kadro, igante la lingvaĵon vegetadi ĉe migrantaj brokantistoj kaj foirvojaĝistoj. Estas cetere ĉe posteuloj de ĉi-lastaj en Flandrujo ke mi mem iam lernis buŝplendon da tiaj “sekretaj vortoj”. Sed nia moderna epoko centrigas ĉion en la moloĥaj ventroj de teknike, ekonomie, kaj sociologie ŝvelegintaj urbegoj. Estas en tiuj centroj ke slango en ĉiuj ĝiaj aspektoj, kĵ krime kĵ alia, por tiel diri renaskiĝis.⁸

La ĉefrolon en tio sendube ludis kaj ludas Usono, pro diversaj motivoj: estas tie ke la modernaj urbegoj unue kaj supermezure elkreskis; estas tie ke enmigris sennombraj aventuristoj kaj fuĝantoj el ĉiuj landoj, popoloj, kaj rasoj, allogataj de promeso je sukceso en la “Nova Mondo”; estas tie ke novmodaj bandoj — mafiaj gangsteroj — organizis sin grandskale en “sindikatoj”, la gildoj de moderna tempo. Ilia krimslango muldiĝis ĉn kaj pro modernmetoda kontrabandado (de alkoholaĵoj kaj narkotaĵoj kaj armiloj), ĉantaĝa sistemo de “protektado” je entreprenoj kaj komercaj butikoj, ekspluatado de amuzejoj, prostituejoj, monludejoj, vetkuroj kaj tiel plu. Ĉio-ĉi tro bone konata por detaligi — la legendaj nomoj de Al CAPONE kaj FBI estas plene elvokaj.

Sed konekte kreskis kaj ĝeneraliĝis ĉiuj aliaj specoj de slango pro la rapida, eĉ fulme rapida, moderna disvastigado de novaĵoj pere de gazetaro, radjo, kaj niatempe televizio kaj la Interreto. Ili facile enpenetras nian ĉiutagan vivon, eĉ nian privatan hejmon, sub masko de laŭmodaj esprimoj. Mi farus gravan neglekton, ne

7. “Fuŝita Eksperimento” – 4.7

8. “Ebria Konfeso” (4.4) kaj “Amo de Piĉulino” (4.2) en la Krestomatio.

citante sur tiu-ĉi tereno la disvastigon kaj kreopovon de sporto ! En anglalingvaj landoj la invado ek-de malsupre estas eĉ tielgrada ke la oficiala lingvo minacas malaperi de sur la publika scenejo por estiĝi nenatura komunikilo de preskaŭ nur instruistoj, akademi-anoj, politikistoj, kaj oficialaj institutoj.

Paralele, kiom koncernas beletron, oni vidis la naskiĝon de aparta krimliteraturo, laŭ franca modelo nomata *série noire* (nigra serio)⁹ — triviala frateto de la tiel populara “polica romano”— kiu faras abundan uzon de krimula slango.¹⁰ Hodiaŭaj aventuraj kaj spionadaj romanoj, la bildstriaĵoj rakontoj,¹¹ la fantascienco, en ĉiuj formoj (libroj, radjokoludoj, filmoj, teatro) faras al ĝi larĝan labor-spacon.

Kaj kion diri pri la multaj protest-grupoj kiuj en sia ribelemo, vandalismo kaj sklaviĝo al drogoj,¹² uzas slangon tiel kompleksan, ke ĝi komencas impresi kvazaŭ aparta dialekto aŭ idiomo ?¹³ Aŭ pri la grandegaj rolo kaj influo de televido kaj filmo ? La potenco de ĉi-lastaj estas ja tiel nekredeble granda ke ili per ĉirkaŭvojo revivigas (aŭ entute kreas!) slangon eĉ en landoj, kie ĝi forgesiĝis malantaŭ la publikaj kulisoj aŭ apenaŭ naskiĝis, ĉar “post-sinkroniga” tradukado, fare de inventemaj lingvospecialistoj, redissemas ĝin tagon post tago en ĉiujn hejmojn.

Konklude, mi estas en rajto diri ke slango ĝenerale, kaj krimula slango speciale, iam estis, nune estas, kaj ankoraŭ estos, en ĉiam kreskanta grado, grava lingvofaceto de naturlingvoj; faceto kies spitantanta etoso kaj bunta formo ĝis nun mankis en nia neeviteble klasika kaj norma planlingvo Esperanto.

09. En Esperanto mi por tio proponus la terminon “anatema literaturo”..

10. “Pridemandado” (4.17) kaj “Fatala Pokerludo” (4.16) en la Krestomatio.

11. Vidu “La Milionula Adoptofilo” - 4.14

12. Legu la gazetartikolon “Slango de la Malbenitoj” - 4.19.

13. “Vagabonda Venĝo” - 4.20.

1.5 Ĉu slango ankaŭ en Esperanto ?

Kvankam slango do hejmas ĝin kaj fontas ĉi el subsociaj klasoj de homoj, ĝiaj terminoj kaj esprimoj ne necese restas ties ekskluziva privilegio, kiel skizite. Iom post iom, frue aŭ malfrue, ĝi eksciĝas kaj estas uzata ankaŭ en la ĉirkaŭa mondo, ankaŭ de la ĝenerala publiko; do ankaŭ de vi, kara leganto, kara koinea samidean(in)o, en via gepatra lingvo. Eĉ se nekonscie, pro altrudo de modovortoj.

Se vi do uz(et)as ĝin plimalpli ofte, kun viaj amikoj, en via laborejo, kun viaj klubanoj, en viaj amuzejoj, koncerne vian gepatran lingvon — kial vi do ne kapablus fari same en Esperanto? Aŭ ĉu vi deziras, ke tiu-ĉi restu por ĉiam nur akademie strikta, altnivele abstrakta komunikilo de prudaj, senemociaj, retorikaj homoj ?

Ĉu la hezitema vojo, kiun pionire montris al ni ekzemple J.F. BERGER, per sia bela traduko de *En Okcidento Nenio Nova*, kaj *La Vojo Returne* (ambaŭ fare de E.M. REMARQUE), aŭ Peter PENETER per sia originala *Libro de Amo*, estu el beletrista — se ne el morala — vidpunkto nura senmorgaŭa sakstrateto ?

Mi komprenas ke prudaj homoj, kiaj fakte estas ankaŭ mi, abomenas trivialecon kaj pornografajojn; kaj do nepre ne estas mia intenco speciale instigi al tiaj ! Sed mi — kaj vi — ankaŭ ne estu blindaj antaŭ la reala vivo. Se tiu-ĉi manifestas sin ĝis en beletro per nekonvena kaj nenorma lingvaĵo, tiel spegulante gravan aspekton de la homa naturo kaj de la homa socio, ni farus mal-bonan servon al Esperanto, malpermesante al ĝi akiron de koncerna esprimilo. Ĉar ni enkarcerigus ĝin en lernejon kaj akademion, ne lasante ĝin eliri en la straton, en la malkaŝan intimecon de la hejmo, en la trinkejojn; kurte: en la realan socian vivon. Esperanto ja fariĝos vera kaj kompleta lingvo vivanta nur kiam povos ekzisti, laŭ difino de Delfi DALMAU “analfabeta esperantistaro”.

Ĝia impeto kaj sekve ĝia ekzisto estas cetere sentebbla kaj rimark-ebla jam en tiu-ĉi nia ŝirmita antaŭprepara fazo movada, por ĉiu kiu ne portas klapojn ĉe la okuloj. Alimaniere, kiel oni klarigu la jaman aperon en Esperanto — sub la plumoj de niaj verkistoj — de tabuaj slangaĵoj *kaco*, *piĉo*, *fiki*, *kaki*, *pisi*, *ĉuro* apud la fundamentaj veteranoj “peniso, vulvo, sekskuniĝi,¹⁴ feki, urini,

14. Sadisma preskoboldo difinis “fiki” en la unua versio de PIV jene: “**ses**kuniĝi kun virino” — ve, la malfeliĉa homino !

spermo”? Cetere, ĉu eĉ la de ZAMENHOF mem enkondukita *drinki* apud *trinkegi*, ne estas esence slanga vorto ?

Aŭ kiel klarigi ke (rudimentoj de) slango ietie iamtiam pronature eknaskiĝas sen aŭtoro nomo, en medioj kie Esperanto estas konstante kaj parole uzata. Menciindas tiel *kokoso*, *sovaĝa kongresano*, *krokodili*, estiĝintaj en niaj Universalaj Kongresoj, same kiel *ĵubano*, *kanutigi*, *sapsarapi* (ĉambrorobo, anigi al la Canutofonduso, ŝtelprunti), kiuj tute nature naskiĝis en la Centra Oficejo de UEA.

Aparte menciindas la granda kompilaĵo “Slango kaj Jargono en Esperanto” el 1996, de la multverka nederlandano Wouter Pilger. Nature, ĝi restas inter la limoj de Fundamenta Esperanto, listigante nur stumpigojn kaj metaforojn, sed jam tiel ĝi estas rimarkinde riĉa. Tiu vortaro estas ankaŭ elŝutebla per la TTT: www.geocities.com/wfpilger/slangocx.htm .

Ili demonstras, ke la sociolingvistika fenomeno nur dormetas ĉe ni, sed estas preta viglege elŝpruci ĉe grandamasa aplikado de Esperanto. Kompreneble, oni povas lasi ĝin en tiu-ĉi provizora stato, argumentante ke estas “tro frue” por vekti ĝin; ke ni atendu ĝis post la “fina venko” por agnoski la fenomenon. Efektive — kaj feliĉe — nia internacia lingvo kapablas plenumi sian neŭtralan perantan devon ankaŭ sen tiaj marginaj kompletigoj kiaj estas dialekto, slango, arkaika formo. Same kiel por infano estas ĉefafero ke ĝi kapablu iri, sed ne nepre necesajo ke ĝi kapablu ankaŭ tuje kuri, naĝi, danci ...

Sed la demando fine estas ĉu oni deziras aŭ ne deziras ke Esperanto iĝu au ne iĝu **plene** la egalulo (eĉ superulo!) de naturaj lingvoj; ĉu oni permesu aŭ malpermesu al ĝi eniri iujn maloftajn kulturkvartalojn en kiuj ĝis nun sole naturlingvoj povis senĝene petoladi. La afero estas ne nepre necesa, certe, sed same certe ĝi povas esti utila. Ne por ĉiuj, sed por kelkiuj, kaj en kelkaj cirkonstancoj. Se do mia(j) projekto(j) ŝajnas superfluaĵo(j) por vi private, kara leganto aŭ legantino, pro tio ke vi havas malsamajn interesosferojn, tiukaze pripensu ke aliaj samideanoj — eĉ se estus relative malmulte da ili — ĝojos povi esprimi sin tiamaniere kaj per tiaj lingvaj instrumentoj. Ili ne ĝenos vin; do lasu al ili la “amuzon” de tute realismaj lingvofacetoj.

Mia Gavaro tiel faras nenion alian ol glatpoluri ĝuste tiun realisman lingvofaceton, organizi ĝin kaj precizigi, por metoda (te. ne kapric-hazarda) apliko kiam bezone, aŭ traduke aŭ originale, ĝis

alveno de natura kreado “en la stratoj”. Por havigi paroltubon al lingvaĵo el “proletara” ks. medioj, kaj por plenigi multe da “truoj” en niaj tradukaj Esperanto-vortaroj. Ja, ĉu ne estas mokridige legi (ekzemple) en la vortaro Nederlanda-Esperanto de Drs. MIDDELKOOP — cetere tre laŭdinda kompilaĵo — ke *plee* (**kakejo**) estas “netralavebla necesejo” ? Tio ja estas difino, sed ne traduko !

Ankaŭ neniom utilis metode provizi koncernajn vort-radikojn per la afiksoj *fĭ-* kaj *aĉ-*. Unue, tiuj svarme troabundus en koncerna teksto, fuŝante la efikon, kaj due ili tute ne kovrus la celatan etoson, ĉar estas ne necese — se preni “La Lukto” kiel ekzemplon el la Krestomatio — kun “fia kantistino” kaj “aĉa buĉisto” ke oni tie havas aferon, sed jes kun kolorplenaj **simeristino** kaj kun **buĉoko**, en la franca originalo respektive nomataj *goualeuse* kaj *chourineur* — anstataŭ koinee *chanteuse* kaj *boucher*. Tiaj elementoj ja estas supozataj rajdi sur la lango de subsociaj kasto kaj posedi koloron de spico kaj trivialeco, kiaj ne hejmas en koinea buŝo. El aplikado de nuraj *fĭ-* kaj *-aĉ* do ne rezultas la bezona ŝoka kontrasto, kun humura kromaromo.

Kompreneble, estas neniun devigo por koineon parolantaj homoj lerni kaj uzi mian Gavaron, kiam ili konscie reprezentas nian “fundamentan” asocion; ne antaŭ varbotaj skeptikuloj, ne en dekondukta rondo, ne antaŭ siaj infanoj aŭ lernantoj, ne se oni ankoraŭ troviĝas en la stadio de komencanto. Ili certe ne bezonas lerni ĝin aktive, ĉar ili jam povus — pro legado de tiaspeca literaturo — pasive ekscii, kaj pro kunteksto kompreni, vortojn kiaj estas la supre menciitaj aŭ kiaj miaj vastigaj **hando, kalbo, pinĉi, knoci, repa, sfoboda** (mano, hundo, ŝteli, batali, morta, libera). Tiu pasiva scioto estos, se ili preferas, maksimume aplikota aŭ aplikebla en specialaj cirkonstancoj, kiujn naturlingvaj vortaroj signas “s(lango), t(riviale), f(amiliare)”, aŭ simile: por spici la kon-versacion, kiam ili certus ke la kunparolanto scipovas aldoni citilojn ĝustatempe.

Tiel skribis mia karmemora amiko, la filologo O.B. FAHLKE, en letero: “Se ni fakte volas, ke Esperanto iĝu taŭga *idiomo* ankaŭ por ĉiu profana dirado en familio, inter amikoj post glaso da brando, inter *nozems* kaj *provo*’s kaj *hippies*¹⁵, por vagantoj kaj ĉaret-kondukistinoj en la parko, plue por rakontado de spritaĵoj, ĉagrenvortoj, blasfemado kaj tiel plu, tiukaze oni transformu la enue ceremonian amelkoluman lingvon en pikviglan esprimilon.”

Estas do neniŭ morala aŭ alia devigo. Sed kiam oni jes ŝatos havi tian esprimilon je dispono, ĝi estu tie. Same kiel beletraĵoj novovortoj estas je dispono de niaj poetoj, spite ĉiujn protestojn pri ties aperado en nia verda rondo.

15. Nederlandlingvaj terminoj por la ne konformisma junularo el la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento.

Gavaro, same kiel Popido kaj Arkaika Esperanto, do ne estas destinita al la normala fundamenta lingvouzo kaj miaopinie ankaŭ ne minacas tiun. Estas ja apenaŭ imageble — en la tute utopia supozo de entuziasma akcepto — ke oni morgaŭ legos en serioza periodaĵo nia: “La Universala Kunjato disklopita de angeraj demonstrantoj” anstataŭ “La Universala Kongreso disbatita de koleraj demonstrantoj”. Ne, ĝi estas destinita, samkiel la aliaj miaj projektoj, al uzo fare de lingvaj spertuloj aŭ en specialaj cirkonstancoj. Ĉefe de verkistoj kaj tradukistoj, kiuj fruntus la dilemon kiel prezenti slangon, same kiel ili okaze fruntas dilemon pri antikva lingvaĵo aŭ pri dialekta dialogo.

1.6 Anateĵo ...

Spite ĉiujn miajn rimarkojn pri la ekzisto kaj la realeco de slango, spite ĉiujn miajn notojn pri ĝiaj naturo kaj rolo en la socia vivo, do principe ankaŭ en Esperanto, se tiu estu vervivanta socia lingvo, mi facile povas konjekti ke Gavaro efikos al multe da ĝisostuloj kiel kolektaĉo de danĝeraj galimatiaĵoj. Ĝi do probable elvokos la malbenon kaj la hu-kriojn de recenzistoj, eĉ pli ol faris miaj antaŭaj proponoj.

Mi brulstampiĝis strangulo kaj herezulo, kiu misuzas siajn talentojn je mortnaskita projektaro “lingvonormiga”, ĉar mi kuraĝis entrepreni la damndan taskon kompletigi Esperanton, tiele ke ĝi respregulu en racie metoda maniero nepre ĉiajn kaj ĉiujn aspektojn troveblajn en vivantaj naturlingvoj uzataj ĉiutage kaj de grandnombraj komunumoj. Esperanto ja estas por ili “jam tute taŭga kaj kompleta” en sia nuna kutima formo; aŭ ĉu ? Tio do denove nomiĝos “atako kontraŭ la Fundamento”, kvankam oni pli ĝuste parolus pri klopodo al “dua progresita etapo” en ĝia kampanjo por tutmonda akcepto.

Nu, kiel defendon kontraŭ tiaj antaŭjuĝoj, mi ne povas fari ion pli trafan ol memori ĉi-sekvajn vortojn de la fama franca verkisto Émile ZOLA, en tre analoga situacio, kiu skribis (1877):

La formo sola [de l'Assommoir] konsternis. Oni ekkoleris kontraŭ la vortojn. Mia krimo estas havi la beletran scivolemon preni la lingvon de la popolo kaj verŝi ĝin en muldilon funde ellaboritan. Ha! tiu-ĉi formo, jen la granda krimo! Vortaroj pri tiu-ĉi lingvaĵo ekzistas tamen; kleruloj ĝin studas kaj ĝuas la sukceson de la ne-atenditeco kaj la forton de ĝiaj bildoj. Ĝi estas regalo por fosantaj gramatikistoj. Senrigarde tion, neniu konsideras ke mia intenci estis fari laboron pure filologian, kiu miakrede estas historie kaj sociologie interesega. Mi (plu) ne defendos min mem, cetere. Mia verko min defendos.

Internacia lingvo devas servi kiel vasta bazo por ĉia speco de internacia kompreno, kio signifas kompreneble en la fina analizo ĉian specon de esprimado de la homa spirito.

Edward Sapir en sia verko *International Auxiliary Language*, 1931



2. METODO

2.1 Vortfarado

La lingvistika principo sur kiu apogiĝas Gavaro, ege diferencas de tiu de Popido kaj Arkaika Esperanto. Tiuj-ĉi lastaj du projektoj lasas la zamenhofan lingvon esence netuŝita, aliformante ĝin nur supraĵe, nur laŭaspekte, nur travestie, tiele ke ĉiu ajn Esperantisto — je kondiĉo ke li aŭ ŝi bone regu sian lingvon ! — kapablas apliki ilin en rekorda tempo, per facila ellerno de manpleno da fiksaj reguloj plus limigita vortareto.

Tiuj projektoj ja baziĝas sur plancela aliformigo de tn. “primaria (aŭ gramatika) kategorio” de vortoj — korelativoj, pronomoj, numer-aloj, primariaj sufiksoj — kiuj estas malmultenombraj kaj ofte ripetigas en la lingvo. Gavaro male lasas la primarian kategorion senŝanĝa dum ĝi atakas la “sekondarian (aŭ leksikan) kategorion” de vortoj; tio estas la radikoj ĝenerale — substantivoj, verboj, adjektivoj, sekundariaj sufiksoj — kiuj estas ege multenombraj kaj ne tiel ripetigemaj.

La metodo de Gavaro sekve ne disponigas veran regularon. Rigora gramatiko mankas en ĝi, ĉar la principoj pri (ali)formado de radikoj kaj afiksoj ne tuŝas la sintakson. Tiumaniere Gavaro prezentas tian amason da novaj vortoj kaj esprimoj, ke oni rajtas paroli pri nova vortaro aparta. Ĝi do postulas de interesiĝantoj streĉan parkeradon kaj ampleksan ekzercadon. La vortaro estas nome tiel vasta, almenaŭ en abstrakta principo, ke ĝi ege superus la tutan vortotrezoron de nura koinea Esperanto ! Se ni, por fari tre ĝeneralan kaj tre krudan takson, fiksi la **mezan** kvanton de **eblaj** slangaĵoj (inter kiuj multegaj sinonimoj) por ĉiu normlingva vorto en PIV je kvin, tiukaze elvenus proksimume $15.000 \times 5 = 75.000$ Gavarovortoj ! (La unuaversia PIV ja entenas plus minus 15.000 vortojn, kvankam konsiderinda parto el tiuj ankaŭ estas sciencoteknikaj sinonimoj de ordinaraj vortoj.) Estas evidente ke tia kvanto konsistigus tro da beno ...

Tial mi lasu al verkistoj kaj al tempo la taskon kribri la materialon kaj fiksi ĝin, same kiel okazis kun Esperanto mem, laŭ saĝa plano de ĝia kreinto. Iu nombro da vortoj kaj esprimoj, maltaŭge konstruitaj de iliaj inventintoj, aŭ simple sensukcesaj, malaperus

dum aliaj pro pli ofta ripetado definitive akceptatus kaj ampleksigus. Oni ja ĉi-tie staras antaŭ **provizora** projekto, ellaborita por pleniĝi la aktualan mankon je slango en nia planlingvo, dum ankoraŭ ne estiĝis efektiva “verda socio”, ne koncentrita popolamaso kies dua gepatra lingvo estus Esperanto, kaj el kiu la **naturaj** humuro kaj inventemo naskus **kompletan** slangon vivantan.

Kiam, en alspirata estonteco, la spirita infano de ZAMENHOF vere oficialiĝos kaj estos reale la sola internacia komunikilo de la tuta mondo, tiam elkreskos denature slangaj vortoj kaj esprimoj, kaj jena unu-aŭtora Gavaro perdos sian signifon kaj sian rolon. Sed ĝis tiu momento ĝi povas kaj devus pleniĝi la tiurilate ekzistantan truon, laŭplane kaj intence, kaj servi kiel dumtempa transira ponto.

Aliflanke, mi nepre ne volas pretendi ke mia projekto estas perfekta artverko aŭ miaj aplikprovoj en ĉio majstraĵo. Mi do petas al eventualaj amatoroj ke ili konsideru la ĉienan materialon kiel “fundamenta” en tiu senco, ke ili klopodu krei novan tezaŭron nur, kaj laŭ bezono, por tiuj nocioj kiuj ankoraŭ ne enestas en mia vortaro [p.225-310]. Tiele ĝi servu kiel startlinio, por ebligi metodan (facilan kaj regulan) tradukadon aŭ eĉ originalverkadon de la aparteca slangoliteraturo. Ja, pli bone estas duona ovo ol malplena ŝelo ! Nia normiga PIV ilin estontece listigos laŭ ofteco de aperado, same kiel ĝi jam tute senbrue enprenis vortojn kiel *kibico, ŝlemilo, pisi*.

2.2 Lingvoteknikaj rimedoj

La **lingvoteknikaj rimedoj**, kiujn mi aplikas en Gavaro, estas tiuj kiujn oni retrovas en ĉiuj slangoj kaj ĵargonoj, aŭ almenaŭ certe en tiuj de la “grandaj” lingvoj, kiujn mi tie-ĉi konsideris: angla, rusa, hispana, araba, hebrea, sŭahila. Precipe elstaras **metaforoj kaj mallongigoj**. Parolata lingvaĵo — opone al skribata lingvaĵo — ja nature evitas vortojn kiuj montras kleran aŭ pedantan originon kaj tiujn plisimpligas: *profo* anstataŭ *profesoro*, *diapo* anstataŭ *diapositiva filmo*, *lokoko* anstataŭ *loka kongresa komitato*. En tiu framo mi ankaŭ donis **novajn signifojn al tradiciaj vortoj** — ekzemple *pinĉi* = *ŝteleti*, ĉar neniu lingvo kapablas **en praktiko** havigi apartan vorton al ĉiu ajn ekzistanta objekto, al ĉiu ajn ideo, kaj al varioj de tiuj. Certege ne, se oni

malpermesas aperon de homonimoj pro hazarda kun-metaĵo. Pronecese ĝi devas cedi plurajn kaj plejeble parencajn signifojn al iu donita vorto. Ĉiel ajn, ni devos por ĉiuj Gavaro-elementoj lasi al uzado la zorgon vesti ilin per la bezona solideco, precizigante ilian signifon kaj reguligante ilian nombron.

Plue, la internacia karaktero de Esperanto ne permesas al Gavaro utiligi vortojn kaj esprimojn kun nur loka aŭ ununacia valoro, nekomprenbla aŭ sensignifa ekster tiu rondo. Almenaŭ se ni forlasas la limigitan kadron de ilia nacia-loka-epoka kunteksto. Ekzemple la esprimo “*sub la horloĝo*” por diri “seksmalsana” havis signifon en Amsterdamo, ĉar iam troviĝis tie granda publika horloĝo super la enirejo de medicina ekzamenejo por prostituitinoj. Sed aliloke, kaj sekve fortige sur internacia nivelo, estus vane pruntepreni tiajn esprimojn; oni ne komprenus.

Ni do devas strebi al tio ke koncernaj esprimoj estu sufiĉe ĝeneralaj kaj tamen ankoraŭ sufiĉe sukplenaj. Rilate naciajn **ksenismojn** kiuj same abundas kiel metaforoj, mi konvinkiĝis ke ilia simpla sentraduka adopto en Gavaro, estigus nur konfuzon sen iu ajn avantaĝo. Mi do intence ignoris naciajn slangaĵojn ne troveblajn en ordinara nacilingva vortaro, limigante min al koineaj vortradikoj — el seso da selektitaj lingvoj, kiuj kune kovras pliparton el nia tersurfaco — por ke oni pli facile povu tiujn rekoni ĉe pasiva legado (aŭ diveni ilian originon), kaj mem muldi ilin ĉe aktiva kreado. Evidente, tiuj depruntaĵoj estas kaj estu adaptitaj al la kutima Esperanta ortografio !

Avantaĝo kontraŭe estas ke oni tiel povos utiligi Gavaron sendistinge de loko kaj tempo, sendistinge de popolo kaj epoko, ĉar ĝi ne evoluas — aŭ almenaŭ ne bezonas evolui — rapide, estante ja planlingva projekto por transponti la vakan periodon ĝis tutmonda agnosko de Esperanto. Tiele mia koncerna vortar(et)o estos en tiu interperiodo ĉiam aplikebla, al ĉiu ajn literaturajo, el ĉiu ajn lando, el ĉiu ajn jarcento. Gavaro, kiel planlingva instrumento estas do multe pli elasta kaj universala ol povos esti naturlingvaj slangoj, por traduki slangotekstojn.

Frapan demonstron pri tio, miapense, konsistigas la verkaro de Mark TWAIN, kiu nomiĝis envere Samuel Langhorne CLEMENS. Tiu-ĉi akrapluma ĵurnalisto, eseisto, kaj sprita romanverkisto el Usono — spite siajn ofte bombastan stilon kaj emon al troigado, tipaj por 19-jarcenta Romanecismo — estis admirinda ĵonglanto per la angla lingvo. Mondvaste konata estas lia *La Aventuroj de*

Tom Sawyer, sed plimulto el la tradukoj de tiu-ĉi aventura historio obskurigas la fakton ke la originalo estas parte verkita en usona(j) dialekto(j). Tiu aŭtoro eĉ tiel majstre studis kaj regis la arton de ekzakta redonado de popolaj dirmanieroj kaj lingvodevioj, ke li teksis en daŭrigo de la ĵus menciita romano, nome en *Huckleberry Finn* ne malpli ol 6 tiutempajn idiomojn ! Tio kompreneble formas timigan obstaklon al fidela tradukado el la angla al aliaj lingvoj, sed la afero ankoraŭ eblas en tutkoina versio, kun iom da modlada lerteco, sen pro tio malutili al la rakonto mem.

Male, rilate al lia *Pudd'nhead Wilson* en kiu abundas kaj dialekto kaj slango apud normala angla, la tasko iĝas jam tiel malfacila ke tradukoj de tiu libro apenaŭ ekzistas. Sed la kronon de beletra jonglado per malsamaj sociolektoj, en la longa listo de Twain-romanoj, tamen forkaptas laŭ mi *A Connecticut Yankee at King Arthur's Court* ("Jankio el Connecticut en la Kortego de Reĝo Arturo), kiu romano havigis al nia satiristo la okazon, unue por filozofadi pri la homa naturo kaj la malmoraleco de la homa socio, kaj due por konfronti ne nur la jamajn normalan, dialektan, kaj slangon lingvaĵojn, sed krome ... mezepokan anglan. Kaj ĉi-foje en tia maniero, ke oni plu ne kapablas traduki la tuton per homogene oficiala lingvo, sen sambate kripligi ankaŭ la rakonton mem !

Estas do denove ne mirige, ke kompletaj tradukoj de tiu tre speciala verko apenaŭ ekzistas kaj ke ĝi en praktiko ne estas konata ekster la anglalingva kulturo, se fari escepton pri iuj drastaj resumoj kaj re-rakontoj kaj liberstila filmigo. La defio por traduk-arto estas tie-ĉi ja kolosa. Tamen, nia internacia planlingvo nun disponas, en principo, la bezonajn atutojn por realigi ĝuste tion antaŭ kio eĉ plej fleksebla naturlingvo kapitulacias. Pro tio mi elektis la "Jankion" por fari modestan tradukproveton je mallonga fragmento¹⁶, prefere al la "Pudingokapo" kvankam tiu-ĉi lasta romano estas la pli interesa el pure slangoteknika vidpunkto.

Oni do povas diri ke mia jena projekto ofertas instrumenton, ne nur al verkistoj kaj tradukistoj, por ataki ĝis nun neatakeblan faceton de literaturo, sed ankaŭ al lingvistoj por realigi en sia fako tiun ĝis nun tute neglektitan ĉapitron de kompara lingvistado: **kompara slangostudo !**

16. Legu "La Sankta Fontano" en mia "Arkaika Esperanto, la Verda Pralingvo".

William AULD¹⁷ tute trafe kaj prave emfazis la mankon je vere internacia kompara studado de naciaj beletroj, por kiu celo koncernaj fakuloj tamen disponus — se ili degnus — taŭge adaptitan perilon en la formo de (klasika) Esperanto. Sed interne de tiu nova, dezirinda kaj dezirata studobjekto scienca, profesiuloj nun ankaŭ povus — se ili degnus — disponi taŭge adaptitan perilon por slango en formo de Gavaro. (Same kiel ili disponus pri miaj Popido kaj Arkaika Esperanto por kompara analizado, respektive de naci-lingvaj dialektoj kaj de nacilingvaj praformoj.) Sed jen la demando ... ĉu ili degnas ?

Ĉar estas nur kiam oni, kiel faris mi, provas kompari la slangoformojn en malsamaj lingvoj, ke oni venas al la surpriza konstato ke tiuj kvazaŭ ĉiuj vivadas kaj utiliĝadas, influinte kaj influante unu la aliajn, sen ke koncernaj lingvistoj trapasas la kadron de sia propra medio. (Spite la ekziston de bonegaj etimologiaj esploroj!) Ĉu bojkotado kaj protektadismo ankaŭ sur lingva tereno? Se oni do volas havi informojn sur internacia nivelo, oni devig-atas legi koncernajn verkojn, konsulti koncernajn artikolojn en enciklopedioj, ĉiujn kompreneble en la respektiva nacia lingvo. Eĉ la administrantoj de la famega *Encyclopaedia Britannica*, ĉe peto mia pri konciza listo de slangaj beletraĵoj en eŭropaj lingvoj, aliaj ol la ununura angla aŭ la ununura franca, rifuzis fari la bezonajn esplorojn sub preteksto ke tiu tasko transpasus iliajn kapablojn ! Nu, tiukaze mi certe devas disponi iun miraklofaran lampon de Aladdin ...

Slangostudoj sekve liverus materion ne nur por amuzo sed ankaŭ por serioza laboro profesia !

Konklude, mi pensas utila fari **praktikajn rezervojn** kaj doni averton al tiuj raruloj kiuj tamen kaj efektive ŝatus lerni kaj apliki mian projekton:

Traduki, aŭ originale verki, en Gavaro ne estas laboro por amator-etoj. Ĝi estas tre postulema, komplikita kaj delikata tasko, kiun nur harditaj, spertaj, kaj lertaj scipovantoj de la Internacia Lingvo kapablos preni sur siajn ŝultrojn. Simplige, kvankam kun iom da troigo, oni ja povas diri ke preskaŭ ĉiu aparta vorto aŭ esprimo, necesigas apartan solvon. Kiel mi mem ekkonis en longa, ofte malvenka, luktado kun la problemo, staras centre la paradoksa

17. Per artikolo en *Heroldo de Esperanto*, numero ## de 1975.

regulo ke oni klopodu esti kiel eble plej bone komprenebla.

Oni devas daŭre serĉi kaj inventi rimedojn por modli la originalon tiele, ke ĝiaj frazoj, ke ĝia kunteksto, permesu al sensperta leganto senpere kompreni aŭ almenaŭ sen tro da fortostreĉo diveni la celatan signifon; dum ke oni tamen restas fidela al la originala slangeca farbo.

Traduku originalan ksenismon per gavara ksenismo, originalan metaforon per gavara metaforo, originalan kripligon aŭ inversigon per gavara kripligo aŭ inversigo, originalan kunmetaĵon per gavara kunmetaĵo. Sed faru tion kun la intenco resti klara kaj komprenebla, ne alimaniere. Nur se vi scipovos, balanciĝante sen perdi la egalpezon, tiele dancadi sur la glata traduk-ŝnuro de slanga lingvaĵo, nur tiukaze vi ankaŭ atingos la celpunkton: transdoni la mesaĝon kaj transdoni ĝin sendifekte.

Kaj rilate al la **stilo**: klopodu ke via teksto estu arde vivanta.

Rakonto, kiu **sole kaj nure** konsistus en slangaĵoj, efikus altgrade nenatura kaj malvera, aldone al ĝia fremdigo. Ĝi estus artefarita muntaĵo en kiu la vortosignifoj povas esti ĝustaj — el aferece racia vidpunkto — sed en kiu la aplikomaniero estus absolute falsa. Sekve mia **Ora Konsilo** apliki slangaĵojn ŝpareme, en strategiaj lokoj kaj kvantoj; certe kiom koncernas ksenismojn. Pro tio ke la lingva transportilo minacos krevi sub la tropeza ŝarĝo; alivorte pro tio ke la koineo kiel kadro kaj gvidilo tiukaze malaperos, igante la legadon penega. Kompreneble, se la originalo mem estas volvita en slanga veprejo, apenaŭ malĉifrebla, tiamdo ankaŭ la traduko ne povos ne esti malfacile digestebla.¹⁸ Koncentriĝon de slangaĵoj kiel en “Vagabonda Venĝo” (4.20) aŭ “Cerbumado de Gorilo” en la krestomatia parto, estas kompare esceptoj en nacilingva slangoliteraturo, do estu tio ankaŭ en internacilingva literaturo. Kaj — se oni atente rigardas — eĉ tiuj aperas en formo de monologoj, do ankaŭ ili en dialogspeca prozo por permesi pli facilan digestadon. Evidente, oni povas fari tion intence, por atingi ĝuste ekternormalan etoson, kiel mi mem provis per “El Agendo de Murdisto” (4.5).

18. La mondfama politika verkego de nobelpremiito Aleksandr Solĵenicin, pri la *Gulag-Arkipelago*, estas malfacilege tradukebla ĉar en ĝi svarmas jargonaj kaj slangaj vortoj el la rusa sfero.

2.3 Kiel ne verki slangon

Avertan buon ĉi-rilate mi pruntas de Enno ENDT, kun afabla permeso de tiu eseisto, el *Bargoens en andere ongeschreven sterke taal* (Krimula slango kaj aliaj fortaj lingvaĵoj neskribataj), paĝojn 50-51; en la originala nederlanda unue, en Gavaro poste, kaj en normala Esperanto trie :

De Nachtwerkers

Hein is zwaar *gedallest* maar hij weet wel iets te *snuffelen*. Hij heeft een *klapper afgeroemd* en heeft *sjoeche* van de *stek*, waar de *muziekdoos steunt*. Hij moet nu nog een *gabber* vinden die hem *dekken* kan. Onder de *gelooid pezers* kent hij Klaas nog als een oude *scheffer*. Een *gisse* jongen en beslist *krankiel*.

Samen bekijken ze de *val*. Met een *Engelsman* moet het een makkie zijn om de *pot te kienen*. Ze *maken af* dat Hein de boel zal *opengooien* met de *tandels*, terwijl Klaas intussen *op de span* staat. Hein zal *binnenduiken* en de *tiejjis piekaan* slaan. Als een *grandiger* zijn *scheg* laat zien, wil Klaas het wel op een *geweldje* gooien.

Op de afgeproken avond douwen ze zich *in het pijt*, zoeken de *grammonen* bij elkaar en maken hun *spiesertje*. De *kien-melochem* gaat *kedin*, maar er zit ook nog een *galg* op de deur. Klaas zet dan maar een *vin* in de *wip* en Hein maakt zijn *inspringertje*. Hij geeft net op tijd het *joekel* dat wil aanslaan een *mekajem* op zijn *neut*, dat ie *poep* zegt.

Na een paar uur *nachtwerk* wil de *brandspinozer springen* en het *katje* is een *mazze!* hij houdt een *oksenaar*, een dot *Kesavies* en twee *fokse veemstekers* in zijn *jatten*. Alles in de *meluk* en *pleite* maar !

Het gaat er dan nog om, de *masematte af te stoten* en een *sjerfer* te vinden die de *meker* voor *geslagen schore* geeft, al blijft het altijd een penozeprijs. Het *kloffie* met de *hiepen* en de rest laten ze *zakken*. *Lou bedibberen*, ook niet met je *niese*, want er zit een *kleumerd* van twee *jantjes* in wanneer ze door *gepoekel* toch *verschut* zouden gaan.

La Noktolaboristoj

Hein estas ege *malbogata*, sed li tamen scias kiel *kubutifi* per *robarado*. Li ĵus *prilukis abrigon* kaj li akiris *sprafkojn* ke staras tie *muzikskatolo*. Li devas ankoraŭ trovi *drugon* por *statui*. Inter la *strongaj bubegoj* li memoras Klaas kiel iaman *barilbirdon*. *Ŝruda ĉloveko* kaj certe *sigelita*.

Kune ili *lukadas* la *uĵon*. Helpe de *anglulo* devus esti *ljoĥka ĝobeto krakigi* la *zakriton*. Ili faras *interagreon* ke Hein *ĵetapertos* la *kasaon* per *lĵavoj* dum Klaas *soldatos smotre*. Hein *enplonĝos* kaj *pojmatos* la *skatolon*. Se iu *lico* montrus sian *nukson*, Klaas volonte serĉus *razbojon*.

En la *agreita vespero* ili surmetas la *ĝobovestojn*, *rastas* la *eŝaron* kaj *ekĥoditas*. La *lĵava worko ĥoditas* glate, sed ankoraŭ sidas *zaporo* sur la *flugilo*. Tial Klaas anstataŭe segas *aguĥon* en la *okulsteklon* kaj Hein *plonĝas*. Ĝustatempe li *ĵetas* tian *moloton* kontraŭ la *bulbon* de la *kalbaĉo*, kiu volas *ekakosi*, ke ĝi *diras kak*.

Post unu-du horoj da *krakiga ĝobo* la *brulkameno* apertiĝas kaj la *krastaĵo* estas *ganariga*: li tenas *tikiston*, *bundlegon* da *djengopaperoj* kaj du *goldajn sortiĥojn* en la *handoj*. Ĉio tio en *begon* kaj *runi* nur !

Post tio estas ankoraŭ *dilo* likvidi la *krastaĵon* kaj trovi *fumaĵiston*, kiu pagos la *gugolon* por *kolbasoj*, kvankam ĉiuokaze estos nur *porkrasta* prezo. La *ropaĵojn* kun la *tretantoj* kaj la reston ili *ĵetas* en la *fiŝpudingon*. Nenion *sprafki*, ankaŭ ne al la *mastrino*, ĉar minacas *osujdon* al du *tikedoj*, se oni tamen *ungus* ilin pro *ĉataro*.

La Rompŝtelistoj

Hein estas ege *malriĉa*, sed li tamen scias kiel vivteni sin per ŝtelado. Li ĵus *prispionis loĝejon* kaj akiris informojn ke staras tie *monŝranko*. Li devas ankoraŭ trovi kamaradon por *gardostari*. Inter la *fortikaj viroj* li memoras Klaas kiel iaman *karcerulon*. Ruza ulo kaj certe *fidinda*.

Kune ili observas la *ejon*. Helpe de *angla ŝlosilo* devus esti *facila tasko malfermi* la *ŝloson*. Ili faras *akordon* ke Hein *malŝlosos* la *aferon* per *ŝlosiloj*, dum Klaas *deĵoros garde*. Hein *enŝteliĝos* kaj *akaparos* la *ŝrankon*. Se iu *policano* montrus sian *nazon*, Klaas volonte serĉus *kverelon*.

En la *interkonsentita vespero*, ili surmetas *laborvestojn*, *kolektas* la *ilaron* kaj *ekiras*. La *ŝlosil-laboro* iras glate sed ankoraŭ sidas *riglilo* sur la *pordo*. Tial Klaas anstataŭe segas *truon* en la *fenestrovitro* kaj Hein *enŝteliĝas*. Ĝustatempe li donas tian *baton* kontraŭ la *kapon* de *hundaĉo*, kiu volas *ekboji*, ke ĝi *silentas*.

Post unu-du horoj da romplaboro la brulrezista ŝranko malfermiĝas kaj la rabaĵo estas profitiga: li tenas horloĝon, faskegon da monbiletoj kaj du orajn ringojn en la manoj. Ĉio en sakon kaj fuĝi nur.

Post tio estas ankoraŭ afero likvidi la rabaĵon kaj trovi ricelanton, kiu pagos plej altan prezon por ŝtelitaj varoj, kvankam ĉiukaze estos nur porraba prezo. La vestaĵojn kun la ŝuoj kaj la resto ili ĵetas en la riveron. Nenion komuniki, ankaŭ ne al la edzino, ĉar minacas kondamno al du jaroj da karcerero, se oni tamen arestus ilin pro klaĉado.

* * * * *

La supra modelo estas malbonega pro du motivoj: en ĝi tro abundas slangaĵoj kaj la rakonto mem estas senviva, preskaŭ oficiala raporto. La unua kripleco estas senplie evidenta; mi ne bezonas komenti ĝin. Koncerne la duan: slangaj vortoj kaj esprimoj preskaŭ neniam rolas en serena, priskriba framo. Ili hejmas kaj vivegas nur en vile eposa, dialoga kunteksto. Oni do ne utiligu ilin por pentri la belecojn de montara sunsubiro; oni utiligu ĝin por la ago, la dramo, la emocio, la aĉa kaj fia evento. Eventuale, tiuj povas havi la formon de beletraĵo, kiel mia propra modesta provo “El la Agendo de Murdisto” klopodas demonstri, sed ĝeneralregule rolantoj en slanga historieto ne estu tiaj lignaj poliĉineloj el pupteatro; ili estu vivantaj, baraktantaj, blasfemantaj, blufantaj homoj, kiuj provas ekzorci la minacon de sia momenta situacio, ellasante la bolantan galon de sia animstato tra la valvo de spitante pipra lingvaĵo.

Kaj nun sufiĉe rezoninte. La ĝeneralajn pripensojn, en tiu-ĉi kaj en antaŭaj ĉapitroj, oni trovos pli detalaj kaj aranĝitaj en la sekvanta parto “Metodo”. Carl SANDBERG iam diris ke “slango estas lingvaĵo kiu demetas sian jakon, kraĉas en la manojn kaj eklaboras.”

Do, ek al la laboro !

2.4 Gramatiko kaj Sintakso

2.4.1 RADIKOJ

1. Estas kvar formoj aŭ klasoj de slangoradikoj kaj do ankaŭ kvar teknikoj por ilin krei en Gavaro, laŭ malkreska uz-ordo:

a) Metaforoj (personigo ks.)

musko = hararo

privata okulo = detektivo

b) Vortmiksoj (stumpigo, inversigo)

polo = polico

grapo = grandkapitalo

c) Akronimoj

repa = ripozu-en-paco = morta

d) Ksenismoj (pruntvortoj el fremdaj nacilingvoj)

drugo el rusa “drug” = amiko

Ili ĉiuj apartenas al la kategorio de tn. “leksikaj vortoj”, kompare al “gramatikaj vortoj”, kiuj ne ricevas apartan gavaroformon. [2.4.3.3].

2. La kvanto da klasikmodelaj vortoj (klasoj a,b,c) estas en principo sen limo kaj formiĝas el la fundamenta Esperanto-vortaro.

domo = *budo, kajuto, kesto, tendo* ktp.

3. Krom tiuj klasik-modelaj vortoj, ĉiu nocio rajtas ricevi en Gavaro tri ksenismajn formojn (te. tri fremdajn radikojn de klaso **d**) sed ne pli, adoptitaj kaj adaptitaj el unu el la etalonaj lingvoj: angla, rusa, hispana, hebrea, araba, sŭahila. Tio devas sufiĉi por kovri la bezonon je sinonimoj en tiu-ĉi klaso.

domo = *kasao, zgrado, bajito* (hispana, rusa, hebrea)

4. Por tiu celo oni elektu normalan koinean vorton nacian, sed nepre ne jaman slangovorton, kiu estas multe malpli bone konata kaj kutime eĉ ne trovebla en koncerna vortaro. [2.4.3.2].

Al la nocio “trompi” jes konvenas *decivi* el angla normlingva *to deceive*, sed ne *double-cross*, kiu estas slangoesprimo.

5. Estas neniel devige — nur permesite — elekti fontvorton por kreata gavaroradiko el la sama nacilingvo kiel donita slangaĵo tradukota. Solaj kriterioj por tiu elekto estas prononcebleco, koncizeco, aparteco, de la koncerna radiko.

Por la usonangla *a joint* (ejo, domo) mi prenas kiel tradukon ekzemple *kasao* (el hispana) aŭ *bajito* (el hebrea), sed ne necese *houso* el angla *house*, ĉar prononce malpli alloga.

6. Ĉe apudekzisto de pluraj sinonimoj en Esperanto, por dezirata signifo, oni klopodu preni apogon sur la plej simpla kaj familiara vorto kaj formi la ksenismojn prefere ek-de tiu. (Memoru la 15-an Regulon de la Fundamento.)

Inter “societo, hordo, asocio, bando, federigo, anaro” mi elektis kiel bazon por “bando” la vortojn *mobo* kaj *huligo* tiel ke ekzemple “asociano” iĝas *mobano* aŭ *huligano*.

Inter “asasena, mortiga, murda” mi elektis “mortigi” kiel bazon, kiu siavice kondukas al plisimpla “morti” ek-de kiu lasta devenas *smjerti* kaj *umiri* el la rusa, tiele ke “asasena” iĝas *smjertiga* aŭ *umira*.

7. Ne tre gravas la preciza signifo (semantika enhavo) de nacia fontvorto. Ĝi povas esti jen komplete identa al la dezirata ksenisma gavaroradiko, jen nur proksimume, se nur la baza nocio estas sama. [2.4.3.6]

La verboformo *sfjetli* (lumi), devenas de la rusa substantivo *sfjetl*, do kun identa signifo. La rusdevena *oĉestfo* origine celas specife la familian nomon, sed en Gavaro nur “nomo” ĝenerale.

8. Ankaŭ ne gravas la fakta gramatika strukturo de la nacia fontvorto. Senrigarde ĉu ĝi estas unuradika, derivita, aŭ kunmetita, oni devas doni al responda gavara ksenismo nur tiun gramatikan formon, kiun ĝi ricevas en normala Esperanto. [2.4.3.1 & 2.6.1].

La nocio “virino” povas tradukiĝi ekzemple en franca slango per nekunmetita *moukère*, sed en Gavaro ĝi devas esti derivajo ek-de radiko por “viro”. Sekve aŭ *viruno* (helpe de la gavarosufikso –UN) aŭ *ĉlovekino* (helpe de la fundamenta sufikso –IN).

9. Ksenisma radiko konsistu prefere el nur unu aŭ du silaboj, por ke oni povu limigi la longecon de slangovortaj derivaĵoj kaj kunmetaĵoj.

dinero (monbileto) *snaki* (klaĉi) *aroĥa* (longa)

10. Estas konsilinde adapti fremdajn vortojn laŭ ilia prononco plivole ol laŭ ilia ortografio.

ĝokero aanstataŭ *jokero* por angla *joker*

11. Novovorto (neologismo) anstataŭ koncerna MAL-vorto konsiderindas kiel beletra ĵargono; tial ĝi ekrolas kvazaŭ ksenismoradiko. [2.6.1]

Por “malriĉa” oni havas jaman *povra*, sekve necesas nur pliaj *maskina* kaj *bledna*.

Por “malbona” oni havas jaman *mava*, sekve nur pliaj *sajĝa* kaj *ploĥa*.

12. Stumpigoj, elipsoj, akronimoj kaj tiel plu (klasoj **b,c**) funkcias kiel normalaj ksenismaj radikoj de klaso **d**, ek-de kiuj oni sekve povas fari ankaŭ normalajn derivaĵojn.

grap´ (riĉa) el “grandkapitalo” havigas *grapulo*, *grapigi* ks.

dodeĝo el “domo de ĝuado” havigas *dodeĝulo*, *dodeĝa* ks.

togopo (grava, eminenta) el “Tre Grava Persono” havigas *togopujo*, *togopejo*, *togopajo*, *togopi* ktp.

13. Ksenismoj devas esti laŭeble:

1) sufiĉe malsimilaj inter si kaj ne rilati al jam ekzistantaj koineaj radikoj: *baŝta* (sufiĉa) prefere al *basta*, pro la jama *bast´* (arboŝelo);

2) sufiĉe facile rekoneblaj; tio estas ke la originala vorto nacia devas esti pli malpli facile identigebla, skribe aŭ prononce: *folta* (kulpa) el angla *fault* (kulpo). Oni do nepre evitu adopti vorton kiu jam estas slanga en la fontlingvo !

14. Intence longetajn slangovortojn oni povas traduki, vicigante koncernajn ksenismojn aŭ Espo-vortojn, onomatopee aŭ alimaniere, sed tiu-ĉi rimedo estu escepta [2.5.3 & 2.6.3].

Dica: *hendele mendele* = *miksofikse* (mikspote)
 Germana: *rundamadum* = *ĉirk-ed-ĉirke* (proksimume)
 Franca: *je-m'en-foutiste* = *fekegalisto* (indiferentulo)

2.4.2 AFIKSOJ

- Estas klaso de specialaj sufiksoj, ligendaj ekskluzive al kutimaj radikoj, aŭ eventuale al la unua silabo de propra nomo [2.4.3.8]. Aliloke ili ne estas permesitaj.

sekondariaj

OF	OK	UN	EŜ	UĴ
aĵ	ist	ulin	il	uĵ
	ul	in		ej
	an	istin		
	ant	antin		

primariaj

UM	AL	IZ
o	a	(ig)i

manĝofo (manĝaĵo) *gardoko* (gardisto) *bateŝo* (batilo)
punumo (puno) *durala* (malmola) *pagizi* (pagi)

- Estas ankaŭ du infiksoj, por speciala malrekonebligo, ankaŭ ili aplikendaj al simplaj radikoj normalaj.

-**ERZ**- *ŝt|erz|eli* = ŝteli *v|erz|ulvo* = vulvo
 -**KLA**- *poli|kla|co* = polico *b|akl|ato* = bato

- La suprajn du rimedojn oni ne rajtas utiligi samtempe, sed nur ĉiu aparte.

Sekve nenial *lu|kla|d|uĵ|o* (ludejo) aŭ *ŝt|erz|el|ok|o* (ŝtelisto)

- La sufiksoj rajtas aperi ankaŭ memstare, same kiel iliaj koineaj kolegoj.

tiu oko = tiu ulo *mia eŝo* = mia ilo

- Kompreneble, la klasikaj *FI*- kaj *-AĈ* plu plenumu sian rolon.

laŭplaĉe *fiulo* aŭ *fioko* *mortaĉi* aŭ *repaĉi*

2.4.3 ĜENERALAJĜOJ

1. Gavaro diferencas de la tradicia zamenhofa lingvo per apartaj vortaro, afiksaro, kaj esprimaro. La gramatiko male restas nepre la sama kiel antaŭe.

Ni nomis tion “*fari fulmigon*” montri valorajon.

Tiu *menŝo* (homo) estas pli *ŝruda* (ruza) ol mi supozis.

2. Ĝi estas aplikebla, laŭ la bezono aŭ la intenco, indiferece en fundamente koinea kunteksto, aŭ en dialekta kunteksto, aŭ eĉ en arkaika kunteksto. Slango ja aperas en tiuj tri sociolektoj.

Koinee:	<i>ili prenis la gamboĉaron</i>	} = ili iris piede
Dialekte:	<i>zi prenit lo gamboĉar</i>	
Arkaike:	<i>ilii Gambocharon preniit</i>	

3. Korelativoj, prepozicioj, kaj similaj “gramatikaj vortetoj” nepre ne ricevas specialan Gavaro-formon, ĉar la sistemo aplikiĝas sole al verboj, substantivoj, numeraloj, kaj adjektivoj/adverboj (“leksikaj vortoj”). Anstataŭe funkciu tie-ĉi la sistemo de Popido.

Dica <i>koefnoen</i>	} = “neniom”	} estiĝas <i>nio</i> aŭ <i>niego</i>
Angla <i>nix</i>		
Franca <i>fifre</i>		

Germana *rundamadum* (= ĉirkaŭe) iĝas *ĉirk-ed-ĉirke*

4. Homonimeco kun iu zamenhofa vorto aŭ kun gavera kolego povas ne atendite okazi pro derivado aŭ kunmetado, tiele ke nova gavera vorto konfliktas kun ident-aspekta jama vorto alisignifa; eventuale pro la regulo pri rekonebleco de la novkreito kun ĝia fontradiko [2.4.3.9]. Kiam tiu konflikto prezentas sin, oni klopoĉu eviti la konfuzon. Tamen, ĉar homonimeco estas ne absolute evitebla samkiel ne en nia Fundamenta Esperanto !; oni ne ĉagreniĝu se ĝi ietie ekaperas. Ja temas entute pri nekonvena lingvaĵo.

Konstruante laŭmetode *katuno* (= insidema virino) hazarde el “kat+UN”, oni ne ligu tro da graveco al la fakto ke tiu-ĉi gavarovorto kolizias kun fundamenta “katun’o” (= kotontolo), ĉar la unua “*katuno*” ja ĝuste rolas kiel nenormala, popolaĉa slango.

5. Notindas, ke kunligado de pure fundamentaj radikoj/afiksoj kun gavaraj radikoj/afiksoj, kiu rezultas en mikspoto de malsamnaturaj vorteroj, rekte kontraŭas mian centran lingvonormigan principon, laŭ kiu nur radikoj de sama naturo rajtas kunligiĝi [Universala Esperanto]. Tamen, tie-ĉi ĝi estas permesita, ĉar oni havas aferon kun maltaŭga lingvaĵo en kiu malpli gravas pura ekzakteco (racia apartigo de la terminoj), ol spiceco kaj strangeco.

Franca slango *des fafs* (= dokumentoj aŭ valorpaperoj) povas estiĝi *paperdjengo* aŭ *bumagomono* (ek-de respektive *djengo* = mono, kaj *bumago* = papero), kontraŭe al sciencolingva postulo pri pureco en kiu oni rajtas skribi jen teknike “termonuklea” jen populare “varmokerna” sed nenial “termokerna” aŭ “varmonuklea”. [Universala Esperanto].

6. Kelkafoje slangovorto ne havas precizan signifon, ekzemple iu blasfemo au insulto. Por tiaj oni povas aŭ (a) malkovri ĝian eventualan etimologian originon kaj traduki laŭ tiu, aŭ (b) apliki infikson al konvena proksim-signifa vorto koinea.

1) Dica *sjamfoeter* (malestimindulo) probable devenas de franca *je-m'en-fouteur* (= tio-ne-koncernas-min) kio havigas gavaran *kak-egalisto* ek-de la koncerna germana versio *es ist mir scheissegal* (= al mi estas fek-egale).

2) Dica samvalora *labbekak* kontraŭe havas tre malcertan originon kaj do povas estiĝi ekzemple *viklaro* ek-de “viro+ KLA”.

7. Nacilingva propra nomo, konforme al mia ĝenerala lingvonormiga regularo, restu prefere netuŝita kaj do eniru Gavaron sen ŝanĝo, escepte se ĝi portas eksplicitan signifon. En tiu okazo oni rajtas se bezone traduki ĝin.

Franca *Julot* (= amika Jules) prefere restu *Julot* |ŽYLŬ|.

Germana *Essen*, hispana *Valencia*, tjurka *Erzurum*, kotopo restu prefere senŝanĝaj, sed angla *Fats* (= dikulo) iĝas jen *Tolsĉo* aŭ *Delgado* aŭ restas *Fats*.

8. Slinga derivaĵo aŭ misformaĵo en propra nomo tradukiĝu en Gavaro per aldono de unu el la koncernaj specialaj sufiksoj, ek-de la unua silabo aŭ unuaj literoj kaj laŭ posta skemo:

1) konsonanto(j) plus vokalo(j) = unua silabo plus sufikso:

Sovjetano = *Sovjoko*

Hispano = *Hispoko*

Franco = *Froko*

norvega = *norvala*

Berlino = *Berluĵo*

Mediterraneo = *Meduĵo*

2) vokalo(j) plus konsonanto(j) = tiuj samaj plus sufikso:

Italo = *Itoko*

Atlantiko = *Atluĵo*

arabigi = *arizi*

usonaĵo = *usofo*

3) kunmetita nomo = akronimo plus sufikso:

Sud-Ameriko = *Samoko*

Nord-Afriko = *Nafruĵo*

9. Vortaro pri Gavaro indiku laŭeble la devenon de ksenismoj por ebligi postajn komparon kaj elekton.

ĉorna (= nigra) el rusa ЧОРНИЙ

10. Notendas, ke nia Esperanto-slingo, pro siaj neŭtraleco kaj planiteco mem, rilatas kaj kapablas rilati al ĉiu ajn lando, al ĉiu ajn socio, al ĉiu ajn epoko; dum naciaj slingaĵoj estas ĉenitaj al tre limigitaj tiaj kadroj. Oni do ne konsterniĝu, sed male ĝoju trovante en niaj vortaro kaj esprimaro de Gavaro materialon, kiu en donita fontlingvo jam delonge eksmodiĝis; ĉar tiamaniere nia tradukpovo estas principe senlima.

Angla *to lay someone athwart* = *kuŝigi iun alumede*, nun plu ne estas uzata en la angla ĉar antikva, sed tio neniel malhelpas apliki ĝin en aktuala Gavaro.

11. Pro fonologiaj motivoj, kaj konforme al mia projekto pri Universala Skribo, la litero kaj sono **ŭ** iĝas sensupersigna **w** dum ĉiuj **kv**, **sv**, **tv** en Gavarovortoj iĝas **kw**, **sw**, **tw** aŭ **kf**, **sf**, **tf**.

waĥtisto anstataŭ *ŭaĥtisto*

sfjetli anstataŭ *svjetli*

2.4.4 VORTSERIOJ

Gavaro posedas specialajn vort-seriojn kaj iun nombron da hazarde kreitaj vortoj de sakra naturo, por povi redoni la multe-nombrajn naciajn formojn kun tiu funkcio.

1. SPESOJ

miliardo	<i>Mamuto</i>
miliono	<i>Elefanto</i>
mil	<i>Bizono</i>
cent	<i>Mulo</i>
dek	<i>Azeno</i>
unu	<i>Boko</i>
duono	<i>Kastoro</i>
kvarono	<i>Furo</i>
kvinono	<i>Sciuro</i>
dekono	<i>Rato</i>
centono	<i>Muso</i>

2/5 = *dusciuro* 3 = *triboko*

2. TEMPOJ

jaro	<i>monto</i>
monato	<i>marmoro</i>
semajno	<i>roko</i>
tago	<i>ŝtono</i>
horo	<i>hajlo</i>
minuto	<i>guto</i>
sekundo	<i>polvero</i>

Kondamno al 20 montoj

3. POLICAJ GRADOJ

Cifero + *lico*

prefekto	<i>kvarlico</i>
komisaro	<i>trilico</i>
inspektoro	<i>dulico</i>
brigadiro	<i>unulico</i>
ktp.	<i>ktp.</i>

4. ARMEAJ GRADOJ

Metalo / Cifero + *ciro*

generalo	<i>orciro</i>
kolonelo	<i>arĝentociro</i>
kapitano	<i>kuprociro</i>
leŭtenanto	<i>ferociro</i>
ĉefo	<i>kvarciro</i>
serĝento	<i>triciro</i>
kaporalo	<i>duciro</i>
soldato	<i>nulciro</i>

Kompreneble, tiu-ĉi skemisma metodo volas nur suplementi, en okazo de malfacila tradukeblo, kaj ne anstataŭi la originalojn. Fakta elekto dependas de originala (kun)teksto kaj de persona prefero de la tradukanto, same kiel de la ŝtate malsamaj gradoj.

5. ELKRIOJ

<i>(amen)ulaĥ</i>	=	ne; tio ne interesas min
<i>asbo</i>	=	estas bone
<i>atenoje</i>	=	nekredeble
<i>baŝte</i>	=	sufiĉas
<i>ĉukompras ?</i>	=	ĉu vi komprenas ?
<i>fek!</i>	=	(blasfemo)
<i>grut</i>	=	saluton
<i>kiamas ?</i>	=	kioma horo estas ?
<i>kuŝkuŝ</i>	=	ve ve
<i>naver(njak)je</i>	=	certege
<i>nemiamam</i>	=	neniam ajn
<i>piŝte !</i>	=	ba, fi
<i>poklon</i>	=	adiaŭ
<i>samsam</i>	=	tute same
<i>sanon kaj apetiton</i>	=	jen vi havas

6. SAKROJ

<i>je la sangaj ulceroj !</i>	<i>korpo de porko !</i>
<i>germana sakramento !</i>	<i>je la tondro !</i>
<i>je la sankta nazotruo !</i>	<i>je la potencoj de l'infero !</i>

7. INSULTOJ

<i>pistu cin Petro !</i>	<i>kisu al mi la piedfingrojn !</i>
<i>fiku la kaprinon !</i>	<i>leku mian kakajuton !</i>
<i>ruĝokula kukolo !</i>	<i>lepro putrigu cin !</i>
<i>fridpisanto !</i>	<i>furzo de bufo !</i>
<i>ruĝokula kukolo !</i>	<i>bakita skarabo !</i>
<i>ŝima kataplasmo !</i>	<i>miskurba kukurbo</i>
<i>fojnkapulo !</i>	<i>pistu la kojonojn !</i>
<i>patrinfikisto !</i>	<i>pugolekanto !</i>
<i>senkaculo !</i>	<i>napokapo !</i>

8. ESPRIMOJ

<i>akiri la kukon</i>	=	gajni la premion, venki
<i>deskui siajn pulojn</i>	=	sin vesti
<i>diskrevas mia kolumo</i>	=	mi koleregas
<i>dorloti sian ĉevaleton</i>	=	refali en iun manion
<i>ekspedi al si</i>	=	regali sin per
<i>ellasi la pigon</i>	=	konfesi, malkaŝi
<i>eltiri karoton al iu</i>	=	igi iun konfesi sekreton
<i>elveturi la stacidomon</i>	=	eskapi
<i>engluti la hokon</i>	=	kaptiĝi
<i>estas de mia kakajuto</i>	=	tio estas senvalora
<i>estas la (internacia) ekspreso</i>	=	estas urĝa tempo !
<i>esti en bonaĵoj kun iu</i>	=	havi amikajn rilatojn kun iu
<i>esti en la klubo</i>	=	formi parton de iu bando
<i>estingi ies kandelon</i>	=	mortigi iun
<i>esti nuda je metalo</i>	=	malhavi monon
<i>fari al iu museton</i>	=	doni kiseton al iu
<i>fari la pajloraton</i>	=	resti longe en la lito
<i>fermu la kranon !</i>	=	silentu !
<i>frandi la ĉokoladon</i>	=	koni sian aferon, scipovi
<i>havi blankan piedon</i>	=	havi krediton
<i>havi flavan hepaton</i>	=	esti malkuraĝa
<i>havi la konvulsiojn pro iu</i>	=	timegi iun
<i>iri al la stampo</i>	=	ricevadi helpon de bonfara instanco
<i>irigi la trajnon sur alia trako</i>	=	provi novan taktikon
<i>kirli buteron</i>	=	koiti
<i>klasigi la kartojn</i>	=	ĉesigi laboron
<i>kompletigi la tarantelon</i>	=	festeni ĝisdiboĉe
<i>kovadi ovojn je io</i>	=	esti certa pri
<i>kovi al si splenon</i>	=	estiĝi afliktita, moroza
<i>kunpremi kapokon</i>	=	ruli drogocigaredon
<i>la hepato al mi sekiĝis</i>	=	mi soifegas
<i>malfermi la gasovalvon</i>	=	fuŝigi entreprenon
<i>mia tolaĵo estas lavita</i>	=	mi ne povas plu
<i>mia kranio disfendiĝas</i>	=	mi miregas
<i>mia supo ekbolas</i>	=	mi iĝas senpacienca
<i>mia veziko superplenas</i>	=	tio min tedegas
<i>perdi la rumbon</i>	=	erarvagi
<i>restaŭri sian portreton</i>	=	fari tualeton
<i>sapizi la intestojn</i>	=	festeni
<i>senkotigi la plankon</i>	=	forlasi ejon
<i>stari je ripozo</i>	=	ne moviĝi

<i>stumpigi la tarifon</i>	=	malfari interkonsenton
<i>supren lasi la balonon</i>	=	efektivigi sian intencon
<i>surmeti la kurbotojn</i>	=	fuĝi
<i>ŝmiri ies bekon per mielo</i>	=	iun flati aŭ dorloti
<i>ŝtopi al iu la umbilikon</i>	=	mistrakti iun, primoki iun
<i>teni burĝonon en la branĉo</i>	=	kaŝe observi
<i>trapuŝi (monon)</i>	=	senkontrolate elspezi
<i>turni la halukson</i>	=	fuĝi, malaperi
<i>vagadi en vaporoj</i>	=	esti ebria
<i>verŝi en sian kravaton</i>	=	trinkegi
<i>veturi sur kurba trako</i>	=	agi malhoneste
<i>vidi la rostaĵojn flugi</i>	=	malsategi

9. NOMBROJ

Kie ne eblas eviti la formadon de nombroj, mi ĉerpis el Volapük:

<i>būal</i>	unu	<i>zūul</i>	ok
<i>tūel</i>	du	<i>jūel</i>	naŭ
<i>kūil</i>	tri	<i>dūeg</i>	dek
<i>fūol</i>	kvar		
<i>lūel</i>	kvin		
<i>mūel</i>	ses	<i>tūum</i>	cent
<i>vūel</i>	sep	<i>mlat</i>	mil

2.5 Principo de Simileco

1. Oni klopodu laŭeble konservi la ĝeneralan formon kaj gramatikan funkcion de la originala slangajo. Se verbo, oni traduku per verbo; se tuta esprimo, oni forĝu tutan esprimon; se metaforo, oni redonu ĝin metafore; se inversigo, per inversigo; se ksenismo, per ksenismo; kaj tiel plu. Tio ne necese signifas, ke la traduko estu nepre laŭvorta traduko, sed nur ke ĝi estu sufiĉe simila al la originalo por ke estiĝu prudenta egalpezo inter fideleco kaj komprenebleco. Jen kelkajn ekzemplojn:

- Dica slango *de jongeheer* (laŭvorte “la juna sinjoro” = vira seksorgano) = *la junulo*.
- Dica slango *dakzoek* (anstataŭ ĝusta *zakdoek*) = *toŝpuko* anstataŭ “poŝtuko”.
- Dica *hendele mendele* (= mikspoto) = *miksofikso*.

- Angla slango *to have one's fling* (festeni, diboĉi) = *sapumi la intestojn*.
- Germana slango *der Rebmosche* (levostango de rompŝtelistoj, ek-de "Rabeno Moŝeo") = *la puŝopetro*.

2. Se la senco de la tradukata slangajo, se ĝia aludo, estas sur internacia nivelo same facile komprenebla — aŭ almenaŭ facile divenebla — kiel ĝia nacilingva modelo, tiukaze oni kompreneble nenion bezonas inventi.

- Germana *die Kugel* (laŭvorte nuksoj, beroj) = testikoj = *la kugletoj*.
- Germana *der Gelernter* (= kandidato por krima metio) = *la lernanto*.
- Franca *du raisiné* (laŭvorte "vinberaĵo" = sango) = *vinbersuko*.

3. Kontraŭe, se la aludo estas tro ligita al lokaj aŭ tempaj cirkonstancoj, tiukaze necesas trovi novan similaĵon. Kompreneble, tiu-ĉi redono ne konsistigu en si mem anahronismon aŭ ksenismon por la koncerna teksto !

- Germana *Liechtenstein sein* (laŭvorte "esti de Lihtenŝtajno" = (esti riĉega) = *esti agaĥana* aŭ *esti Agaĥano* (ek-de la riĉega monarĥo Aga Ĥan).
- Germana *ein Linksanwalt* (laŭvorte "maldekstra advokato" = juristo kiu laboras por la kanajlaro) anstataŭ norma *der Rechtsanwalt* ("dekstre" kaj "jure" estante homonimoj en la germana) = *rilatvokato* (ek-de elipso inter "rilato" kaj "advokato").
- Germana *der Morgenstern* (laŭvorte "la matenstelo" = la prizono) = *la betonĉielo*.
- Dica *de Casuaristraat* (strato en Amsterdamo kie situas granda prizono) = internacie *la Malonstrato* (ek-de *malono* = karcero), sed en limigita nacia aŭ loka kadro "La Strato de la Kasuaro".
- Germana *die Kleine Regierung* (nomo de drinkejo en Vieno kie kunvenadis la kanajlaro) = *la Eta Registaro* kun nur strikte limigita, loka valoro en koncerna teksto.
- Angla *to lay someone athwart* en historieto kiu disvolviĝus en la 18-a jarcento aŭ en necivilizita socio, kie alumedoj estus nekonataj, oni ne redonu per la ekzistanta gavara *kuŝigu iun alumedo*, sed prefere per *estingi ies kandelon* aŭ *sendi iun al skeletolando* aŭ simila tuj komprenebla esprimo.

4. Multo evidente dependas de la kunteksto mem kaj en tiu rilato oni devos konsideri iujn slangovortojn kiel proprajn nomojn. Por tiuj-ĉi lastaj validas ia. (laŭ mia lingvonormiga principaro) ke oni akceptu esperantigon nur en limigita kadro. Tio estas: kiam sama nomo estas ofte ripetata interne de sufiĉe

ampleksa teksto, kia romano ekzemple. Tiel same por slango-vorto: se aludo klaras pro firma subteno de kunteksto (aŭ de eventuala marĝena klarigo kia ekzemple piednoto), tiukaze ekzistas neniu danĝero por senpera traduko. Sed tiaj tradukoj normale do ne renkonteblos en la Gavaro-vortaro.

El germana slango:

die Knopfsuppe (fabeclegoma supo) = *la butonsupo*.

der Krautgarten (glaso da brando) = *lunkuglo* aŭ *rakedo*.

ein Kutscher (tre ordinara Mosel-vino) = *ĉaristo* aŭ *koĉero*.

5. Paralele, se la kunteksto firme subtenas, aŭ se la origina aludo estas nepre necesa al la koncerna historieto, tiukaze oni efektive traduku laŭ la originalo mem.

Germana *der Schampus* (la ĉampano) = *la ĉampo* aŭ *ĉampofo*.

Germana *ein Kreuzer* (monero kun kruc-emblemo) = *kruculo*.

6. Aliflanke, se koncerna originalo estas konsiderenda kiel fak-jargona termino, oni povas adopti ĝin sentraduke, laŭ la tradicia asimila metodo. Tio plej facile okazos al ksenismaj terminoj.

Angla *gypsy* (nuklefizika korpusklo, ekde *J* kaj *Psi*) = *ĝipsio* dum laŭvorta traduko havigus *cigano*.

7. Ankaŭ sukplenaj esprimoj kaj interjekcioj rajtas, sed sen devigo, eniri Gavaron senŝange, denove kondiĉe ke ili estu sufiĉe facile kompreneblaj sur internacia nivelo — ĉu pro sia evidenteco, ĉu pro la kunteksto — sen antaŭscio pri lokaj aŭ tempaj situacioj.

- Angla *to trim a sucker* (priŝteli viktimon) = *tondi branocerbon*.

- Franca *avoir quelqu'un à la bonne* (esti amika kun iu) = *esti en bonaĵoj kun iu*.

- Germana *die Klappe halten* (ek/silenti) = *rigli la klapon*.

- Dica *bij de koopvaardij zijn* (esti en prizono) = *esti en la komerca navigado* (longedaŭra).

8. Gramatikaj eraroj en la originalo rajtas, sed ne nepre devas, eniri ankaŭ la tradukon, ĉar ofte tio signifas troigon = malbonigon.

Ekzemple la foresto de akuzativo.

2.6 Principo de Simpleco

1. Ne gravas la demando ĉu la nacia fontvorto, kiun oni elektis por krei gavarano ksenismo-radikon, en si mem estas derivaĵo aŭ kunmetaĵo aŭ ne. Gravas nur la demando ĉu ĝi estas sufiĉe mallonga por obei la postulon pri simpleco. Por la bezonoj de Esperanto-slango oni do konsideru la koncernan fontvorton kiel unuecan blokon.

Ekzemple *napadi* (el rusa нападать) = *ataki*.

2. La multenombraj derivaĵoj (radiko + afikso), kiuj aperas en nacilingva slango, kaj kiuj estas ankaŭ en Esperanto tradukendaj per konformaj derivaĵoj, tradukiĝu antaŭ ĉio per normala, fundamenta radiko, plus koncerna Gavaro-afikso. Nur kiam tiu rimedo plu ne sufiĉas por kovri la eventuale tre grandan kvanton da samstrukturaj sinonimoj en la koncerna teksto, nur tiam oni ekkaptu koncernajn ksenismojn.

- Dica *bikker* (laŭvorte “manĝanto” sed laŭsignife “buŝo”) iĝas en unua fazo *manĝeŝo* (manĝi+*EŜ*) kaj nur en dua fazo *jestilo* (*jesti*+IL) aŭ *komerilo* (*komeri*+IL).

- *Tikilo* prefere al *tikisto* por “horloĝo” ĉar senvivaĵo.

3. Kiam la Esperanto-egalvaloraĵo estas kunmetita vorto, ne necesas fremdigi ĉiun ĝian elementon, sed normale nur unu. Nome la plej signifodonan, se tia elstaras. Je tio oni ankaŭ elektu se eble la plej mallongan radikon el nia slangovortaro [2.4.3.5]. Analoge pri apudigo de vortoj.

La vorto “okulvitroj” (ekzemple en angla slango *specs*) fariĝas ĉu *glazovitroj* (ek-de *glazo* = okulo) ĉu *okulslajsoj* (ek-de *slajso* = tranĉaĵo), sed ne *glazoslajsoj*.

La vorto “mantenilo” (ekzemple por germana slango *der Krossen*) fariĝas *manodjerjilo* (ek-de *djerji* = teni) aŭ *rukatenilo* (ek-de *rukao* = mano), sed ne *rukadjerjilo* aŭ *rukadjerjeŝo*.

Granda polano (policestro) prefere al *noĝa polano*.

4. Komprenoble, se la kunmetita originalo mem estas stilfiguro kaj neniel fremdaĵo, ekzistas neniu motivo por elserĉi konvenan ksenismon en la gavarotraduko.

Dica *geveltoerist* (akrobata romp-ŝtelisto, kiu surgrimpas murojn) = *fasadoturisto*.

2.7 Kritikoj

1. Ĉu necesas havigi gramatikan regularon al lingvaĵo, kiu laŭdifine estas senregula ?

En la estonteco, kiam Esperanto estos uzata senĉese kaj de tutaj homgrupoj, do post kiam ĝi estos “oficialiĝinta”, estas neniu dubo ke komencos aperi slangaĵoj en tute kaprica maniero — almenaŭ se la mondebildo rilate al lingvouzado kaj sociologio estos ankoraŭ sama en la 21-a jarcento kiel ĝis la 20-a. Iom post iom tiuj tiam kreskos nature ĝis tia potenco kaj abundo, ke ili ne povos ne eksmodigi Gavaron kaj finfine igi ĝin eĉ komplete superflua. Sed ... ĝis tiu epoko niaj slangotradukantoj starus kun malplenaj manoj, kaj estus por ili multege pli facile mastri regule strukturitan lingvaĵon ol tute ĥaosan vort-amason. Rilate la povon de laŭplana Gavaro, redoni senplanajn slangaĵojn naciajn, ĝi en tio neniel diferencas de zamenhofa Esperanto frunte al normalaj vortoj aŭ esprimoj naciismaj. La instrumento certe taŭgos ... en la manoj de lerta kaj inventema utiliganto.

2. Ĉu necesas (re)enkonduki vere koherajn vort-listojn ?

La de mi proponataj interligitaj vort-serioj [2.4.4] ne intencas anstataŭi naturajn naciaĵojn, sed nur suplementi ilin en okazoj kie naciaĵo ne estas (bone) tradukebla aŭ ial ne dezirinda. Ekzemple, por la neniosignifaj anglaĵoj *5 quid*, *2 bob*, *30 bucks* (= Pundoj, Ŝilingoj, Dolaroj) oni disponus *5 Muloj*, *2 Azenoj*, *30 Bokoj*, ĉar etimologia deveno restas ekster konsidero por uzantoj. Ksenismoj estas tie-ĉi evitindaj, ĉar ili nur fremdigus la tekston dum skemismaj vortoj pli facile restas en la memoro. Fakta elekto plu dependos de la originala (kun)teksto kaj de la persona prefero de la tradukanto. Ĉe alkutimiĝo tio cetere estos ne pli malnatura ol la fundamentaj elpensitaĵoj de ZAMENHOF.

3. Ĉu ne estas troige preni plurajn vortojn por unu sama gavara ksenismo ?

Ksenismoj estas fremd(aspekt)aj kaj multenombraj el ĉiu ajn vidpunkto. Tiel estas en la naciaj originaloj; tiel neeviteble devos esti ankaŭ en Esperanto. Estas ja ilia naturo kaj ilia celo. Mi mem, pronecese devis antaŭvidi por tradukado 3 ksenismajn radikojn por ĉiu nocio kaj eĉ tiel estis fojfoje malfacile traduki ĉiujn renkontitajn sinonimojn en absolute kontentiga maniero. Oni ja provu traduki abundojn kiaj en la franca: *aspic, fric, grisbi, aspine, pognon, artiche, oseille* ... por la nura signifo "mono". Koncernaj romanoj fojfoje aldonas cetere glosareton por ke laikoj povu kompreni la ksenisman slangon en sia propra gepatra lingvo! La deveno de tiuj vortoj estas cetere malgrava por uzantoj de slango; kontraŭe ilia multeco jes. Tamen, ĉe aplikado de Gavaro, tio ne malhelpas ke oni relative baldaŭ al-kutimiĝas al ofte revenantaj vortoj por nocioj kiaj : *manoj, koiti, ŝteli, polico, trompi, stulta, karcer*o kotopo. Kaj oni ankaŭ ne subtaksu la klarigan subtenon de la kunteksto rilate al pasiva kompreno.

4. Ĉu ne estas tro limige preni kiel fonton por gavaraj ksenismoj nur ses fontlingvojn ?

En la komenco mi planis kaj elprovis kreadon de ksenismoj el nur unu aŭ du nekutimaj fremdlingvoj (Volapük kaj Sūahilo), sed tre baldaŭ mi devis konstati ke en praktiko oni vere bezonas pli vastan aron da fontlingvoj. Okazas ja ne malofte ke tuta vico de lingvoj prezentas saman aŭ ege similan radikon por donita nocio (pro familia interrilato, kaj sur kiu fakto ja apogiĝas naturalismaj planlingvoj). Aliflanke, vortoj el la kutimaj eŭropaj kultursferoj latinidaj estas ofte tro bone konataj aŭ eĉ identaj al normala Esperanto-vorto, por ke ili povu kontentigi la bezonon je ksenismeco. Oni do vole nevole devas serĉi ankaŭ en fontlingvoj ne tuje familiaraj aŭ parencaj al Esperanto. Mi rezonis, ke, se mi prenis lingvojn kiuj estas fremdaj al Esperanto kaj kiuj ĉiu por si kovras grandan areon de la mondo, ke tiam la ŝanco estos relative granda por ke iu gavara ksenismo estos senplie komprenata de konsiderinda nombro da Esperantistoj el la celata mondoparto. Tra la tuta iama Sovjet-Unio kaj la Orient-Eŭropa Bloko, la rusdevena vorteto *ploĥa* (malbona) estos tuje klara, dum la hispandevena *delgada* (dika) en tuta Mez- kaj Sud-Ameriko, kaj araba *tawila* (longa) en ĉiuj islamaj landoj.

5. Ĉu la vortaro pro tio ne iĝos supermezure ampleksa ?

Rilate abundon de ksenismoj, oni rimarku ke ankaŭ pure stil-figuraj dirmanieroj, por donita nocio, diferencas de unu nacilingvo al alia, kaj sekve de tio abundegas. Esperanto ne povos ne akcepti ĉiujn tiujn egalrajte, laŭ la kaprico de ilia apero por tradukado. Por “policano” ekzemple, mi jam renkontis ekvivalentojn kiajn “kaptoviro, platpiedulo, bastonsvingisto, perdriko, oficiro, ŝerifo, drako” en nura manpleno da naturlingvoj. Ankaŭ tie-ĉi ni do devas fidi je kutimo kaj uzado por fari la bezonan selekton.

6. Ĉu tiu aplikado de ksenismoj tute fremdaj al fundamenta Esperanto estas vere nepre necesa ?

Mia regularo devigas nenium al uzado de ksenismoj. La principoj de simileco kaj simpleco estas miaj personaj gvidiloj (konsiloj) en tradukado, sed ĉe reala aplikado ĉiu uzonto de Gavaro evidente mem elektos ĝis kiu grado tiu redonos slangajn fremdvortojn, aŭ ĉu li/ŝi utiligos ilin entute. Se li kapablas fidele traduki per pure klasikaj vortkonstruoj, des pli bone. Mi povas nur antaŭciti la vortojn el mia enkonduko al la Krestomatia Parto: “Ne kritiku en la internacilingva traduko tion kio eventuale estas kritikinda en la nacilingva originalo.”

7. Kial enkonduki la personan pronomon “ci” dum ĝi estas malaperanta aŭ plene malaperinta en aktuala Esperanto ?

Mi (re)enkondukis ĝin, ĉar en pluraj lingvoj la diferenco inter familiara kaj ĝentileca alparoloj ankoraŭ ludas gravan rolon, precipe en dialekto kaj slango, kie ja tre nete sentiĝas la socia kontrasto inter “dece” norma burĝaro kun sia polurita parolmaniero kaj la “senmorala” proletaro kun ties spitema lingvaĵo.

3. TEKNIKAJ TERMINOJ (Ĵargono)

3.1 Antaŭparolo

Paralele al la pli-malpli intenca fremdigo de vortoj, kiu nomiĝas “slango”, manifestiĝas la speciala katgorio de fakterminoj konsistanta ĉu el mallongigoj kiaj UEA, ADN, CIA, FEL, GPS, aŭ el akronimoj-ĥimeraĵoj de la tipo *radaro*, *komsomolo*, *kokoso* — kaj kiuj ĉe mi meritas specife la nomon “ĵargono”.

Do **ne** temas tie-ĉi pri la katgorio de greklatinaj terminoj, kiujn utiligas la sciencoj, kaj kiujn kovras mia *International Terminological Key*, surbaze de plurmilaj specialaj vortradikoj kaj speciala radikaro en la sino de mia Universala Esperanto (Uniespo). **Jes** temas pri teknikaj-profesiaj terminoj, eventuale neologismoj, kiujn oni uzas ekzemple por nomi la konstrupecojn de elektra lokomotivo, aŭ kiujn uzas ekzemple kudristino por doni nomon al la procedoj kaj lertaĵoj de sia okupiĝo. Tiuj-ĉi fakvortoj estiĝas plejparte senorde, laŭhazarde, el diversaj fontoj, sen vera lingva-gramatika rilato unu al la aliaj: *ikono*, *kejlo*, *libido*, *muari*, *orli*, *skarifi* k.t.p. La etimologio de tiaspecaj vortoj — iliaj deveno kaj origina signifo — estas ŝatokupo por filologoj, kiuj en tiu sia fako bezonas scii ne nur kelkajn antikvajn lingvojn, sed ankaŭ multajn nuntempe parolatajn.

Eble menciindas parenteze, ke mia Uniespo provizas du specialajn prefiksojn por marki fremdajn unusilabajn terminojn: *-DWA* por nacikultura specialaĵo kaj *-VWA* por nacihistoria specialaĵo — ekzemple *dwaĉaĉo* kaj *vwabraĉo* (por pivaj “ĉaĉo” kaj “braĉo”). Tiujn mi ne klasigas inter ĵargonaĵoj kaj do ne detaligas tie-ĉi.

Post la dua mondmilito la kvanto da ĵargonaĵoj kreskis, kune kun teknikologio, ĝis giganta amplekso, apenaŭ aŭ plu ne regebla. Ekzemple, la (hodiaŭ jam malnova) kompilaĵo de ROWLEY & SHEPPARD, *Acronyms, initialisms and abbreviations dictionary* [Gale Research Co, Detroit, USA 1984] citas ne malpli ol 300.000 erojn. Ne mirige ke okazas plurobloj de sama aspekto — homonimoj — sed kun malsamaj signifoj. Ili estas ĝenaj, eĉ agacaj, en ĉiu ajn lingvo, sed ne eviteblaj. Ĉiu devas fidi je sia memoro aŭ je iu vortaro de sigloj kaj mallongigoj ... se tia troveblas, ĉar litervortoj

ja tiel rapide kreskas (kaj ankaŭ rapide velkas) ke neniu vortaro sukcesas resti nepre ĝisdata. Eĉ por kompilantoj de tiaĵoj en la Interreto estas senhalta fortostreĉo.

Nu, se ili ne estas eviteblaj — ankaŭ ne en Esperanto — ni zorgu ke almenaŭ la akronimaj kodvortoj:

- 1- ne aspektu kiel mallongigoj,
- 2- rolu kiel normalaj radikoj, facile kombineblaj kaj deriveblaj,
- 3- ne lasu dubon kiamaniere ilin prononci.

La termino “jargono” mem kovras kvar subkatgoriojn:

- 1- sigloj (CO, SAT, UK, BBC, GSM) pri kiuj oni ne povas tuje scii al kiu lingvo ili apartenas;
- 2- akronimoj (*sonaro, Satano, aidoso*);
- 3- ĥimeroj (kunligo de vortpecoj por formi novan vorton);
- 4- anagramoj (intermikso de la sinsekvo de literoj en vorto).

Ankaŭ da tiaj, same kiel da mallongigoj/sigloj mem, aperadas novaj kvazaŭ ĉiutage. Estas pro tio jam antaŭe perdita batalo provi teni ilin absolute ĝisdataj. Eĉ al tio dediĉita retloko de la Interreto — tamen plej potenca kaj plej rapida rimedo kaj medio — ne plene sukcesas, ĉar ĝi ja dependas de la informoj kiujn kontribuantoj volas kaj povas senĉese provizi, kaj de la prizorganta servo, kiu devas ilin kribri kaj envortigi en daŭre fluanta kaj daŭre vastiĝanta tezaŭro.

Nature estas preferinde uzi propre Esperantan jargonismon, anstataŭ nacilingvan, ĉar tiu estas internacie pli klare kaj ankaŭ facile rekonebla. (Marki per o, a, i).

pixel = bildelemento → **bildelo**

juke-box display system = diskara aŭtomata karuselo → **daŭko**

binary digit (bit) = binaria cifero → **bico**

self contained underwater breathing apparatus (scuba) =
aŭtomata subakva spiraparato = “**akvopulmo**”

multirole combat aircraft (MRCA) =
universala batal-aviadoro = **unibavo**

La ĉi-posta listo, laŭhazardo ĉerpita el la vortaro de mia Uniespo, estas sekve nur modelo pri la koncerna vortmaterialo kaj la maniero en kiu oni povus ĝin adapti al Esperanto.

3.2 Mallongigoj

AD Mallongigo por “antaŭdate” = antaŭ la gregoriana jaro nul; anstataŭ “antaŭ Kristo”. → PD

AIKS (medicino) <AIDS> Siglo por: akirebla imunec-kolapsiga sindromo. SG: sekspesto.

AKIR (aviado) <AIRAC> Siglo por: Aeronautikaj Kontrolado, Informado, kaj Reguligado.

ALS <SAL> Siglo por “antilimfocyta serumo”. Ankaŭ: alisero

ANTARES Siglo en geologio por: Antiarktisa Esplorado. Ankaŭ: antareso

ATR <PSTN> (telefono) Siglo por: “analoga telefonreto” = La klasika telefontekniko, kontraste kun la nova IDTT.

ATT Siglo por “aŭtoĉartramo”.

DRS (komputado, medicino) Akronimo por “Difekto pro Ripetata Streĉado” = <*repetitive strain injury*> (RSI).

DTF Siglo en fiziko kaj tekniko por: decentrofuĝa. → ATK

DTR (Informadiko) <ISDN> Siglo por: Diĝitala Telefon-Reto. Rivalo de ATR. → vitrofibro

EEK (komerco) <EEC> Siglo por: Eŭropa Ekonomia Komunumaro.

ESP <PPS> Siglo por: Ekstersensa Perceptado, kio ampleksas telepation, telekinezon, radjestezon, aŭguradon, ktp.

GSH (nuklefiziko) Siglo por: glata somiska hidrodinamiko; <*smooth particle hydrodynamics*>.

HOK (kemio) <HRP> Siglo por: hiperoksidato el krenolo; <*horseradish peroxydate*>.

IFA (fonetiko) <IPA> Siglo por: 1. Internacia Fonetika Asocio. 2. Internacia Fonetika Alfabeto.

ISKI (komputado) <ASCII> Akronimo por: Internacia Simbolara Kodo por Informadiko = maniero por identigi literojn de latina kaj aliaj devenoj.

ISO <ISO-2> Siglo en atronomio kaj spacegesplorado por: Infraruĝa Spacego-Observadejo.

KAD-KAM (komputado) <CAD-CAM> Siglo por: Komputore Asistataj Desegnado kaj Modeligado.

KNS (komputado) [TTT] <DNS> Siglo por: “kampo-nomiza sistemo” = Lingva (kodvorta) enformigo anstataŭ far-de homoj malfacile memor-eblaj kaj pritrakteblaj nombroserioj; precipe anstataŭ la IP.

KĤD <CDQ> Siglo en nuklefiziko por: Kfantuma Ĥromodinamiko = Ĉiuj kwarkoj en sia “protona maro”, kie la “virtualaj glionoj” eliĝas kaj rekreiĝas konstante, kune kun ties-ĉi senĉesa agado.

LPR <LAN> (komputado) Siglo por: “loka privata reto” = Interkonekto de pluraj komputoroj, uzata interne de iu instituto, komerca entrepreno, ks. Ne konfuzenda kun la tutmonda Interreto, kŝankam ĝi utiligas samajn aparatojn kaj programojn.

NGF Siglo en biologio por: neŭrogena faktoro; <*nerve growth factor*>.

OSD <FAQ> (komputado) Siglo por: “ofte starigataj demandoj”.

PD Mallongigo por “post-date” = post la gregoriana jaro nul; anstataŭ “post Kristo”. → AD

PKP <DTP> Siglo por “perkomputora publikado” = hejmpresado.

POP <POP> (Interreto) Siglo por: “Poŝt-Oficeja Protokolo”.

PTD <FTP> (Interreto) Siglo por: “protokolo por transsendo de dosieroj” = Kodaĵo en la komenco de teksaĵloka situigo por anonci kaj identigi adreson ĉe kiu oni povas, ĉu libere kaj anonime ĉu pro

membreco, forŝargi aŭ enŝargi programojn.

ReRe <HiFi> En aŭdvida tekniko: Himeronimo por: realec-redono de muziko kaj parolo.

TK <CC> (Interreto) Siglo por: “trakopio” = Adreso, en la kapo de elpoŝto, de kroma(j) korespondanto(j) kiu(j) ricevu kopion de la koncerna mesaĝo, kion la ĉefadresito povas vidi. → BK

TKP <TCP> Siglo por: “transsendo-kontrola protokolo” = Arbitre interkonsentita kodaĵo por sendado de donitaĵoj tra la Interreto.

TL (Interreto) Teksaĵ-Loko = hejmpaĝo

TLS <URL> Siglo por: “Teksaĵloka Situigo”. Ankaŭ: situadreso, teksaĵloko. → retadreso

TPG <CPU> (komputado) Siglo por: “centra procesora grupo” = la fakta “cerbo” de komputoro.

TSM (telefono) <GSM> Akronimo por: 1. Tergloba Sistemo por Mobila Komunikado (per telefono). 2. La koncerna telefon-aparato = poŝtelefono, “vaganta telefono”

TV Siglo en telekomunikado por televideo [televizio]: 1. La koncerna tekniko ĝenerale. 2. La ricevaparato sola.

TVA Siglo en medicino por: cerbovaskla akcidento = apopleksio. <*cerebro-vascular incident*>.

UN Unuiĝinta Naciaro; <*United Nations Organization*>.

XEN (geometrio) Akronimo por: “X-aksa endektonombro” = La imaga valoro (j) kiu ekestas pro dilatigo aŭ ŝrumpigo de la horizontala akso (absiso) aŭ koncerna radiuso de korpo. → YEN, ZEN

YEN (geometrio) Akronimo por: “Y-aksa endektonombro”. = La imaga valoro (i) kiu ekestas pro dilatigo aŭ ŝrumpigo de la vertikala akso (normalo) aŭ koncerna radiuso de korpo.

3.3 Akronimoj kaj Ĥimeronimoj

acetalko (kemio) < <i>acetal</i> > Ĥimeronimo por: acet-aldehidro + alkoholo.
aĥrylo [akrilo] (kemio) Ĥimeronimo por: aĥroblantylo
aldemethojno (kemio) < <i>aldomedon</i> > Ĥimeronimo por: acet-aldehidro-dymethojno.
aldolo (kemio) Ĥimeronimo por: aldehidra alkoholo.
alifero (medicino) {ALS} <SAL> Ĥimeronimo por: anti-limfocyta serumo.
almitydo (kemio) < <i>prehnitic acid</i> > Ĥimeronimo por: almokalcita acido.
amokuksido (kemio) Ĥimeronimo por: amonja kuprohydr-oksido; reagento de SCHWEIZER.
anadisoro (Interreto) < <i>modem</i> > Ĥimeronimo por: “analoga/diskrimina oro” = Elektronika aparato kiu transformas ...
atefo {ATFR} <AFTN> Akronimo en telekomunikado kaj aeronauĵiko por: Aeronauĵika Telekomunikada Fiksreto.
atrojno (kemio) < <i>tropone</i> > Ĥimeronimo por: atropurino + ketojno.
benzaldo < <i>benzal</i> > Ĥimeronimo el: benzaldehidro.
besamaviso {BEAMVS} <Biomass> Akronimo de: Biologia Esplorado de Antiarktisaj Maraj Vivantaro kaj Sistemo.
betatrono (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: Betasomiska ciklotrono.
biklo [ciklo-5] Populara mallongigo por binaciklo; ankaŭ: durado, feruma ĉevaleta, pedalezo. → aŭto
biklomo Stumpvorto por biklomotoro.
bilasto Ĵargone por bilard-bastono.
bimareso <IRM> Ĥimeronimo por: bildigo per magneta re-sonado.
burotoro (komputado) < <i>desktop</i> > Ĥimeronimo por “buroa komputoro” = komputoro sufiĉe granda (mebloformata), kiun oni devas meti kaj utiligi sur labortablo, pro ĉiuj ĝiaj periferaj aparatoj. → genutoro, horlotoro, polmotoro
buso Populara mallongigo por aŭtobuso. → trolebuso
bynakaŭĉuko (kemio) Bytrodyejno + natrumo.

camoj (biologio) Ĥimeronimo por: cytadheraj molekuloj; < <i>cell adhesion molecules</i> >.
cokju! (tel) < <i>hello</i> > Alvoko en telefonado aŭ radjo-komunikado por altri atenton de eventuala aŭskultanto: “Cokju, Aglo vokas la bazon!” Akronimo por la internacia simbolo CQ.
cys(pek)org(ent)o (kemio) < <i>cyssor</i> > Ĥimeronimo en organaĵa kemio por: cystenospecifa kejifo per organaĵa antiakcento. < <i>cysteine specific scission by organic reagent</i> >.
ĉamo <RAM> En komputorado: ĉiuloke alirebla memoro; < <i>random access memory</i> >. → nemomo
ĉiklotrono (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: “ĉikla akcelatoro de elektronoj”. <u>betatrono, kosmotrono, synĥronociklotrono</u>
ĉitabo (trafiko) < <i>jeep</i> > Ĥimeronimo por: ĉiuterena aŭtomobilo.
daseko (aviado) {DAE} < <i>JATO</i> > Ĥimeronimo pri pelmotoroj: Duzmotore Asistata Ekflugo. → dasek-botelo
deĥalejno (kemio) [dekaleno] Ĥimeronimo por:
diapo Stumpvorto por: diapozitiv(a film)o = lumbildo.
digi'tokseno (farmacio) [digitoksino] Ĥimeronimo por: Digitalla tokseno.
Dilitro (komputado) {DLT} < <i>DLT</i> > Akronimo por: Distributita Lingvo-Tradukado = (parte) aŭtomata tradukado.
dinamo (tekniko) Stumpvorto por dinamomotoro.
distradio (radio) Ĥimeronimo por: distribureta radiotekniko = kablareto; < <i>wire-broadcasting</i> >. Poste ankaŭ por televido.
ditetsiso (med) {DTS} < <i>TTS</i> > Ĥimeronimo por: Diaderma Terapika Sistemo. (<i>Transdermal therapeutic system</i>) SG: sorboplastro.
dokrynaco (bio) {DNA} Ĥimeronimo por: dezoksorybo-nuklea acido. Grupo de ĉelnukleaj acidoj, gravaj substancoj de la ĉela kerno, de kromateno kaj de la kromosomoj; ĉenego da genetoj. → rynaco, kodono
duzmavo < <i>jet-plane</i> > (aviado) Ĥimeronimo por: duzmotora aviatoro.
efolidoj {EFL} Ĥimeronimo en organaĵa kemio por: Esencaĵaj Fosfolipidoj.

ĉhn- (kemio) Stumpvorto por: najbara aŭ duobla ligo. djosomeĥnolo.
ekwinapo (medicino) {EKIA} <SQUID> Ĥimeronimo por: Ekstrakonduka Kfantum-Intrafora Aparato, por forte amplifadi ŝanĝiĝojn de elektromagnetecaj kampetoj en vivanta organaĵo, specife tiajn en la cerbo.
elangeto [elastaĵo] Ĥimeronimo por: elasta (kaŭĉuka) ringeto.
elastekso (teksado) Ĥimeronimo por: elasta teksaĵo = ŝtofo interplektita kun latekso.
elastomero (kemio) Ĥimeronimo por: elasta polimero.
elebekartekso <elplacarnet> Ĥimeronimo en kemio kaj kristaliko por: elementaj ebenajaj karbon-teksaĵoj.
elektrekuti [elektroekzekuti] Ĥimeronimo por: ekzekuti per elektro.
elengro (medicino) {EEG} Akronimo en cerbo-esplorado por: elektroendocefalografaro.
elkompo <elco-1> Ĥimeronimo en elektroniko por: elektronika komponanto.
elkondo <elco-2> Ĥimeronimo en elektroniko por: elektroliza kondensetro.
ergo <labo> Stumpvorto por: ergagoro.
esoeso (navigado, telegrafio) Siglonimo de la morsa kodo SOS <save our ship> = savu nian ŝipon.
Espo Stumpvorto por “Esperanto”.
fago Stumpvorto por: bakterifago.
fantascienco (literaturo) [sciencfikcio] Ĥimeronimo por: fantazia scienco aŭ scienca fantazio.
fifomiko (astronomio) {FIM} <SIM> Ĥimeronimo por: fotopokla intraforodetiko; <speckle interferometry>.
fleto (tekniko) <hosepipe> Ĥimeronimo por: fleksebla tubo. flethaspelo, fletoĉareto, ĝardenfleto, suĉfleto
flumoco (oceanografio) {FMO} <FOM> Ĥimeronimo por: Fluado de Materio en la Oceanoj.
fraseki [nokaŭti] (sporto) Ĥimeronimo por: frapi senkonscia.
funebo (meteorologio) <smog> Ĥimeronimo por: fumo kaj

nebululo = Nebulo densigita kaj malpurigita far-de fumo kaj ĉiaspecaj kemiaj ellasaĵoj en la atmosfero, jen pro tro intensa trafiko, jen pro troa industria centrigo.
gakvatro (atronomio) [kvazaro] {GKR} Ĥimeronimo en radioastronomio por: galaksia kvazaŭ-stela radiofonto.
gimnalo (sporto) [ĝimkano] Ĥimeronimo por: gimnastika olimpialo.
gloplo Ĥimeronimo por globet-plumo, plej konata en Eŭropo kiel “bic”, pro ĝia lanĉo sur la merkato de la firmao BIC.
glykoksyaldo [glioksalto] Ĥimeronimo por: glykolo + oksydo + ald-
goro Stumpvorto por: ergagoro
ĝepedo (instruado) Ĥimeronimo por: ĝenerala pedagogo = instruisto, kiu rajtas instrui ajnan fakon de koncerna instrueja programo, sed kiu ne estas oficiala specialisto pri ĝi. → spepedo
hadel-koliziatoro (nuklefiziko) Ĥimeronime por: ringoforma akcelatoro kiu koliziigas hadronojn kaj elektronojn. <D: <i>Hadronen-Elektronen Ring-Anlage</i> >
harmorgo [harmoniumo] (muziko) Ĥimeronimo por: harmona + orgeno.
hemo (biologio) Stumpvorto por: hematoglobuleno.
heterodina (radjo) Stumpvorto por: heterodinama = superpozicia. heterodinoro [heterodino] Radjoaparato kun heterodinama cirkvita kuplo. → neŭtrodinoro
hibebo Ĥimeronimo por hibrida bovo: hinda bovo + eŭropa bovo.
homikovo (medicino) {HIKV} <HIV> Ĥimeronimo en infektomalsanoj por: Homa Imunec-Kolapsiga Virus, kaŭzo de AIKS.
horidetro (radio) Ĥimeronimo por: horizontale deturna transformetro; < <i>fly-back transformer</i> >.
horisfero (geometrio) Ĥimeronimo por: horizontosfero = Geometria sfero kun nefinica radiuso, law ne-eŭklejda sistemo; elpensita de BOLYAI.
hydrindejno (kemio) Ĥimeronimo por: hydrogenizita indigejno.
ico (elektroniko) <IC> Ĥimeronimo por: integrigita cirkvitaro = blato-2.

inkomelo (nutrado) [blanka budeno] Ĥimeronimo por: intestaĵo + kokinaĵo + lakto; ankaŭ: blanka kolbaso.

irafo (atronomio) {IRF} <IRS> Ĥimeronimo en astrofiziko por: infraruĝe radjanta fonto.

irsto (atronomio) {IRST} <IST> Siglonimo por: infraruĝa spac-egoteleskopo.

isobono (prs) {ISBN} Siglonimo por: Internacia Sistema Biblio-grafia Numero = maniero por senerare identigi publicaĵojn.

kadypidako <*moffet*> [geologio] Ĥimeronimo por atmopidako, kiu eligadas karbodyoksidon. → gejsero, sulfopidako

kalafono (muziko) Ĥimeronimo por: kalabasa ksylofono.

kantaklo <*musical*> Ĥimeronimo el “kantata spektaklo”.

karbekvo (komputoro) Ĥimeronimo por: komputoro kun arbitra sinsekvo <*arbitrary sequence computer*>

kargipo (navigado) <*cargo*> Ĥimeronimo por: kargaĵoŝipo.

katajono (elektroniko) [katjono] <*cathion*> Ĥimeronimo por: “kataoda jono”; negative ŝargita materiero en radjofonia tubo.

kerameto (tekniko) <*cermet*> Ĥimeronimo por: keramikaĵo kun metalo.

kinio (teatro) Populara stumpvorto por la mem jam ĵargona “kinemo”.

kinemo [kino] Stumpvorto por: kinematografo = eksmoda vorto por film(prezentad)o.

kinemaskopo [kinoskop] <*Cinemascope*>.

kolatado (medicino) {KLT} <France *TACO*> Ĥimeronimo por: Komputorigita Laŭaksa Tomografado. → kotomifo

kombagro (agrokultivado) [kombajno] Ĥimeronimo por: kombinita agrokultivada maŝino, kiu kapablas plenumi plurajn taskojn surkampe.

kompisko <*CD*> (komputoro) Ĥimeronimo por: “kompakta disko”. Ĝi povas esti nur legebla <*rom*>, unufoje surskribebla <*worm*>, aŭ multfoje surskribebla <*rewritable*>.

konkremuro (geologio) [konkremento] Ĥimeronimo por: konkret-igita sedimuro = Kuniĝo (kompaktiĝo) de mineraloj, kutime en kuglo- aŭ elipsforma korpo ene de sedimuraj rokoj, kaj

diferencanta de ili per aliaj strukturo kaj konsisto. {B.G.}
konstino (kinemo) [kontinuistino] Ĥimeronimo por: konstant-igistino.
kotomifo (medicino) {KTIF} <SPECT> Ĥimeronimo por: Komputorigita Tomografio per Individuaj Fotonoj. → kolatado
kricolo (anatomio) [kriko-2] Ĥimeronimo por: kricofarmacia muskolo.
kuĉiro (radjo) {KTR} <VOR> Ĥimeronimo por: kurt-distanca ĉiudirekta radjado.
kultivaro (agrokultivado) Ĥimeronimo por „kultivada vario“ = vario de iu specio, precipe de frukto aŭ legomo, ne trovebla en la naturo sed kreita per interbredado aŭ genetika procedo.
kutakco (medicino) Ĥimeronimo por: kutikla antiakco = reago de la haŭto al ...
laktanido <lactide> (kemio) Ĥimeronimo por: lakto + anhidrido.
laktolo <lactol> (kemio) Ĥimeronimo por: laktovno + alkoholo.
lasero (tekniko) Akronimo por: Lum-onda Amplifado per Stimulata Elsendado de Radjado = → lebipi
lavelvo [lavabo] Ĥimeronimo por: lavopelvo.
lebipi (tekniko) Ĥimeronimo por: lasera eĥobirpejli = Elektronike eĥobirpejladi per generado de laser-radjaĵo. → rabipi
lejkomano (kemio) [leŭkomino] Ĥimeronimo por: lejko-ptomano.
lemdo (elektroniko) <LED> Ĥimeronimo por: lum-emisia dyodo; <light emitting diode.> → likrelmo
likrelmo (elektroniko) <LCD> LKE: Ĥimeronimo por: likfakristala elmonro; <liquid crystal display>. → lemdo
lizadamo (farmacio) {LADA} <LSD> Ĥimeronimo por: lizerg-acido-dyetylamido = haluciniga substanco.
maĥnalmo (industrio) [magnalio] Ĥimeronimo por alojto el maĥnezo plus almino.
masero (elektroniko) Akronimo por: mikr'onda amplifado per stimulata elsendado de radiado. → lasero
maviko (video) Ĥimeronimo por: magneteca videala kameruro;

< <i>magnetic video camera</i> >.
meduko (elektroniko) Ĥimeronimo por: metaloksida duonkonduketro. < <i>metal oxide semiconductor</i> >.
merfeno (kemio) < <i>mercaptan</i> > Ĥimeronimo por: merkursulfur-eno; ankaŭ: tiĥolo.
meserbo (komerco) < <i>self-service</i> > Ĥimeronimo por: memserva butikoj = restoracio kie la klientoj mem elektas kaj elprenas jam antaŭe preparitajn pladojn kaj tiujn portas al sia tablo.
metofetro (muziko) < <i>vibraphone</i> > Ĥimeronimo por: metala ksylofonetro.
mikro'filmo (fotografio) Ĥimeronimo por: mikrolatia filmo.
miksaklo (teatro) [revuo-4] < <i>pantomime, revue</i> > Ĥimeronimo por: miksita spektaklo = prezentado de skeĉaro kun deklamado, kantado, kaj dancado. → terpsotyĥo
mimasoj (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: malforte interagantaj masivaj somiskoj; < <i>weakly interacting massive particles</i> >.
minibavo (vestado) [bikino] Ĥimeronimo por: minimala banvesto. → unubavo, nulbavo
mitrizeto (militado) [mitrajleto] Ĥimeronimo por: mitralizezeto = malgranda, senafusta, facile portebla mitralizezo.
modenoro (komputoro) < <i>modem</i> > Ĥimeronimo por: modulatoro + dezmodulatoro = aparato kiu kapablas moduli kaj dezmoduli signalojn, alidire transformi diĝitalajn signalojn en analogajn kaj inverse, por ligi komputoron al (analogaj) telefonreto.
mofekuso (politiko) Eventuale estonteca formo de Unesco: Monda Federalio por Kulturoj kaj Sciencoj.
mokelo (industrio) [monel-] Ĥimeronimo por alujo de moljibdo + nikelo.
moksuko (elektroniko) Ĥimeronimo por: meteorologia semikonduketro < <i>meteorological oxide semiconductor</i> >.
monalejo (komerco) Ĥimeronimo por: moner-aŭtomato-lavejo. < <i>coin-operated laundry</i> >.
mutaroto (gemetrio) Ĥimeronimo por: (kombinita) mutacio kaj rotacio de iu objekto en la spaco.
naftacejno < <i>naphdacene</i> > (kemio) Ĥimeronimo por: naftyrejno +

antracejno.

negatono (nuklefiziko) [negatono] Ĥimeronimo por: negativa + -ON; elektromagneta inverso de protono.

negatrono (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: negativotrono.

nemomo (komputoro) {NMM} <ROM> Ĥimeronimo por: ne modifebla memoro. → ĉamo

nifo (esoterio) <UFO> Akronimo por: “Ne-Identigebla Fluganta Objekto” ankaŭ: fluganta telero

nulbavo (teksado) <nixkini> Ĥimeronimo por: nula banvesto = tute nuda. → minibavo, unubavo

numareso (nuklefiziko) <NMR> Ĥimeronimo por: nuklefizika magneteca resonado; <nuclear magnetic resonance>.

objenso (optiko) [objektivo] Ĥimeronimo por: objekt-lenso
→ teleobjenso

ombristraco (meteorologio) <nimbostratus> Ĥimeronimo por: ombrinefela straconefelo.

ometito <QL> (kemio, militado) Antaŭfazo de nervogaso, kiu nur bezonas aldonon de sulfuro por estiĝi aktiva = oks-etjyl-dven-dy-izo-propyl-amejn-etjyla met-ĥyl-fosfon-ito. → binaario-

omnibuso (trafiko) Ĥimeronimo por: omniała aŭtobuso = por ajnaj okazaj veturotoj; ANK: lajnobuso.

opiscigi Ĥimeronimo por: opiscosynĥronigi.

optikigro (komputoro) Ĥimeronimo por: optika identigado de grafejmtoj, por aŭtomate legigi tekstojn helpe de skanoro. <optical character recognition>. → gignoshoro

orĥostereono [testosterono] Ĥimeronimo por: orĥostereoĵda hormono.

paksorfaso (kristalografio) Ĥimeronimo por: plivastigita ensorbado de ikso-radĵaĵoj en fajnstukturoj; <extended x-ray absorption in fine structure>

papomobilo (katolikismo) <popemobile> Ĥimeronimo por: papala aŭtomobilo = Speciala “montrofenestra” aŭtomobilo per kiu oni veturigas la Papon dum publikaj vizitoj ekster la Vatikano; moderna versio de la iama palankeno (*Sedes gestatoria*).

parako (militado) Stumpvorto por: parakado aŭ parakadisto.

paratrupo (militado) <paratroops> Ĥimeronimo por: parakadista

trupo.

parkoko (teatro) [parkokinejo] <*drive-in*> Ĥimeronimo por: parkokinemejo.

penalojo (industrio) [permalojo] Ĥimeronimo por: penetrebla alojoo = Alojoo el nikelo kaj ferumo, tre penetrebla por magneteco kaj elektro, alidire kun malalta rezistanco kaj tial utiligata en tradiciaj telegrafkabloj; aktuale anstataŭigataj per vitrofibraj kabloj.

pentatydo (farmacio) [pentotalo] Ĥimeronimo por: penta-barbitydo.

perinyleno (kemio) <*perylene*> Ĥimeronimo por: peri-dy-naftyl-eno.

pfenojoo <*phenone*> Ĥimeronimo por: pfenyla ketojoo.

pfenantrejo [fenantreno] (kemio) Ĥimeronimo por: dy-pfenyl-antraceno.

piono (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: Pi-medzoo.

pinalso (aviado) Ĥimeronimo por: perinstrumenta alteriĝo-sistemo; <*instrument landing system*>.

piteŝoo (nuklefiziko) Akronimo por: Pseŭdosomiska Injekta Tunel-Efika Ŝaltetro; <*quasi corpuscular injecting tunnel effect = quiteron*>. → kryotrooo

pitevo (virusologio) Axronimo por: Per Iĥsodo Transmetata Endocefalajta Virusoo; <*tick born encephalitic virus*>.

pivalydo (kemio) <*pivalic acid*> Ĥimeronimo por: pinakolovno + valerydo.

plaĉaro (trafiko) <*dolly*> Ĥimeronimo por: platforma ĉareto.

pneŭmo (trafiko) [pneŭo] Stumpvorto por: pneŭmala bendo.

pneŭmeŝoo (industrio) <F: *pneumatique*> Ĥimeronimo por: pneŭmala depeŝaĵoo.

polmotoro (kmp) <*palmtop*> Ĥimeronimo por “polma komputoro” = komputoro tiom plata kaj malgranda kiom poŝlibro, pro kio oni kapablas meti ĝin en la poŝon kaj teni en unu mano. → burotoro, genutoro, horlotoro,

poŝardo Ĥimeronimo por “poŝbilaroo”

poteso (oftalmologio) Ĥimeronimo por: porokula terapia sistemo; <*ocular therapeutic system*>.

potetro (elektroniko) Ĥimeronimo por: potencumometro.

pozetosko (elektroniko) Ĥimeronimo por: pozitron-emisada tomo-skintilografado = komputore asistata esplorado de molaj organoj, precipe de la cerbo; <*positron emission scintigraphy*>,
pozitono (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: pozitiva ono.
pozitrono (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: pozitiva elektrono.
priseko (ekonomio) Ĥimeronimo por: privata sektoro.
profo Stumpvorto por: 1. (instruado) Profesoro. 2. (sporto) Profesia sportisto, male al nur amatora.
propiarĝolo <*propargyl*> (kemio) Ĥimeronimo por: proto-piŝydo + arĝentolo.
protiso <*prion*> (kemio, bakteriologio) Ĥimeronimo por: protejna infekta somisko.
pulsaro (atronomio) <*pulsar*> Ĥimeronimo por: pulsanta radiostelo.
rabipi (elektroniko) Ĥimeronimo por: radjo-eĥobirpejladi. → sobipi
rektovro (komputoro) <*macro*> Ĥimeronimo por: “rekt-alira manovro”. → funkcia klavo
reprografiko (presado) Ĥimeronimo por: reprodukta grafiko.
ridzilo (tekniko) Stumpvorto por: ridz(alig)ilo.
ridzil-inditso [radikindico]
ridzil-industrio [radikindustrio]
rivoci [konkurenci] (kom) Ĥimeronimo por: rivala negocado.
rokmo (medicino) <*REM*> Ĥimeronimo en cerb-esplorado por: Rapidaj Okul-Moviĝoj = plej profunda fazo de la dormo, kiu indikas ke la dormanto sonĝas.
rul(ibal)o (muziko) Ĥimeronimo por: ruliĝi kaj balanciĝi = Muzikstilo inter ĝazo kaj popo el la 50-aj jaroj de la 20a jt; <*rock and roll*>.
rynaco (biologio) <*RNA*> Ĥimeronimo en cytologio por: rybo-nuklefizika acido. → dokrynaco, rybosomo
rynukaco (biologio) {RNA} Ĥimeronimo por: rybonuklea acido.
sakobo (nutrado) [budeno] Ĥimeronimo por: sangokolbaso.
seloksigo (kemio) Ĥimeronimo por: selekta oksidigo (laŭ LALANCETTE).
sentolo (Interreto) <*smiley*> Ĥimeronimo por: “sentesprima simbolo” → siglo
setermono (biologio) <*termona*> Ĥimeronimo por: seks-determina

hormono.

sikaneso {SKAE} En geologio kaj aliaj: Scienca Komitato pri Antiarktisa Esplorado; <*scientific committee on antarctic research*>.

silalminito (min) {SiAl} Silico plus almino.

silomahŝnito (min) {SiMg} Silico plus mahŝnezo.

sobipo (radio) Ĥimeronimo por: sona eĥobirpejlado = elek-tronika eĥobirpejlado per son-generado. → lebipi, sobiporo

soremo (nuklefiziko) Ĥimeronimo por: somiske induktita rentĥen-emisiado = procedo por analizi ercojn ks; <*particle induced x-ray emission*>.

soso <*know-how*> Akronimo por scio + sperto.

sovĥozo (marksismo) Ĥimeronimo por: sovjeta kolĥozo = kolektiva agrokultivada entrepreno, kreita en Sovjet-Unio.

spepedo (instruado) Ĥimeronimo por: specialista pedagogo = instruisto, kiu specialigis sin pri unu aŭ kelkaj kunapartenaj fakoj.
→ ĝepedo

stegrado [ofseto] Ĥimeronimo por: stearografado

stekfastero (ast) {SSR} <*QSS*> Ĥimeronimo en radjastr-onomio por: stela kfazaŭstela radiofonto. → gakfastero

stekfatro (atronomio) {KSR} <*QSO*> [kvazaro] Ĥimeronimo en radioastronomio por: kfazaŭstela radiofonto. → gakfatro

steno (lingviko) Stumpvorto por: stenografado.

stradefio (militado) <SDI> Ĥimeronimo por: Strategia Defenda Inciato; <*strategic defense initiative*>. Usona kamuflada esprimo por instalado de komputore stirata spacega artilerio; SG: stelmilito, spacegomilito, spacegoŝildo.

superfigezo (tekniko) Ĥimeronimo por: superrapida centrifuĝigezo. <*F: ultracentrifuge*>

synpemo (anatomio) [simpato] Ĥimeronimo por: synpata nervo-sistemo.

tefluro <*teflon*>(kemio) Ĥimeronimo por: tetrafluwetjyleno + UR

terpeftalydo <*terephthalic acid*> (kemio) Ĥimeronimo por: terpenteno + ftalydo.

terpylejno (kemio) <*terylene*> Ĥimeronimo por: terpentonaft-urydo + etjylejno.

tesmoko (telekomunikado) <GSM> Ĥimeronimo por: tergloba

sistemo por mobila komunikado; <global system for mobile communication>. SG: vaganta telefono

tetraftureno [tetraleno] (kemio) Ĥimeronimo por: tetrahydro-naftureno.

tiĥamino [tiamino] Ĥimeronimo por: tiĥovitamino.

tiĥopentatydo (kemio) <thiopental> Ĥimeronimo por: tiĥopenta barbitydo; $C_{11}H_{18}N_2O_2S$. → pentatydo

tovo (elektroniko) Ĥimeronimo por: televideo.

toto (ludoj) <pools> Stumpvorto por: 1. totaligezo = vet-prognoza aparato. 2. la koncerna vetado mem. → futbala, biklada, ĉevalkura

traganteno [traganto] Ĥimeronimo por: tragakanteno.

tragomeo [tragikomedio] (teatro) Ĥimeronimo por: tragedia komedio.

transetro (elektroniko) [transistoro-1] Ĥimeronimo por: transmeta rezistetro.

transkapetro Ĥimeronimo por: transkapa projekcetro.

transtoro (elektroniko) <transducer> Ĥimeronimo por: transforma induktoro.

trizi (bot) [prikli] Ĥimeronimo por: transplantizi = plantizi en alian lokon junan planton ĵus produktitan.

tryleno <trylene> Ĥimeronimo por: trykloretjyleno.

turbinoĝeto <turbojet> (aviado) Retroakce movata flugmaŝino.

turbipropro (aviado) <turboprop> Ĥimeronimo por: turbina propulsoro.

udato <marine> Ĥimeronimo por: universala soldato = Elita armeano, kapabla servadi tiel surtere kiel surmare kaj enaere.

unditero (telefonado) {UDTR} Ĥimeronimo por: Universala Diĝitala Telefon-Reto; <integrated services digital network>.

unimago (komerco) [supermerkato] Ĥimeronimo por: universala magazeno = ĉiovendejo, butikego.

univo (instruado) Populara stumpvorto por: universitato.

uvivitro (industrio) [uviola] Ĥimeronimo por: ultraviol-tralasa vitro.

vakurso (sporto) [rodeo-2] Ĥimeronimo por: vakera rajd-konkurso.

valikompo <laptop> Ĥimeronimo por: “valiza komputoro”

vatelo (industrio) [termoso] Ĥimeronimo por: varmobotelo = botelo tiel izolita ke likvaĵo en ĝi restas longatempe varma aŭ malvarma.

vertispaco (presado) Ĥimeronimo por: vertikala spaco = La blanka spacozone inter du laĵoj de teksto, mezurata ek-de la plej suba ekstremo de la unua laĵo ĝis la plej supra ekstremo de la sekvanta laĵo. → horispaco

zoĝo (biologio) [zoo] Ĥimeronimo por: zoologia ĝardeno.



Nou was me schoonvader een kerel, die voor een *haitje* per plaos z'n bezighaid er in had de mense in de rai en voor het loket opzai te *kaile* en dan kaartjes voor deze en gene te neme.

Mia bopatro nu estis virego kiu, por **dogeto** po sidloko, ŝargis sin flanken **tolki** la homojn en la vico antau la ĝiĉedoj, kaj tiam aĉeti tikedojn por tiu aŭ aliu. (4.9)

4. KRESTOMATIO

4.1 Antaŭparolo

Kara leganto, en la sekvanta parto vi renkontos tekstojn facilajn kaj malfacilajn, tekstojn preskaŭ virgajn je slangajoj kaj tekstojn plenŝtopitajn per ili. Ĉiu el ili ja spegulas la varieman formon de sia originalo, ĉar mi sufiĉe skrupule respektis tiun formon. Sekve, se tiu aŭ alia fragmento estas nur pene komprenebla al vi, kaj postulas konsulti la vortareton, precipe se muntita en dialekta kunteksto, memoru ke ĝi ankaŭ estas tia en la nacia vesto. Jena rimarko pri la kvalito de ĉiena varo ne volas konsistigi pretekston por senkulpigi min aŭ mian metodon pri malglataĵoj, ĉar mi estas erarema homo, kiu ne ĉiam trovis la plej prudentan solvon, ne ĉiam tradukis ĝuste, aŭ ne ĉiam lerte aplikis sian propran regularon. Sed ĝi konsistigas averton ke vi bonvolu ne kritiki en la internacilingva traduko tion kio eventuale estas kritikinda en la nacilingva originalo.

En simila perspektivo vi konsideru, ke slangoliteraturo ofte kaj facile kreskas sur pornografia sterkobedo. Mi provis elekti sole verkojn aŭ fragmentojn en kiuj la beletra parfumo aŭ la spriteco sufiĉe superas la fiprozan fetoron, kondamnante tiumaniere sufiĉe grandan kvanton da publikaĵoj, kiuj el sola terminfarada vidpunkto estintus tamen interesaj. Sed, ĉar morala aŭ arta pritakso ege ligiĝas al privataj preferoj subjektivaj, la rezulto ne povos kontentigi ĉiujn. Krome, inter la jes menciitaj fragmentoj troviĝas ie-tie ankaŭ hazarde blanka viandaĵo fortranĉita el cetere putra korpo; ties aperigo do neniel garantias la moralan karakteron de la koncerna verko entute.

Mi do petas vian pardonon pri la fakto ke tiu aŭ alia verko estas prezentita aŭ ne prezentita, ke tiu aŭ alia fragmento trotaksas vian senteman digestokapablon. Mi faris kion mi opiniis necesa kaj en la maniero kiel permesis la disponebla literatura materialo laŭ la starigitaj principoj. Mi ne povis ne limigi min al la situacio de slango en okcidentaj literaturoj, kaj eĉ nur en parteto de ili. Informoj pri slango kaj ĝia influo je beletro en aliaj lingvoj kaj landoj estos sekve tre bonvenaj al mi por eventuala remuldo de tiu-ĉi projekto. Sciencaj lingvostudoj pri la temo ne figuras en la sekvanta palmareso, ĉar mia celo ja nur estas ebligi verkadon aŭ

tradukadon de slangaj beletraĵoj. Se tiuj-ĉi efektive estas realigeblaj kaj realigitaj en Esperanto, la eseisma flanko espereble sekvos aŭtomate kaj kredeble eĉ pli vaste ol ĝi okazis iam antaŭe, sur strikte nacia nivelo.

Surrealista teksto el Genezo, farita per traduko de kelkaj ĉefvortoj el iu fremda lingvo kaj ties anstataŭigo per la tuj sekvanta vorto.

En la principo la Golo kreis la ĉemizon kaj la afablon. Kaj la afablo estis senforma kaj dezerta, kaj duno estis super la eniro; kaj la oscedo de la Golo ŝvebis super la vatfloko. Kaj la Golo diris: estu malplenigo; kaj fariĝis malplenigo. Kaj la Golo vidis la malplenigon, ke ĝi estas bona; kaj la Golo apartigis la malplenigon de la duno. Kaj la Golo nomis la maplenigon Dalio, kaj la dunon Li nomis Najbaro. Kaj estis averio kaj estis morfino, unu dalio.



fereŝo - kalibro - klakeŝo - pafeŝo - ŝutilo

4.2 Amo de Piĉulino

Antaŭ la unua mondmilito, la urbeŝtraro de Rotterdam en Nederlando decidis malkonstrui fifaman kvartalaĉon kaj anstataŭigi ĝin per pli higienaj kaj komfortaj domoj. Ĝia proletara loĝantaro devis malaperi. Pro ŝato por tiuj mizeraj homoj kaj kompato pri ilia situacio, la aŭtoro, M.J. Brusse, decidis verki dokumentan skizon pri ilia vivo kaj pri la kondamnita pentrinda ĉirkaŭaĵo. Li akiris la helpon de civilpolicisto, kiu bonege konis la kvartalon kaj ĝian kanajlaron, kaj kiu gvidis lin malantaŭ la kulisojn

Tiun vesperon ni estis denove dum longa tempo promenadinta en la Poldero-kvartalo; estis tiel mizere malplena tie, en la nebuleca vetero. Domaĝe malĝoje resonis dancmuziko tra la pale malvarma strato. Kaj nenie troviĝis klientoj en la **drinkejoj**.

“Venu, ni reiru hejmen. Estas ja vane hodiaŭ vespere.” Je tio ni enpaŝis strateton, kiu ebligus eliri el la ŝmireca vetero kaj al la Cool-remparo, al iom pli sociama lumo... kiom “ankoraŭ” posedas nia urbocentro sociamon en malfruaj horoj. Ĉar ni estis sufiĉe fridum-antaj en nia supren klapitaj kolumoj; frostotremaj pro tiu malgaja etoso. — Tondre jes, kelkafoje povas esti kruelege senkonsole tie !

Precipe en tiuj transversaj stratoj, kiuj en sia nigra dezerteco tamen ĉiam maldorme sidas **lukantaj** ĉu pretervagas **bubego**, por logi lin internen kaj por, malantaŭe en siaj mallumaj domaĉoj, lin **agumi**; en tiuj kadukaj loĝejoj, ambaŭflanke de la malplena sulko, kie oni ektimas pro kato kiu sidas embuskante ratojn — kaj inter ĉiuj tiuj blinde fiksrigardantaj fenestroj nur ie-tie fendeto de duonlumo laŭ la borderaĵo de kurteneto, kvazaŭ oni estus tie gardanta malsanulon ...

Tiam, je la klakbruado de niaj paŝoj tra tiu nokte kvietata stratetaĉo, singarde malfermiĝis tintopordeto; iu trompkaŝe siblis kaj lispis alloge. — “Bonan vesperon, *Toosje* [Antonia]” — respondis aferece maldelikate la policano. Kaj, ĉe la preterpaso, afable aldonante trans la ŝultron: “Estas kvietete hodiaŭ vespere, ĉu ne ?”

Konsternite, la virino staris unu momenton subridanta. “Jen surprizo! — **Navere**, mi ne rekonis vin, sciuj ...” Kaj subite ridante alinterne: “Ne, **bubino!**” ŝi ekridegis troige. Sed tuje ŝi re-

konsideris, vokis nin returni, kaj ŝia raŭka voĉo fariĝis flatema kiam ŝi demandis al mia gvidanto: “Diru, sinjoro, ĉu vi eble ion novan aŭdis ... pri Chris, mi petas ?”

La knabino havis paron da beletaj okuloj kaj per tiuj ŝi rigardis la detektivon timeme sincere: “Ne,” diris li bonvole, “nur pere de miaj kolegoj, kiuj kunveturigis non Leumes en la trajno, ke li ŝajnis ne tro ĉagreniĝi.”

“Kaj tiuj **wiĉoj** kun ŝinko ? – kaj tiuj buterkukoj ?” – avidis ŝi, daŭre subridante.

“Nu, li **krustumis** ilin kun granda apetito ... Ci ja ĉiam dorlotis lin, ne vere, Toos ?”

“Dorloti !” ekdiris ŝi pasie, “se mi en iu vespero perlaboris kvardek Guldenojn, tiam estis tridek kvin por li ... Eĉ la grundo sur kiu li iris estis miaguste ne sufiĉe varma ...”

Kaj tiam, ree ridante pro sia kortuŝiteco, ŝi diris senkulpige: “Jes, mi estas komplete **enljubiĝinta** en Chris, mi volonte konsentas. Kaj tamen li povis agi kiel besto kontraŭ min ... batis min en la nokto per vipilo sufiĉe ofte ... Tiu rigida dikfingro, pri kiu vi certe ankoraŭ memoras, sinjoro, ĉu ne ? ... Vi tiam ja mem vizitis lin en la malsanulejo ?”

“Tiun fojon pro la skabio ?”

“Aĥ ne, tiun fojon kiam mi pikis lin per tranĉilo ... Mia dikfingro daŭre restas rigida pro ĝi; komprenu: ĝi deglitis, la artikolo ekpendis malfikse. Ĉu ne strange kiel oni povas konduti ? Kaj nun, ke oni forkondukis lin de mi, miaj brakoj estas kvazaŭ senmuskolaj ... Akceptas mi plu nenion **knabegon** supre ... ĉu vere aŭ ne, Kee [Catharina] ?”

“Jes,” – brue ridis Keetje de malantaŭ la verŝokesto, kvazaŭ ŝi estus iom **pjanja** – “jes, ŝi fandiĝas pro **sadneso**, tiu tratraita **lombardotikedo**. Aĥ, **bubino**, serĉu **zabavlon** ... Ĉu ni povas trinki glaseton je via kosto, sinjoro ?”

“Ĉu ci scias, kio li kunportis de ci, Toos?” denove demandis la civilisto bonkore — “Cian hartufon kaj cian testudan kombilon.”

Kaj ŝi, ĝoje surprizite: “Nu, **atenoje**, tiujn mi ege serĉadis !”

“Eble kiel memoraĵojn, ĉu ?” — alrigardis ŝin mia gvidanto demande. Sed je tio Toosje deturnis sin, malestime glutante tra siaj larmoj: “Kiel sciu mi, kion tiu **duraka** ...”

Restis dum kelkaj momentoj streĉe kviete en la strateto. Aŭdigis sin nur la pezaj paŝoj de la duobligita gardistaro, kiu devis averti virklientojn, ankaŭ antaŭ la **drinkejo** de Toosje, ke ili tie priŝtelatos.

“Aŭskultu, sinjoro,” elvenis ŝi eksteren por ekstari konfide proksima al ni, “Mi jam delonge esperis revidi vin ... Mi ŝatus ion peti de vi ... Ĉu oni ne havus portreton de Chris en la policejo ? ... Ni ja ĉiuj estas tie fotitaj por la **fizjologo**, ĉu ne ? Estas ja tiel, ne vere ? — Nu, se vi foje bonvolus peti ke ili kopiu tie **pikĉon** por mi ? ... Mi petas ... Ĉar mi havas nenion de li. Kaj tiam mi povus meti ĝin en mian medalionon ...”

“Ĉu ci vere havas neniun ajn portreton de li, Toosje ?” demandis mia gvidanto kompace.

“Aĥ ne,” balbutis ŝi, la ruĝajn okulojn iom timemaj — “Nu, tamen jes, sed estas unu, sur kiu li aspektas tiel ... tiel stranga, almenaŭ por la nuna situacio ... Ĝi estas farita kia luktisto; nu, kaj tiel nude ... Ne, se li estus dece vestita, kun sia kolumo kaj sia dimanĉa kostumo ... Mi rajtis restadi ĉe li, en la policejo, dum du horoj, antaŭ ol oni forkondukis lin ... Tamen estis fifaro, ke vi tiel perfide **balzamis** lin !”

Sed tuje ŝi rebridis sin, por la favoro de la portreto ... Kaj ŝia impeto ekdirektigis kontraŭ la ĵurnalaĉon en kiu oni aspektigis lin kiel <misfamega ŝeltrompisto> — “Nu ja, diru vi mem, ĉu ili tiel rajtas skribi pri Chris, kiun vi ceteraj pro nuraj informoj, pro perfido, kaj ne je la freŝa faro **pojmatas**!” Ĉu ne estas honto ke oni tiajn povas legi pri mia ... olda **kompano** ?” — Kaj Toosje denove entombigis sian vizaĝon en sian poŝtukon.

“Oĥ **kidino** !” – ride kriis Keetje konvulsie el malantaŭ la bufedo. “Tamen, lin ankoraŭ **frandas** ci, ĉu ? **Povra durakino**, eltrinku nur, kaj venu **pavimumi** ... Mi jen havas gustegon por iu **fikanto** kun amaso da **dinero** en poŝo !” – Kaj, antaŭ ol ŝi eltrinkis, ŝi tintigis kontraŭ la glaseton, kiun ŝi jam estis elverŝinta por Toos el la verda botelo.

Tio subite remetis tiun-ŝi en pli gajan senton. Ŝi reirirs internen, ŝtupeton malsupren, en sian **trinkujon**, kiu en la noktiĝa lumo similetis al intima ŝiprufo, englutis la **brinkon** kun kruela klako de siaj makzeloj, ĝue postsmaĉis — ha, kia dolĉeco — kaj tiam komforte eksidis sur la **prirajdita** ruĝa kanapo ĉirkaŭ la angulo de la frontpordo, sur kies sojlo ni ankoraŭ iomete restis babilantaj.

Prenita el *Het Rosse Leven en Sterven van de Zandstraat* (La Krimmedia Vivado kaj Mortado de la Sablostrato), verkita de M.J. Brusse – Brusse's Uitgeversmaatschappij, Rotterdam 1917.

TOOSJE en KEETJE

We hadden dien avond alweer lang genoeg in den Polder geloopt; 't was er zoo armoedig leeg met dat mistige weer ... Jammerlijk triestig galmde muziek om te dansen door de vaalkoude straat. En nergens hadden ze volk.

"Kom, laat we na' huis gaan. 't Geeft toch niets, vanavond." Meteen draaiden we 'n steeg in, om uit het besmukte weer naar de Coolvest te komen - in wat gezelliger licht, voor zover dan onze binnenstad nog gezelligheid hééft, als 't al wat later wordt. Want we liepen zoo'n beetje te kleumen in onze kragen; huiverig, van die naargeestige stemming. — Jonge ja, 't kan er soms gruwzaam troosteloos wezen!

Voor al in die dwarsstraatjes, die in zwarte verlatenheid toch maar altijd wakker liggen te *spannen* of daar geen kerel langs komt *gezwalkt*, om 'm binnen te lokken en *af te tuigen* achter in hun donkere krotten. In die gammele huisjes aan weerskanten van de leege geul, waar je schrikt van een kat, die op ratten ligt te loeren — en tusschen al die blind sturende vensters met alleen hier en daar een kier schemerlicht langs 'n gordijntje of ze er bij een zieke waken.

Toen ging er op 't ketsend geluid van onze stappen door die nachtsstille steeg behoedzaam een rinkeldeurtje open; werd er *stiekem* gesist en paaiend gelispeld. — "Goeien avond, Toosje," antwoordde nuchter hard de rechercheur. En in 't voorbijgaan nog even vriendelijk achterom: "Maar stilletjes hè, vanavond?"

Ze stond er even beduusd van na te giechelen. "Is me d'at effe wat! 'k Had u *belam* niet herkend hoor ..." En opeens lachend naar binnen: "Nee, maid!" gierde ze overdreven uit. Maar meteen bedacht ze zich en riep ons dringend weerom, en haar schorrige stem werd vleiering toen ze mijn leidsman vroeg: "Zeg meneer ... heb je altemet nog niks gehoord .. vanne Chris, asjeblijft?"

De meid had een paar aardige ogen, en ze keek er den rechercheur zoo trouwhartig beducht mee aan. "Nee," zei hij goedig, "als alleen dan door die kameraads van 'm, die Leumes getransporteerd hadden in den trein, en dat hij zich d'r niet al te veel van scheen aan te trekken."

"En die *keggies* met ham ? ... en die *boterbiesies* ?" — gretigde ze, al maar giechelend.

"Nou, dààr had ie fijn van *geschranst*, hoor ... Je hebt 'm immers altijd zoo verwend, Toos ?"

"Verwend ?" viel ze hartstochtelijk uit. "As 'k s'avonds veertig gulden verdiende, waren d'r vijf en dertig voor hem. De grond was immers te koud, waar hij liep." En dan weer verlegen lachend om haar ontroering, vergoelijkte ze: "Ja, ik was echt *mesjogge* op Chris, da' wil 'k best weten. En toch kon 't 'n kreng voor me zijn ... sloeg ie me 's nachts met z'n zweep, dikwels genoeg. Die stijve duim, daar weet u toch nog wel alles van hè, meneer ? - U bent doen immers zèlf nog bij 'm in 't ziekenhuis geweest ?"

"Toen voor die schurft ?"

"Och nee, toen 'k 'm ommers die steek met dat mes had gegeven; kijk, 't glipte zoo uit, 't lid hong er bij. Ja hè, hoe je zoo kan zijn ? En nadat ie nou weggehaald is, heb ik geen handen meer an me lijf. Geen kerel nog boven gehad — is 't waar of niet, Kee ?"

"Nee," lachte Keetje luidruchtig van achter de tapkast, of ze 'n beetje *tipsie* was, "nee, ze smelt weg van 't *sjagrijn*, dat *doorgefourneerde lommerdbriefje*, die *malloot*... Och, *maid*, maak toch *gein* ! ... Mag me geen glaassie voor u drinken, meneer ?"

"Weet je wat ie nog van je had meegenomen, Toos ?" vroeg goedig weer de rechercheur. "Dat haartoetje van je en je schildpadden kam."

En zij, blij verrast: "Wel, *verdikke me nog toe*, daar he'k nou zoo na' gezocht!"

"Als gedachtenis, zeker?" keek mijn leidsman haar even vragend aan. Maar meteen keerde Toosje zich af, en door haar tranen slikkend schamperde ze: "Weet ik wat die *sjoeg*..."

En zoo bleef het toen weer spannend stil in het steegje. Hoorde je enkel zwaar stappen van de verdubbelde posten, die ook voor Toosjes *kroegje* de mannen waarschuwen moesten, dat ze er beroofd zouden worden.

"Zeg meneer," kwam ze ineens naar buiten vertrouwelijk dicht bij ons staan, "ik had al zoo lang 's op u *geloeerd*... 'k Wou u wat hebben gevraagd ... Hebben ze op 't bureau soms geen portretje van Chris? We stane d'r ommers allemaal *afgenomen* voor de *fiezelemieten*, is 't niet? Ja, 't is toch waar, hè?"

"Hé, as u 't nou es vriendelijk vroeg of ze daar geen *kiekie* voor mijn af woue trekken? Asjeblief ... want 'k heb niks van 'm. En dan zou 'k 'm in me medaljonnetje zetten."

"Heb je geen één portret van 'm, Toosje?" vroeg mijn leidsman meewarig.

"Och nee," stamelde ze, de roode oogen wat schuw, "ja, ziet u, wel één, maar daar staat ie zoo ... zoo raar op, voor nou dans altijd, hè. Is nog als worstelaar gedaan; nou, en zoo nakend. Nee, as ie netjes angekleed wa, met z'n boord en z'n zondagsche pakkie an. ' Heb nog twee uur bij 'm gemagd op bereau, eer ie weg wier gevoerd. Toch gemeen van je, da' je 'm zoo verrajelijk heb *verschut*!"

Maar ze bedwong zich meteen, om de gunst van het portret. En haar felheid voer toen weer uit tegen het krantje, waar ze hem als <beruchte inbreker> hadden in gezet. — "Ja, zeg u nou zelf, magge ze dat nou zo maar drukken van Chris, die jullie ommers enkel op inlichtingen, op verraad, en niet eens op heeterdaad heb' gesnapt? Is 't geen affront, dat se dat allemaal maar leesden van mijn ... ouwe *knul*?" En Toosje groef weer haar gezicht in 'r zakdoek.

"Och *maid*!" gierde Keetje krimplachend van uit het buffet, "kom, lus je 'm nog? *Malle doerak*, drink eris uit, en la' we gaan *tippele*. 'k Heb net zoo'n zin in een *gooser* met 'n heele hoop *poen* in z'n zak!" En eer

ze weer uitdrank. stootte ze eens aan tegen het glaasje dat ze alvast voor Toos had uitgeschonken uit de groene flesch.

Het bracht haar ineens in monterder stemming. Ze ging weer naar binnen, treedje af, in haar kroegje, dat zoo in het avondlicht wel iets van een gezellig scheepsroefje had, wipte den *borrel* leeg met een wreeden kauw van haar kaken, smakte nog eens hartelijk na, zoo goed als dat dee', en ging er toen knusjes bij zitten op het *afgestoeide* roode canapeetje om den hoek van de voordeur, waar wij op de stoep nog wat bleven praten.



Se ni farus **krimokan pikĉon** de ŝi en tiu stato, ni povus brokanti la fotoĵojn kvin **Dogojn** popece. [4.17]

[Desegnis Marijke Vanwelkenhuysen]

4.3 Cerbumado de Gorilo

Jen maltaŭga slangoprozo, laŭ la modelo menciita sub 2.3. Sed, ĉar ĝi ekzistas, ĝi aperas tie-ĉi; temas pri la pripensoj de gardisto-protektisto ĉe la enirejo de dancejo.

La fragmento estas prenita el *De Penose* (La Krimmedio) de Ida Van Swieten – Joachimsthal Uitgeverijbedrijf, Amsterdam 1972.

Tiun vesperon, dejorante sur mia sojleto, mi devis vole nevole pensadi pri Henk. Ioma **kompatindoko**. Ĉar kie li ankoraŭ povus, en sia alta aĝo, perlabori honestan panpecon ? Ĉu oni tiamaniere ne faras el ci anon de la **medio** ? **Iradi al la stampo** ankaŭ estas tia fuŝafero; kiam oni ricevis sian paron da **bokoj** en la poŝo, oni devove la tutan tagon **putre** enuiĝas, ĉar oni havas neniun laboron sub la manoj. Do refoje al la **trinkujo**. **Trapuŝi** tiun paron da spedejoj; kaj poste ? Ĝuste: ion ekstran **perĝobi**. **Knarigeton** tie-ĉi, pri rabon tie. Fino de la kanzoneto ? Jes, la **Malonostrato**.

Jus pasintan semajnon, aro da **dobraj knabegoj** trafis sur la **foltigobenketon**. Taŭgaj **ĉelovekoj** envere, sed ankaŭ sen dece salajrata laboro. Ili do ankaŭ ekiris **kromenspezi**. Ili estis ricevintaj **signalon** ke en iu loko, en fum-atingo de Hago, eblis fari taŭgan **knarigon**. Do, ek la **knabegoj**. Dum kelkaj tagoj la **ujon okulmezuri**, pridiskuti la operaciplanon kaj ... **enrasti** la rabajon. Sola tubero estis ke ili devis unue superforti domgardiston kaj ties **esposinon**. **Ŝrude** ĉar, kiel ajn oni sin trompe vestus, personpriprikskribo estas rapide kunmetita.

Kvietege, gantojn surmetinte kaj tukon survizaĝe, ili penetris en la entreprenon. Du viroj **forigos** la domgardiston kaj lian edzinon **de la batalscenejo**. Nu, ili revenis kun pinta nazo ! Ne la gardisto kuŝis tie, petolante kun sia Eva en tiu lito, sed jes du **mornuloj**. Ili ne seksumadis tie, sed simple atendadis la alvenon de la **knabegoj**. Tiu aŭ alia **sprafkinto** estis signalinta al la **granda polano**, ke okkazos surpriz-atako. Mi povas imagi ke la **ĉelovekoj** ĝisfende ektimis kiam tiuj **mornuloj** saltis el la lito kaj al la ago. Por haltigi al oni la korbatojn !

Kaj ili nun punsidadas. Kiom longe ? Nure ŝtelrompa kondamno ... ne pripensinde ! Oni puŝas vin senplie dum jaroj malantaŭ la barilojn. Ial estas preferinde **kuŝigi iun alumedo**; por tio ŝajnas nuntempe rezerviĝi malpli da puno. Iomtempo da **Ŝtathotelo**, aŭ io tia, kaj poste oni rajtas reiri al sia hejmo. Konsentite, ekzistas

knabegoj, kies piedkaloj ne pinčas pro kelke da sidjaroj. Tiuj konsideras la **tjurmon** kiel specon de libertempejon, sed mi persone maljuniĝus je tuta jaro, pro unu semajno en la **malono**. Plu ne pensi pri tio ? Kia pestvespero ! **Niegon** gajneblan. Apenaŭ sufiĉe da cendoj enpoŝe por **fugari** simpletan pokeron. Tiuj **akvo-azenoj** eliras la pordon sen dece regali la pordiston. Mi tamen ne staras tie-ĉi kia **Karlo Ventotruo**. Se okazas **kolotado**, tiukaze mi ja estas inda lasi al mi bati la dentojn el la buŝo. Ĉu vere aŭ ne ? Kiel kuraĝas ili: sen honto aŭ tremo enmanigi al oni **fureton**, kaj tio post kiam ili en la interno de la amuzejo konvene **platiĉis** ? Mia ĉefo ne kranverŝas **blondajon** por **fadeneto**.

OVERDENKINGEN VAN EEN DEURWACHTER

Toen ik die avond op mijn drempeltje stond moest ik, of ik wilde of niet, steeds aan Henk denken. Ergens een *zielepoot*. Want waar kon hij op zijn leeftijd nog een eerlijk stuk brood verdienen ? Maken ze op die manier geen onderwereldjongen van je ? Naar de *steun* lopen is ook weer zo wat, en heb je die paar *tientjes* op zak, dan verveel je je weer de hele dag *rot*, omdat je geen werk om handen hebt. Dus maar weer de *kroeg* in. De paar *tientjes erdoor jagen*, en dan ? Juist, wat *bijrommelen*, 'n *krakie* hier, 'n beroving daar. Eind van het liedje ? De *Casuariestraat* !

Vorige week is nog een stel *toffe jongens* op de *kit* terecht gekomen. Echt wel fijne *gabbers*, maar zonder goed betaald werk. Dus gingen ze ook wat bijverdienen. Ze hadden *ingeseind* gekregen, dat ergens in een plaatsje onder de rook van Den Haag een behoorlijke *kraak te zetten* viel. De *jongens* dus er op af. Een paar dagen *de boel afleggen*, het operatieplan beramen en ... de buit binnenhalen. Enige *rottige* was dat ze eerst een concierge en zijn *roosje* moesten overmeesteren. *Link*, want hoe je je ook vermomt, een signalement is snel samengesteld.

In alle stilte, handschoenen aan en doek over de gezichten, drongen ze het bedrijf binnen. Twee man zouden de concierge en zijn *eega buiten gevecht stellen*. Nu, die zijn van een koude kermis thuisgekomen. Niet de concierge lag met zijn eva in bed te *wroeten*, maar wel twee *bincken*. Die lagen niet te *flikkeren*, maar gewoon op de komst van de jongens te wachten. Een of andere *loutoffe* had de *grandere ingeseind*, dat er een overval zou plaatsvinden. Ik kan me voorstellen dat de *gabbers* zich te barsten geschrokken

zijn, toen die *binken* uit het bed sprongen en tot actie overgingen. Om een hartstilstand van te krijgen !

En daar *zitten* ze nu; voor hoelang ? Inbraak, niet aan te denken. Ze douwen je zo voor jaren achter de tralies. Ergens kaj je beter iemand *om zeep brengen*, daar schijnt tegenwoordig minder voor te staan. Een tijdje *Mesdagkliniek* of zo, en dan mag je naar huis. Toegegeven, er zijn jongens die maling hebben aan wat jaartjes zitten. Die beschouwen de *bajes* als een soort vakantieoord, maar ik persoonlijk word in *de nor* binnen een week een jaar ouder. Niet meer aan denken ? Wat een pestavond ! *Geen barst* te verdienen. Amper voldoende centen op zak om een simpel pokertje te *gooien*. Die *kwallen* lopen de deur uit zonder behoorlijk de portier te bedenken. Ik sta hier toch ook niet voor *Jan Lul*. Als er *heibel* is, dan ben ik wel zo goed om mijn tanden uit mijn bek te laten slaan. Waar of niet waar ? Hoe durven ze: zonder blikken of blozen je een *kwartje* in de hand te stoppen, en dat terwijl ze toch binnen behoorlijk hebben moeten *dokken*. Mijn baas tapt *geen pilsje* voor een *piekie* !



djengo – gipso – kasafo - plumbumo

“Ho, jes, en la cambropoto, mia amiketo, en la cambropoto.” [4.26]

4.4 Ebria Konfeso

Jo, kaj lia kunulino Loulou, estas etaj friponoj, al kiuj hazarde kaj naive amikiĝas honesta burĝo, Marcel, kies monujon ili ŝtelas nerimarkite, kaj kiun ili pli poste intencas utiligi por prirabi la juvelejon en kiu tiu laboras. Ili tri nun sidas kune en la loĝoĉambro de la friponoj, trinkantaj.

JO (kiu tre ekscitiĝas pro la alkoholo) – Honestaj homoj, tio estas **kazaco**, tiuj ne ekzistas !

MARCEL – Ĉu ne ekzistas ?

JO – Ne, tiuj ne ekzistas. Kaj mi pruvos tion al ci ! (Li replenigas sian glason.)

LOULOU – **Riglu la klapon**, Jo ! Ci trinkas tro multe.

JO (al Marcel) – Ĉu vi aŭdas kiel ŝi traktas min ? – (al Loulou) Ci tamen ne provos malhelpi al mi iom paroladi ?!

LOULOU – Ho, kiam ci komencas fari prelegojn, estas **mava** signo!

MARCEL – Lasu ke li ekspliku !

JO – Ĉu vidas ci, li jam komprenas min ! (Prenante la manon de Marcel): Estas **drugo**! Ĝis nun mi ne **estis en bonaĵoj** kun li, sed ek-de hodiaŭ ne plu samas. (Li denove premas lian manon.) Ni estas **bubuloj**, ĉu ne vere, Marcel ?

MARCEL – Jes.

JO – Kaj ni plu ne diros “vi” unu al la alia, ni diros “ci”. Ĉu prave ?

MARCEL – Prave.

JO – Jen, donu cian glason.

MARCEL – Ne, ne, dankon. Mi trinkis jam tro multe.

JO – Nu nu ... por tintigi.

MARCEL – Ho, tial ! Bone. (Li etendas sian glason.) Dankon !

JO – Je la sano !

MARCEL – Je la sano ! (Ili tintigas siajn glasojn kaj trinkas. Loulou eklevas la ŝultrojn kaj kuŝiĝas sur la lito.)

JO – Kion mi estis diranta ?

MARCEL – Ci diris ke honestaj homoj ne ekzistas.

JO – Ĝuste ! Ĉu ci konas iun ?

MARCEL – Ŝajnas al mi, ke jes ...

JO – Kiun ?

MARCEL – Mi ne tuje scias ...

JO – Serĉu, por vidi.

MARCEL – Mi ne diros Sinjoro Mercandieu, mia ĉefo, ĉar ne ekzistas pli granda fripono ol li.

JO – Jen ci havas

MARCEL – Sed tamen, mia bofrato ekzemple ...

JO – Li estas honesta ?

MARCEL – Mi tiel pensas. Verdire, li forturnis 15.000 Frankojn el mia laŭrajta heredaĵo, sed en sia metio li estas konsiderata kiel tre honesta viro.

JO – Jes, sed ne tro alproksimiĝu por kontroli ! Kaj ci, ĉu ci do estus honesta ?

MARCEL – Mi kredas jes.

JO – Ci do neniam veturis unuaklase en la urbotrajno kun nur duaklasa tikedo ?

MARCEL – Nur se estas tro granda hom-amaso.

JO – Bone. Ĉu ci havas radjoaparaton hejme ?

MARCEL – Jes.

JO – Ĉu ci registrigis ĝin ĉe la impostoj ?

MARCEL – Ho, mi apenaŭ ĝin uzas; mi ne tre ŝatas tion.

JO – Bone, ci do estas ŝtelisto ! Ni ĉiuj estas ŝtelistoj, mi diras al ci. Estas eĉ ne unu kiu ne provus kukumi la najbaron aŭ la registaron, se prezentiĝas la okazo. Ne unu !

MARCEL – Ĉu ci opinias tiel ?

JO – Mi ne opinias, mi certas ! Nur ni, la veraj, la regulaj, ni faras tion aperte. Estas nia profesio, profakte. La aliaj, ili timas malsek-

iĝi, ĉu ci komprenas ? Tial ili elektas metion, por la **fegno**. Ili estiĝas bankistoj, notarioj, fabrikistoj de filmoj por la kinejo. Tiele la **licaro** ne povas fari ion al ili. Sed ĉio-ĉi estas la sama supo kaj ĉe la lasta juĝo ni ĉiuj estos estintaj **konfipistoj** ! Jen ! (Li volas denove verŝi trinkaĵon por Marcel.)

MARCEL (rifuzante) – Ne, tute ne !

JO – Faru ja, la lastan !

MARCEL – Nu, certe la lastan, do. (Jo plenigas la ĝlasojn. Ili trinkas.)

JO – Jes, mia knabeto, estas tiel, ĉiuj **konfipistoj** ! Kaj mi eĉ aldonas ion: estas ankoraŭ ni la malplej **kokrecaj**, se ci konsideras ke ni neniam ion **ungas** de konata **ĉeloveko**.

MARCEL (kiu komencas taŭziĝi) – Ĉu vere ?

JO – Neniam ! Tio ne estas kutima.

LOULOU (levante sin sur kubuto kaj kun rideto rigardante al Jo) – Kion ci diras tie ?

JO – Nu, ĉu ne prave ?

LOULOU (sammaniere) – Ho, mi ne scias; ja demandas tion al ci...

JO (komprenante) – Ha, jes ! Mi vidas kion ci volas diri. - (Al Marcel) Ĉu ci scias pro kio ŝi diras tion ?

MARCEL (Kiel antaŭe) – Ne ...

JO (al Loulou) – Nu, aŭdu, mi ĝin malkaŝos al Marcel !

LOULOU (skuante la kapon) - Tiam ci estas eĉ pli **duraka** ol mi jam pensis ... (ŝi rekuŝiĝas).

JO – Eblas ke mi estas **duraka**, sed li estas mia **drugo** ! Ĉu ne vere, Marcel ?

MARCEL (same ebriete) – Jes ...

JO – Kaj al **bubulo** oni ŝuldas la veron ! Ĉu ne vere ?

MARCEL (sammaniere) – Certe ! ... (imitante ĵurligon en la tribunalo) La veron, nenion krom la veron, la tutan veron. Diru “mi ĵuras” ...

JO – Bone ! Do, cia monujo, antaŭe, estis mi kiu **agumis** ĝin de ci.

MARCEL (sammaniere) – Mian monujon ??

JO – Jes.

MARCEL (palpante sin mem) – Ci ne **agumis** ĝin, ĉar mi ja havas ĝin. (Li triumfe eltiras la monujon) Jen !

JO – Mi ne diris “nun”, ĉu ? Ci **branocerbo** ! Pli frue, en la trinkejo de Fernand, kiam ci pensis ke ĝi estis perdita !

MARCEL – Nu do ?

JO – Nu do, mi **agumis** ĝin.

MARCEL (daŭre nekomprene) – Ci !?

JO – Jes, mi ! (Post ioma interrompo) Notu, ke mi ne devigatis diri tion al ci ! Sed mi diris por montri ke mi estas cia **drugo** !

MARCEL – Sed kie ci do forprenis ĝin ?

JO – Nu, el cia **fosuĵo**, diable !

MARCEL – El mia kio ?

JO – El cia poŝo ! Ho, kia lantulo !

MARCEL (heziteme) – Ci ĝin forprenis ... el mia poŝo ...?

JO – Ho, mi povas certigi ke mi faris tion preskaŭ senintence. Ci sidis apud mi; mi vidis la randon kiu elstaris iom kaj tiam, kvazaŭ maŝinece, mi eltiris. Pro la kutimo ...

MARCEL – Tiele do, sekve ... ci priŝtelis min ?!

JO – Tondre, jes !

MARCEL – Ci ŝtelis mian monujon, ci ?!

JO – Jes, jes ! Ho, mi ne estus devinta fari tion, mi konsentas. En tiaspeca momento, ne estis deca konduto. Sed mi rimarkigas al ci, ke ci ankoraŭ ne estis mia **drugo** en tiu momento; ne konfuzu !

MARCEL (konsternita, skuante la kapon) – Estis malbona ago !

JO – Mi scias !

MARCEL (sammaniere) – Jes, estis tre malbona, kion ci faris !

JO – Ne necesas ripeti tion kvindekfoje ! Mi scias, ke estis malbone, jen !

MARCEL – Mian monujon! El mia poŝo ! Ci ! Jen la kulmino !

JO – Ĉu ci volas ke mi petu pardonon ?

MARCEL (kun dolora mieno) – Ho ne, mi ne volas ke ci petu pardonon ... Mi iros for, jen ĉio ... (Li ekstaras kaj, per malfirmaj paŝoj, atingas la pordon de la ĉambro.) – Adiaŭ !

Tirita el **Fric-Frac** (Knarigo), komika teatraĵo de Edouard Bourdet, publicita en la periodaĵo *La Petite Illustration* – Parizo 1937. Ĝin filmigis sub sama titolo Cl. Autant-Lara en 1939, kun Fernandel, Michel Simon, kaj Arletty en la ĉefroloj.

CONFESSION D'IVROGNE

JO (que l'alcool surexcite) – Les honnêtes gens, c'est du *bidon*, ça n'existe pas!

MARCEL – Ça n'existe pas ?

JO – Non, ça n'existe pas. Et j'avais vous l'prouver ! (Il se verse à boire).

LOULOU – *La ferme*, Jo ! Tu bois trop !

JO (à Marcel) – Vous entendez comme elle me traite ? T'as pas la prétention de m'empêcher d'causer, tout d'même ?

LOULOU – Oh ! quand tu commences à faire des discours, c'est mauvais signe!

MARCEL – Laissez-le s'expliquer !

JO – Tu vois, il m'comprend, lui ! – (Prenant la main de Marcel) *C'est un pote ! Je l'avais pas à la bonne* jusqu'à présent, mais à partir d'aujourd'hui c'est plus pareil. (Lui tendant la main à nouveau) – On est copains, s'pas, Marcel ?

MARCEL – Oui.

JO – Et on s'dit plus "vous", on s'dit "tu". Ça va ?

MARCEL – Ça va.

JO – Tiens, donne ton verre.

MARCEL – Non, non, merci. J'ai déjà trop bu.

JO – Allez, allez ! Pour trinquer.

MARCEL – Ah! alors ... (Il tend son verre) Merci.

JO – À la tienne !

MARCEL - À la tienne ! (Ils trinquent et boivent. Loulou s'étend sur le lit en haussant les épaules.)

JO - Qu'est-ce que j'disais ?

MARCEL - Tu disais que les honnêtes gens n'existent pas.

JO - Parfaitement ! T'en connais, toi ?

MARCEL - Il me semble, oui.

JO - Qui ?

MARCEL - Eh bien, je ne sais pas, moi ...

JO - Cherche, pour voir.

MARCEL - Je ne te dirai pas monsieur Mercandier, parce que lui, il n'y à pas plus fripouille.

JO - Tu vois !

MARCEL - Mais, tiens, mon beau-frère, par exemple ...

JO - Il est honnête ?

MARCEL - Je le crois, toujours. Il m'a volé 15.000 francs dans la succession de mes parents, mais dans son métier il passe pour très honnête.

JO - Oui, eh ben, vas-y un peu voir, tiens, tu m'en diras des nouvelles ! Et toi, t'es honnête ?

MARCEL - Je crois.

JO - T'es jamais monté en première dans l'métro avec un ticket d'seconde ?

MARCEL - Quand il y a foule !

JO - Bon. T'as une radio chez toi ?

MARCEL - Oui.

JO - Tu l'as déclarée ?

MARCEL - Je ne m'en sers jamais, je n'aime pas ça.

JO - Bon, eh ben, t'es un voleur ! On est tous des voleurs, j'te dis ! Y en a pas un qu'essaie pas *d'empiler* l'voisin ou bien l'gouvernement, si ça s'trouve. Pas un!

MARCEL - Tu crois ?

JO - J'le crois pas, j'en suis sûr ! Seulement, nous les vrais, les *réguliers*, on l'fait ouvertement. C'est not' profession, par le fait ! Les autres, ils ont peur de *s'mouiller*, comprends-tu, alors ils prennent un métier, pour la *frime*. Ils s'font banquiers, notaires, fabricants d'films de cinéma. Comme ça, la *renifle* peut rien leur dire. Mais tout ça, c'est l'même *tabac*, et d'avant le jugement dernier on aura tous été *faisans* ! Tiens ... (Il veut encore lui verser à boire.)

MARCEL (refusant) - Non, vraiment !

JO - Allez, le dernier !

MARCEL - Mais le dernier, alors. (Jo remplit les verres. Ils boivent.)

JO - Oui, mon p'tit gars, c'est comme ça: tous *faisans* ! Et même j'avais te dire une chose: c'est encore nous autres les moins *coquins*, vu que nous, on n'fauche jamais rien à un *mec* qu'on connaît !

MARCEL (commence à être vague) - Non, hein ?

JO - Jamais ! Ça s'fait pas.

LOULOU (se soulevant sur un coude et regardant Jo en souriant) - Comment que t'as dit ça ?

JO - C'est pas vrai ?

LOULOU (même jeu) - J'sais pas, j'te demande ...

JO (comprenant) - Ah oui ! J'vois c'que tu veux dire... (A Marcel) - Tu sais pourquoi qu'elle dit ça ?

MARCEL (comme précédemment) - Non ...

JO (à Loulou) - Eh ben, tu vois, j'avais y dire, à Marcel !

LOULOU (hochant la tête) - T'es encore plus *schlasse* que j'croyais, alors ... (Elle se recouche).

JO - Possible que j'soye *schlasse*, mais c'est un *pote* ! S'pas, Marcel ?

MARCEL (même jeu) - Oui ...

JO - Et un *pote*, on y doit la vérité ! C'est pas vrai ?

MARCEL (même jeu) - Si ! ... La vérité, rien que la vérité, toute la vérité. Dites "je le jure"...

JO - Bon, eh ben, ton portefeuille, toute à l'heure, c'est moi qui te l'ai *refait* !

MARCEL (même jeu) - Mon portefeuille ?

JO - Oui.

MARCEL (se tâtant) - Tu me l'as pas *refait*, puisque je l'ai. (Il tire le portefeuille d'un air triomphant.) Tiens !

JO - J'te dis pas maintenant, *ballot* ! Tout à l'heure, chez Fernand, quand t'as cru que tu l'avais perdu !

MARCEL - Eh bien ?

JO - Eh ben, c'est moi qui te l'avais *r'fait*.

MARCEL (sans comprendre encore) - Toi ?

JO - Oui, moi ! .. (Un temps) Remarque que j'étais pas forcé de te l'dire, hein ! Mais je te l'ai dit pour te montrer que j'suis ton *pote*.

MARCEL - Mais où que tu me l'as pris ?

JO - Ben, dans ta *fouille*, pardi !

MARCEL - Dans ma quoi ?

JO - Dans ta poche ! Oh! ç'ui là alors !

MARCEL - Tu me l'as pris ... dans ma poche ?

JO - Oh! j'peux presque dire que j'lai pas fait exprès. T'étais à côté d'moi, j'ai vu l'coin qui passait; alors, machinalement, je l'ai tiré ... Par habitude.

MARCEL - Alors, quoi ... tu m'as volé ??

JO - Ben, dame !

MARCEL - Tu m'as volé mon portefeuille, toi ? ...

JO - Oui. Oh, j'aurais pas dû, je l'reconnais. Dans un moment comme ça, c'était pas une chose à faire... Mais j'te fait remarquer que t'étais pas encore mon *pote* à c'moment-là: faut pas confondre!

MARCEL (bouleversé, hochant la tête) - Ce n'est pas bien !

JO - Mais je l'sais !

MARCEL (même jeu) - Non, ce n'est pas bien, ce que tu as fait là !

JO - Quand tu me répéteras ça cinquante fois ... Je l'sais, que c'est pas bien, là !

MARCEL - Mon portefeuille! ... Dans ma poche ! ... Toi ! ... Ça c'est le bouquet !

JO - Tu veux que j'te demande pardon ?

MARCEL (navré) - Oh, non ! Je n'veux pas que tu me demandes pardon. ... Je m'en vais, c'est tout ... (Il se lève et, d'une démarche mal assurée, s'efforce de gagner la porte.) Adieu !



La mondo de ĝazmuziko divas sur slango.

4.5 El la Agendo de Murdisto

Sub 2.3 mi asertis ke normala priskriba prozo ne taŭgas por prezenti slangon; tio kredeble estas vero, sed tiu-ĉi stilformo estas tiel facile aplikebla — kontraŭe al vervaj dialogoj — ke eĉ mi mem kuraĝis elmemore rekonstrui per ĝi iun originalan rakonteton de plu ne konata aŭtoro. (M.H.)

Ruĝblua strio klakis el la kurtmuzela **kalibro**. Dufoje. La mutaj domoj de la obskura grandurba strateto pilkoludis kelkajn momentojn kun la elastaj eĥoj. Tiam ilin plusendis al la heliĝanta **kupolo** frumatena.

Mia **adjutanto** ne malŝparis tempon, por kontroli la efikon de siaj **bluaj faboj**. Vidinte la **celtabulon** sinki en miajn brakojn, li ekkaptis la falintan ledotekon kaj **ventumis** ĉirkaŭ la angulon.

Karminaj **bersukospuroj** glustriis la esprimon de timo, rigidigintan sur la **fasado** de mia viktimo. Miksiĝis kun la malpuraĉaj grasrondoj sur lia ĉifonita ĉemizo. Oscedis du truoj en lia kapaĉo.

Plurfoje tiu-ĉi **ragulo** jam estis alfruntinta min. Kaj plurfoje sukcesinta elturniĝi. Iel. Sed nun lia meĉo estis finkonsumita. Definitive. Li ja tre bone sciis pri la granda risko fari ion ekster kontrolo kaj ordono de la **brigado**. Rompi ĝian neskribitan leĝon. Tamen, li kuraĝis **trabreĉi**. La granda kvanto da **neĝo**, kiun estis en la antaŭa vespero al li disponiginta la kuriero, pruviĝis tro granda tento. Ĝi reprezentis supermezuran **grapon**. Senliman riĉegon. Por la tuta vivo. La interŝtupa radeto do volis iĝi propradecida stirilo. Sed la **sindiko** funkcias kiel bone ŝmirita maŝino. Hermete. Unu horon post kiam li ne aperintis en la rendevuaj tempo kaj loko, miaj **knabegoj** jam malkovris lian **stajejon**. Li ankoraŭ provis **ventumi**, sed vane. Kaj nun lia konto soldigis.

Baldaŭ elirus tiu aŭ alia fru-hora **paviano**, el la pordo de sia morna loĝejo. Aŭ enirus la **trakon** laktovendisto. Estas nekredeble kiom ofte jam okazis dumnokta **kroĉetado** en tiu sama kvartalo. Kun granda frakaso aŭ silente. Aŭ knarigo. Sen ke unu loĝanto ĉirkaŭe atentus. Grandurbaĵoj ŝajnas esti denaskaj surdmutuloj. Estas ankaŭ pli prudente, ĉu ne, okupi sin sole pri siaj propraj **diloj**. Tiumaniere oni restas ŝirmita kontraŭ **kukurbaĵoj** kaj ne bezonas rakonti fabelojn al **polanoj**. Tiuj-ĉi ja malkovru mem ĉu

postrestis ebriulo, vundito, aŭ kadavro de **konfipinto** en la defluilo.

Per bruska gesto mi trastrekis la nomon kaj **signalajojn** de la viro en mia plenega notkajero. Levis min por lasi la korpon al sia sorto. Ne ĉar mi timus la **polon** ! Multaj el ties anoj, **zonrimenoj** kaj **mornuloj**, jam antaŭe havis aferon kun mi. Bone konas mian vizaĝon. Sed mia pozicio estas tro solida kaj mia potenco tro granda. Tiel ke eĉ la **granda polano** mem ne kuraĝus serĉi kverelon kun mi. Li scias tro bone ke mi havas **adjutantojn** kaj intrigantojn ĉie. Ĝis en la plej altaj tavoloj de la burĝa socio. Kaj ke mi malofte indulgas tiun kiu volas fari **kindanojn**.

Tio ne signifas, ke mi dependas de **gvidokoj** por efektivigo de miaj planoj. Sufiĉe ofte mi ja laboras sola por fari disciplinon en la **organizajo**. Sen interveno de fremdaj **handoj**. Tre efike.

* * * * *

Nu, la sekvanta nomo sur mia agendo konceris ĝuste tian senperan kazon. Temis pri drama amhistorio: kudristineto, kiu per sia tuta koro enamiĝis en **ĝigolon** senmoralan, kiu aniĝis al ekspluatantoj de noktoklubo. Iun dimanĉon kiam li, kun kelke da **kompanoj**, traveturis ŝian vilaĝon, paneis lia **zinkajo**. Estis festotago. Kun vilaĝa balo. Li scipovis glate kaj karese **rasli**. Pentri antaŭ ŝia avida naiveco bildojn de edena estonteco en la urbo. Estis ŝia unua kiso sur la buŝo.

La postan tagon ŝi kuris for el la hejmo, apenaŭ plenaĝa. Kun malbeno de la **geolduloj** kaj malpermeso iam reveni. La kunŝparitan **dinero** de sia modesta manlaboro, ŝi kunportis. Por fivivadi en strasa paradizo apud la malinda **lĵubato**. Ŝi estis pupeto, ludilo en liaj fiaj **pinĉiloj**. Kiuj same facile scipovis disspezi ŝian ŝparmonon kiel karesi ŝian veluran korpon. Kaj misuzi.

Post tri monatoj de pasia kunvivado, ilia **ledajo** jam malplenis. Kaj la senartifika knabina sekso jam tedis. Ekkrevis la sapveziko de ŝia feliĉo. Li diris simple adiaŭ kaj ne revenis plu al la komuna luĉambro.

Sed tiel senproteste ŝi ne rezignis. Ŝi batalis por la karega revo pri feliĉo. Serĉadis lin en la giganta malamika stratlabirinto. Dumtage kaj dumnokte. Ĝis preskaŭ elĉerpigo.

Tiam subite, jen li en akompano de fama **simeristino**. Riĉegulino. Kiun li ameme tenis ĉe la talio. Lia furioza rigardo interkruciĝis

unu sekundon kun tiu, petega, de la forlasita povrulino. Kvazaŭ **tranĉeŝo**. Bruske, li tiris sian novan konkeraĵon en taksion kaj sage malaperis. Tiel rapide, ke mi eĉ ne havis la okazon pripensi la ideon ĉu likvidi la friponon tie kaj tiam, aŭ ne. La kudristineto aliflanke konsistigis obstaklon por lia ambicio. Li deziris ŝin ekzilita al Luno. **Repa**, se necese.

Kolero tamen estas sensignifa koncepto por mi. Same kiel kompatato. Al mi estas glacie indiferece kion faras, aspiras aŭ pensas miaj **celtabuloj**. Ĉu ili estas valoraj elementoj en sia komunumo, aŭ superfluaĵoj parazitaj. Ĉu suferantoj aŭ ĝuantoj. Ili estas por mi nuraj **ofoj**, nuraj peonoj ŝovotaj sur ŝaktabulo. Likvidotaj. Sen ke la motivo por tio tuŝas min.

Do, ĉar la plano antaŭvidis ke mi tranĉu la vivofadenon de tiu malfeliĉa mildulino, anstataŭ tiun de la senskrupula deloginto, mi tute ne hezitis. Jam estis mi ĉe la mizera **bivako**. Senbrue mi **enplongis** la senĝojan ĉambreton. La kokidino sidis sur taŭzita litotolajo. Eĉ ne moviĝis pro mia eniro. Ŝi nur alrigardis min per ruĝrandaj, kaviĝintaj okuloj. El kiuj perlis plu neniu larmo. La tuta rezervo kredeble estis sekiĝinta.

Mi faris geston, kvazaŭ por ion **ekrasli**. Sed abrupte ŝi eligis dolorkrion. Malesperan. Eksaltis al la **okulajo**, kaj ĵete malfermis ties klapojn. Rapidege ŝi grimpis sur la sojlon. Kvazaŭ sciureto. Kaj lasis fali sian junan, delikatan korpon. Naŭ etaĝojn suben. Al la ŝtonpavimo.

Post du-tri minutoj mi jam povis trastreki ankaŭ tiun eron de mia agendo. Estintis facila **ĝobeto**. Mi eĉ ne bezonis apliki perforton. Nek pafilon. Nek alian mortigan **eŝon**.

* * * * *

Tiam mi devis vere hastegi, se mi ne volis maltrafi la sekvontan **dupon** en mia notkajero por tiu tago: grasa **grapej** direktisto, transen de la popolaĉa kvartalo. Li staris senbride fulmanta kontraŭ kelkajn subulojn de sia stabo. Ekruĝegis lia dikvanga **napo**. Jam de kelke da jaroj li suferadis je sekreta kormalsano. Sed ne volis atenti la simptomojn. Ne havis eĉ onon da tempo por tiaj privataj bagateloj.

Certe li miregis, vidante min ekaperi en lia luksa **kratejo**. Por eksciti ĝis paroksismo sian laciĝintan korpomotoron; ĝis definitiva kvietigo. Kiel sako da terpomoj li kolapsis antaŭ la konsternitaj

stabanoj. Ĉar estis lia nomo, kiu figuris sur mia listo, kaj ĉar estis indikitaj precize tiu loko, precize tiu minuto.

* * * * *

Mi ja disponas multajn rimedojn por **konfiti** homojn kaj bestojn. Homojn ofte kiel bestojn. Dekope aŭ centope aŭ milope, same facile kiel individue. Povas mi aperi ankaŭ en multe da formoj diversaj. Foje la plenumo de mia **ĝobo** estas atendata kaj alsopirata. Pli ofte ne. Sed ĉu mi ne diris, ke al mi estas indiferece kion pensas la **mutuoj** pri mia funkcio ? Aŭ kiumaniere ili min nomas: ĉu Moira, ĉu Pecjo Skeleto, ĉu Granda Falcisto, ĉu plej simple kaj senorname “Morto” ? Estas tute simple mia natura devo. Mi ne kapablas **postupi** aliel. Por tiu celo mi ekzistas.

Do, bonvolu senkulpigi min, kara leganto aŭ legantino, kiam mi baldaŭ — tro baldaŭ — estos devigita viziti ankaŭ vin, ĉar mi atingis vian nomon en mia agendo ...



Mobulo

4.6 La Ezoko

Teatraja skeĉo, originale verkita en Esperanto fare de Henri Vatré, por demonstri la esprimkapablon de la Internacia Lingvo ankaŭ en komike triviala (slanga) rilato. Unuafoje prezentita en Ĝenevo 1962.

La scenejo estas tiu de fiŝvendeja placo en Rusujo, sub la cara regno. Kompreneble, en klasika Esperanto sole eblas apliki metaforojn, kio estas nur unu el la rimedoj de efektiva slango.

Rolantoj

Liza Grigorievna: fiŝvendistino

Nikolaj Filipoviĉ: kliento

Duŝa Petrovna: klientino

Anonime: krianta gazetvendisto kaj aerpurigisto

LIZA – Ha, **ventro de kozako** ! Tiu Duŝa Petrovna petis, ke mi rezervu por ŝi mian plej belan fiŝon, kaj ŝi eĉ ne venis por ĝin preni. Mi estus povinta ĝin vendi jam dekfoje. Kion fari, diable !? Nu, jen venas Nikolaj Filipoviĉ. Mi ĝin al li proponu.

LIZA (al Nikolaj) – Freŝa fiŝo ! Hej, patreto, aĉetu freŝan fiŝon ! Profitu la lastan favoron !

NIKOLAJ – Ĉu nur tiun-ĉi solan fiŝon ci povas proponi ?

LIZA – Jes, animeto, la lastan, sed la plej belan. Mi ĝin konservis por ci, karuleto. Ĉiuj aliaj jam delonge forvendiĝis. Ĉu ĝi ne sufiĉas por cia apetito ?

NIKOLAJ – Nu, ne restas multe da elektebloj, patrineto.

LIZA – Ĉu ĝi ne plaĉas al ci, Nikolaj Filipoviĉ ?

NIKOLAJ – Ĉu vere ĝi estas freŝa ?

LIZA – Freŝa ? Kiel nova rozo, animeto. Ĉi-matena kapto, mi ĵuras al ci **je la sangaj ulceroj** de Sankta Vasilij !

NIKOLAJ – Hm ! Ŝajnas al mi, ke ĝi mortis de maljunaĝo jam antaŭ monato.

LIZA – **Korpo de porko** ! Ĝi mortis de amĉagreno. Belega peco. Prenu ĝin, ĉar simila okazo neniam plu pendos ĉe cia nazo.

NIKOLAJ – Dio min gardu ! ĉar, je la Dipatrino de Kazan, tiu-ĉi besto fetore odoraĉas !

LIZA – Pistu cin Petro ! ĉu ci volus, patreto, ke mi ĝin parfumu per kolonĵa akvo ?

NIKOLAJ – Tion ci nepre devus. Sed diru, Liza Grigorievna, je kiu prezo ci senigos cin de tiu-ĉi familia relikvo ?

LIZA – Trifuntan ezokon ... mi ĝin cedos por du Rubloj.

NIKOLAJ – Du Rubloj ? Ĉu ci perdis la saĝon ?

LIZA – Ci tamen ne supozas, kolombeto mia, ke mi leviĝis je la kvara matene por ŝmiri cian bekon per mielo kaj lasi al ci la tutan profiton de mia laboro ?

NIKOLAJ – Kisu al mi la piedfingrojn ! Du bonaj Rubloj por tiu-ĉi putra fiŝaĉo !

LIZA – Trinajla Kristo ! Prenu aŭ lasu !

NIKOLAJ – Mi proponas kompromison: mi prenas la fiŝon por unu Rublo kaj lasos al ci la odoron.

LIZA – Leku mian kaktruon, ci zigzag-nazulo !

NIKOLAJ – Zigzag-nazulo ? Mi ? Ĉu ci ne rigardis cian galoŝan mentonon ?

LIZA – Hej, bridu la langon, patreto, aŭ mi regalos al ci duoblan survangon !

(Alvenas Duŝa Petrovna.)

DUŜA – Liza, anĝeleta, mi venas en granda urĝo, rapide donu mian fiŝon !

LIZA – Cian fiŝon ?

NIKOLAJ – Cian fiŝon ?

DUŜA – Jes, la fiŝo, kiun mi mendis. Donu rapide. Ne limaku, ĉar miaj gastoj jam alvenis.

LIZA – Cijaj gastoj ? Mia mortinta edzo, Igor Ivanoviĉ, ĉiam diris, ke fiŝoj kaj gastoj estas egalaj; post du tagoj ili estas malbonaj. Li mem forpasis pro misglutinta fiŝosto, la karulo. Dio havu lian pekan animon. La maljuna porko senhonte postkuris la servist-inon. Sed kia temperamento ! Vera leono !

DUŜA – Lasu cian karmemoran edzon en paco, Liza Grigorievna, kaj paku mian fiŝon dum ĝi ŝajnas ankoraŭ freŝa.

LIZA – Ĉu mi ĝin paku kun iom da glacio ĉirkaŭe, patrineto ?

DUŜA – Unue, ci ĝin iom pretigu, entranĉu, malfermu, purigu kaj salizu.

NIKOLAJ – Kial ne ankaŭ frizi kaj parfumi ?

LIZA (al Nikolaj) – Ci silentu, **flavokula kukolo** ! (al Duŝa) Volonte ! Ĉu ci fritos ĝin kun terpomoj kaj karotoj ?

NIKOLAJ – **Germana sakramento** ! Nek terpomoj, nek brasikoj. Tiu-ĉi fiŝo apartenas al mi. Jen ciam du Rubloj. Donu ĝin tuj, patrineto !

DUŜA – **Furzo de bufo** ! De kie falas tiu **seka pediko** ? Aŭskultu, patreto, tiun-ĉi fiŝon aĉetis mi !

NIKOLAJ – Sed ankoraŭ ne pagis, ĉu ne, kunikleto mia ?

DUŜA – Mi pagos morgaŭ, kiam mia edzo Ivan Semjonoviĉ ricevos sian salajron.

NIKOLAJ – La salajron, kiun li jam fordrinkis. Cia edzo estas ebria diboĉulo. Mi kraĉas sur cian edzon. Pft !

DUŜA – Insulti mian edzon, ci, **latrinpedelo** ! Ivan Semjonoviĉ eltiros la ostojn varmaj el cia aĉa korpo !

NIKOLAJ – Lasu min ridi ! Ĉu ne suke ? Tiu **laksigilo por ratoj** ! **Lepto putrigu lin** !

LIZA (al Nikolaj) – **Fermu la kranon**, ci **sepvolva vipuro**, aŭ mi mem **ŝtopos al ci la umbilikon**. Ci, **fekajmuldilo, vomrestaĵo** !

NIKOLAJ – Nun sufiĉe kun ciam spicaĵoj. Donu al mi mian fiŝon. Jen la mono.

LIZA – Kial ci ne prenis pli frue, ci, **miskudrita fazeolo** !

DUŜA (al Nikolaj) – **Cimbredisto, cima pulo** !

LIZA (al Duŝa) – Ci aldonu dekon da novaj terpomoj, kelkajn karotojn, hakitan petroselon, frititan bulbon ...

NIKOLAJ – **Pesta intesto** ! Kial ci babilaĉas kun tia ... **senĝiba kamelino** ? Donu al mi mian fiŝon, aŭ mi ...

LIZA (al Nikolaj) – For, ci **frakvestita gorilo** !

DUŜA (al Nikolaj) – **Senŝela kolbaso, baŝibuzuko !**

LIZA (al Duŝa) – La fiŝon ci servu kun la ventron supre kaj garnu per onoj de citrono.

NIKOLAJ – La ventron supre ? **Sankta nazotruo !** Pura herezaĵo !
La bonaj moroj perdiĝas.

LIZA (al Nikolaj) – Iru for, **bakita skarabo, ŝima kataplasmo !**

NIKOLAJ (al Liza) – Donu mian fiŝon, ci, **miskurba kukurbo !**

DUŜA (al Nikolaj) – Iru al la hundoj, ci **ikonoklasto, fridpisanto !**

NIKOLAJ – Fridpisanto, mi ? Fridpisanto ! tion mi ne toleros ! Mi ŝatus cin murdi post elektitaj turmentoj, ci, **abortulino !** Prenu la putran fiŝon, ĝin manĝu kaj krevu !

GAZETISTO – Petu la lastan eldonon! Morto de Rasputin ! Lasta novaĵo ... Morto de Rasputin !

(Ĉiuj forkuras ekscititaj al la gazetvendisto. Envenas deĵoranta aerpurigisto kun bonodoriga ŝprucigilo.)

PURIGISTO – Ĉu Rasputin ? **Sankta porko** li estis ! Kia epoko ! Nun li beate putru. (Post ripeta funkciigo de la pumpilo kaj profunda enspiro) – Fine la atmosfero estas pli pura.

(Ĉiuj kunkantas kaj dancas laŭ la malnova rusa popolmelodio “*Zdrastvujtje, publiĉkij !*” :

Se vi ne kredas ĝin,
demandu de knabin’
ĉu ŝi ne sentas sin
jam en april’,
sed se vi scias jam,
kunĝoju pri la fam’,
ke mankas en la program’
la krokodil’ !

4.7 Fuŝita Eksperimento

Profesoro Higgins, fonetikisto antez Literom, en la 19-jarcenta Londono, ege malŝatas la afektemon de la britaj burĝaro kaj nobelaro. Li batalas por ĝusta prononcado de la angla koineo kaj estas lia konvinko ke sole elparolo kaj belmanieroj decidus pri la socia rango de homoj; ne ilia profesio aŭ deveno. Hazarde li renkontas la proletan florvendistinon Liza en kiu li ekvidas okazon por pruvi sian tezon. En sekreto li instruas al la volonta junvirino salonmanierojn kaj decan paroladon, helpate de sia amiko Kolonelo Pickering. Por unua elprovo de la jam atingitaj rezultoj, ili enkondukas ŝin riĉe vestitan ĉe kunveneto de altmediaj sinjorinoj kun kiuj ŝi babilu pri la vetero kaj similaj banalaĵoj, ŝanigante sin fraŭlino de eminente burĝa deveno. Sed ve, Liza baldaŭ glitas de la sendanĝeraj banalaĵoj al emociplenaj personaj memoroj, kio okazigas ankaŭ transiron de la kontrolata deca lingvaĵo al spice triviala lingvaĵo.

(Eliza, tre elegante vestita, impresas per tiel rimarkinda distingo kaj beleco dum sia eniro, ke ĉiuj leviĝas, sufiĉe malcertaj. Gvidate de la gestoj de Higgins, ŝi aliras Sinjorinon Higgins per kontrolata gracio.)

LIZA (parolante per pedanta ekzakteco en la prononcado kaj belmelodie) – Kiel vi fartas, Sinjorino Higgins ? (Ŝi spasme spiretas por certiĝi ke la H de Higgins noteblas, sed bone sukcesas.) – Sinjoro Higgins diris al mi, ke mi rajtas fari la viziton.

Sinjorino HIGGINS (kore) – Tutcerte. Mi vere ĝojas vidi vin.

(Sekvas iom ĝena paŭzo.)

Sinjorino HIGGINS (fine, konversacie) – Ĉu vi pensas ke ankoraŭ pluvos ?

LIZA (laŭ la ekzercoj, kiujn diktis al ŝi la profesoro) – La malprofunda depresio en la okcidento de tiuj-ĉi insuloj probable

moviĝos al orienta direkto. Ne estas indikoj pri iu granda ŝanĝiĝo en la barometra situacio.

FREDDY – Ha, ha, ha ! Kiel spritege !

LIZA – Kio misas en tio, juna viro ? Mi certas, ke mi diris ĝin ĝuste.

FREDDY – Frakase !

Sinjorino EYNSFORD HILL – Mi tre esperas ke ne iĝos tro malvarme. Estas sufiĉe da gripo en la urbo. Mia tuta familio regule malsaniĝas pro ĝi en la printempo.

LIZA (morne) – Mia onklino eĉ mortis pro gripo. Almenaŭ, tion oni diris. (S-ino E-H eligas kompateman “ts ts ts”. Sed mi opinias ke oni tute simple **konfitis** la maljunan virinon. (Higgins kaj Pickering akuze rigardas unu la alian, kvazaŭ ĉiu volus igi la alian responsa, ĉar tiu ankoraŭ ne sufiĉe profunde preparis la knab-inon al tiu-ĉi lasta ne ekzercita frazo.)

Sinjorino HIGGINS (nekomprene) – Ĉu “konfitis” ?

LIZA – Jeees, Dio kompatu ! Kial ŝi ja mortu pro gripo ? Ŝi bonege travivis **gorĝobruniĝon** [diferiton] en la jaro antaŭ tio. Mi tiu-okaze vidis ĝin propraokule. Preskaŭ bluvizaĝa ŝi estis ! Ĉiu kredis ŝin jam morta, sed mia patro, tiu obstine plu kuleradis brandon en ŝian gorĝon. (Higgins, kiu plu ne scias kion fari por savi la situacion, balancigas teotaseton sur sia kapo, farante kelke da paŝoj sen elverŝi unu solan guton, esperante deturni la atenton, sed vane.) – Fine ŝi rekonsciĝis kaj eĉ tiel abrupte, ke ŝi dismordis la kavaĵon de la kulero.

Sinjorino E-H (konsternite) – Ĉielo !

LIZA (nun sen konscio plene aĉigante la situacion) – Mi demandas al ci kiamaniere virino, kun tia forto en sia korpo, povus morti pro gripo ? Kaj kio okazis al ŝia nova pajloĉapelo, kiu fakte estis apartenonta al mi ? Iu ĝin **ungis** ! (Higgins ventumas al si per la arĝenta pleto de la teotablo.) Kaj kion mi volis diri: tiuj kiuj **ungis** la ĉapelon, ankaŭ **konfitis** ŝin !

Lordino BOXINGTON (nerveme kaj laŭtvoĉe) – Ĉu “konfitis ŝin” ? Kion signifas tio ...?

HIGGINS (haste) – Ho, tio estas nur novmoda ĵargon-esprimo. “Konfiti” signifas “mortigi”.

SinJORINO E-H (ege ŝokite al Liza) – Tamen, vi ne kredas serioze ke via onklino murdatiŝis !?

LIZA – Ĉu ne farus mi ? Tiuj, kun kiuj ŝi vivadis, estus ŝin murdinta pro eĉ nura ĉapelopingleto, se silenti pri ĉapelo !

SinJORINO E-H – Sed ne povis esti ĝusta ago de via patro tia maniere verŝadi alkoholon en ŝian buŝon. Tio estus povinta mortigi ŝin !

LIZA – Ho, ne ŝin ! Al ŝi la brando estis kvazaŭ patrinlakto. (Pickering ŝrumpiĝas. Higgins decidas iri for, metas salutan fingron kontraŭ sian ĉapelon kaj ekas. Spite, lia nekontrolebla scivolemo last-momente retenas lin je la pordosoĵlo, por aŭdi kion Liza ankoraŭ estis dironta.) – Cetere, li estis verŝeginta tiom multe tra la propra gorĝo ke li perfekte konis la efikon.

Lordino BOXINGTON – Ĉu vi volas diri, ke via patro trinkadis ?!

LIZA – Trinkadis ? Tondre, li **drinkis** !

SinJORINO E-H - Kiel terure por vi !

LIZA – Tute ne. Tio neniam kaŭzis malbonaĵon al li, kiom mi vidis. Sed li ankaŭ ne faris tion senĉese. (Gajtone) – Je la **hapeno**, kiel oni diras, de tempo al tempo. Kaj li estis ĉiam pli afabla kiam li iom **vagadis en vaporoj**. Ĉiufoje kiam li estis sen laboro, mia patrino kutimis doni al li kvar **Azenojn** por ke li eliru kaj ne revenu antaŭ ol esti **drinkinta** sin mem gajhumora kaj amema. Estas multe da virinoj kiuj devas igi siajn edzojn ebriaj, por igi ilin taŭgaj al kunvivado. (Nun tute senĝene) – Vidu, estas tiel-ĉi: kiam viroj havas peceton da konscienco, tiu riproĉas al ili dum sobreco kaj tio igas ilin **mavhumoras**. Guteto da **beberaĵo** kontraŭe forprenas la pezon kaj faras ilin feliĉaj. (Al la junviro Freddy, kiu tordiĝas pro subpremata ridado.) – Nu, pro kio subridas ci ?

FREDDY – Pro la nova parolmaniero. Vi tiel lerte scipovas fari tion!

LIZA – Se mi faris ĝin konvene, kial vi do ridas ? (al Higgins) – Ĉu mi diris ion kio ne decas ?

SinJORINO HIGGINS (intervene) – Neniel, Fraŭlino Doolittle.

LIZA – Nu, tio estas konsolo, almenaŭ. (Komenteme) – Kion mi ĉiam diras, estas ke ...

HIGGINS (ekstaras kaj rigardas al sia horloĝo) – Hum, hum !

LIZA (alrigardas lin, komprenas la geston kaj ekstaras) – Nu, mi devas iri for. (Ili ĉiuj ekstaras. Freddy iras al la pordo.) – Estis granda plezuro renkonti vin ! Ĝis revido !

Prenita el Akto 3, Sceno 4, de la monde fama teatraĵo *PYGMALION*, verkita de G.B. Shaw en 1916. La teatraĵon reaparigis kiel muzikfilmon en 1964 George Cukor, sub la titolo *My Fair Lady*.

BOTCHED UP TEST

(Eliza, who is exquisitely dressed, produces an impression of such remarkable distinction and beauty as she enters, that they all rise, quite fluttered. Guided by Higgins's signals, she comes to Mrs. Higgins with studied grace.)

LIZA (speaking with pedantic correctness of pronunciation and great beauty of tone) - How do you do, Mrs. Higgins ? (She gaspes slightly in making sure of the H in Higgins, but is quite successful.) - Mr. Higgins told me I might come.

Mrs. HIGGINS (cordially) - Quite right; I'm very glad indeed to see you.

(A long and painful pause ensues.)

Mrs. HIGGINS (at last, conversationally) - Will it rain, do you think ?

LIZA - The shallow depression in the west of these islands is likely to move slowly in an easterly direction. There are no indications of any great change in the barometrical situation.

FREDDY - Ha, ha, ha ! how awfully funny !

LIZA - What is wrong with that, young man ? I bet I got it right.

FREDDY - Killing !

Mrs EYNSFORD-HILL - I'm sure I hope it won't turn cold. There's so much influenza about. It runs right through our whole family regularly every spring.

LIZA (darkly) - My aunt died of influenza; so they said.

Mrs EYNSFORD-HILL (clicks her tongue sympathetically) - Ts ts ts !

LIZA (in the same dramatic tone) - But it's my belief they *done* the old woman *in*.

Mrs HIGGINS (puzzled) - "Done her in" ?

LIZA - Y-e-e-es, Lord love you ! Why should she die of influenza ? She come through diphtheria right enough the year before. I saw her with my own eyes. Fairly blue with it, she was. They all thought she was dead; but my father, he kept ladling gin down her throat till she came to so suddenly that she bit the bowl off the spoon.

Mrs EYNSFORD-HILL (startled) - Dear me !

LIZA (piling up the indictment) - What call would a woman with that strength in her have to die of influenza ? What become of her new straw hat that should have come to me ? Somebody *pinched* it; and what I say is, them as *pinched* it *done her in*.

Mrs EYNSFORD-HILL - What does "doing her in" mean ?

HIGGINS (hastily) - Oh, that's the new small talk. "To do a person in" means to kill him.

Mrs EYNSFORD-HILL (to Eliza, horrified) - You surely don't believe that your aunt was killed ?!

LIZA- Do I not ! Them she lived with would have killed her for a hatpin, let alone a hat.

Mrs EYNSFORD-HILL - But it can't have been right for your father to pour spirits down her throat like that. It might have killed her.

LIZA - Not her. Gin was mother's milk to her. Besides, he'd poured so much down his own throat that he knew the good of it.

Mrs EYNSFORD-HILL - Do you mean that he drank ?

LIZA - Drank ! My word ! Something chronic.

Mrs EYNSFORD-HILL - How dreadful for you !

LIZA - Not a bit. It did him no harm what I could see. But then, he did not keep it up regular. (*Cheerfully*) *On the burst*, as you might say, from time to time. And always more agreeable when he *had a drop in*. When he was out of work, my mother used to give him fourpence and tell him to go out and not come back until he'd drunk himself cheerful and loving-like. There's lots of women has to make them fit to live with. (Now quite at her ease) - You see,

it's like this: if a man has a bit of a conscience, it always takes him where he's sober; and then it makes him *low-spirited*. A drop of booze just takes that off and makes him happy. (To Freddy, who is in convulsions of suppressed laughter) - Here, what are you sniggering at ?

FREDDY - The new small talk. You do it so awfully well !

LIZA - If I was doing it proper, what was you laughing at ? (To HIGGINS) - Have I said anything I oughtn't ?

Mrs. HIGGINS (interposing) - Not at all, Miss Doolittle.

LIZA - Well, that's a mercy, anyhow. (Expansively) - What I always say is ...

HIGGINS (rising and looking at his watch) - Ahem !

LIZA (looking round at him; taking the hint and rising) - Well, I must go. (They all rise. Freddy goes to the door.) - So pleased to have met you ! Good-bye.



mornulo – dekto - spuristo

4.8 Ladokolportistoj

Siatempe fifamega krimulo en Usono, “Goat”Laven, rakontas sian vi-historion al ĵurnalisto.

Ni ne sciis en kiu parto de la urbo ni troviĝis, nek kia klaso de homoj ĝin vizitadis aŭ prilogiĝis. Kiel **palpaĵo**, por ekscii en kiu speco de hotelo mi troviĝis, ĉe la malsupreniro mi renkontis la hotelan komizon, kiu aspektis tre **altsveba knabego**. Do, mi parolis la slangolingvaĵon kun li, kiel **palpaĵon** por malkovri ĉu li estas **regula**.

Kion mi diris estis: “Bonan matenon, kiel fartas l’artifiko?” — kio konsistigis specon de kodvorto. Nuntempe ankaŭ komercistoj kaj teatruloj utiligas slangon kiun nur ŝtelistoj kutimis uzadi, sed en tiu momento tiu-ĉi frazo certe estis fidinda **palpaĵo**. Do, tiu-ĉi viro, li komprenis ke ni ne estas **sprosoj**, kaj li salutis nin konforme. Sidante en la hotelvestiblo ni **okulmezuris** la okupantojn de la **kasao**, kaj konkludis ke ni restadas en bona vivloko. Tio estas: ili ne tro interesiĝis pri tio kion oni faras, tiel longe kiel oni pagas sian luprezon.

La unua amuzejo kien ni iris, estis la trinkejo de Hein Cadoodle. Se iu viro aŭ virino tie faris **fulmigon** de io ajn, tiu iĝis **torpedita** aŭ priŝtelita, sed neniam povis foriri kun sia mono, krom se li aŭ ŝi apartenis al la **knabegoj** mem. Do, la **knabegoj** nin alrigardis, klopodante malkovri ĉu ni estas **dupoj** aŭ **ungistoj**. Sed ni dissemis kelkajn rimarkojn, **palpante** la trairon, kaj ili decidis ke ni estas en ordo.

Ni komencis pensadi kiel gajni iom pli da mono; sekve ni enfalis biljart-salonon. Ĝi situis en la Ŝtatostrato — mi plu ne memoras precize kie — kiu tiutempe estis fifama **ferdeko**; ĉiuj **knabegoj**, de **ladokolportistoj** ĝis **levigistoj**, kutimis kunvenadi tie. Ladokolportisto estas ulo kiu aĉetas falsajn juvelojn kaj markas ilin kiel 14-karatajn. Ekzemple, li aĉetas ringeton kun vitra diamanto en ĝi; tiam li faras travestion, surmetante kornokradajn okulvitrojn kaj tiaspecaĵojn. Poste li elektas homojn kiel turistojn, laboristojn, kaj speciale taksiŝoforojn; junaj viroj kiuj kredas sin **altsvebuloj**, sciantaj ĉiujn demandojn kaj respondojn, sed kiuj envere ne scias la horon de la tago.

Tiel, li aliras sian **celtabulon** kaj, per lertaj paroloj igas la **tabulon** aĉeti la ringon sub preteksto ke li ĵus trovis ĝin. Aŭ alia taktiko,

kiun uzas veteranoj aŭ pli fajnaj aŭ spertaj praktikistoj, estas kunpreni kun si virinon; ŝi tenas bebon en la brakoj; ili proksimiĝas al afabla maljuna sinjoro, kiu povas esti kamparano vizitanta la urbon dum kelke da feriotagoj. Tiam li pentras dramaĉan historieton por li, dirante: “Staras miaj edzino kaj infaneto tie, sed mi ne ŝatus ke ŝi eksciuj, ke mi bezonas vendi ŝian ringon por manĝaĵoj.”

Tiuj-ĉi ŝtonoj estas konataj kiel “fiksaĵoj de Pitsburgo” kaj oni povas aĉeti ilin por tri Dolaroj po dozeno, jam prete stampitaj. Ili estas orumtegitaj, 14-karataj. Oni ankaŭ vendas horloĝojn, altigas 7-karatajn gemojn al 17 Karatoj, kaj tiaspecaj ĝobajoj.

Nu, ni komencis iom ludi biljarton kaj interkonatiĝis kun la kruktoj. Ne necesis homo kun granda inteligento por vidi ke ni trafis en fifama ejo. Iuj kruktoj envenis kaj komencis dividadi kelkajn pismojn el agendo kiun ili ĵus estis forprenintaj de tabulo. Ni ekprovis listigi nin en tiu brigado, kaj ni renkontis iun Itokon, samlandano de mia bubulo, kaj tiu informis nin ke Chicago estas plej taŭga laborloko. Li diris: “Ni ne uzas pafeŝon tie por kapti ordinaran celtabulon; ni aplikas paliceton je li, aŭ ni manikumas lin. La knabegoj tie, kiam aferoj iĝas danĝeraj, portadas gastubon aŭ paliceton volvitan en gazetpapero. Elektinte sian tabulon, ili tiun bategas sur la kapo per la paliceto, ĉiam volvita en la papero, lin elskuas kaj tiam promenas for kvazaŭ nenio estus okazinta.

Tirita el la bildrakonto *Les P.N. et leur fils adoptif* (La N.P. kaj ilia adoptita filo), publicita en Parizo 1973, kun afabla permeso.







TIU IDEO AKCEPTAS. EVIDENTE NE POVAS ESTI DEMANDO PRI PROCEDADO AL LAŬLEGA ADOPTO PAROLO DE LA NIKELPIEDULOJ ESTANTE MEM-SUFICA. ĜOJE, LA KABO OKUPAS SIN DUM LA SEKVANTAJ TAGOJ PER LA NUTRADO DE SIAJ ADOPTOPATROJ, SED TIO NE POVAS DAŬRI SEN-FINE, ĈAR LIA MONO FORFANDIGAS ... KIO PLI ESTAS: LA NIKELPIEDULOJ NE POVAS TOLERI PLI LONGE KE INFANO SUBTENI ILIN, EĈ SE TIU ESTAS ADOPTOFILO.

Mi hontas ...

Mi sam-sam ...

Tio ne povas daŭri plu ...
Mi riskos ekpaŝon ...
Ne grave se mi englutos
la hokon ...

Mi, mi volas
volas proponi
scenaron !

CHARLES FARAS AL ILI PROPONON: PRIŝTELI LUKSAN VILAON. FAKTE ESTAS LA PROPRAĴO DE UNU EL LIAJ ONKLOJ, KIUN LI MALŜATEGAS ...

Estas plene da altvaloraĵoj ...
neniam estas loĝanto !

POST SUFIĈE DA HEZITADO, LA NIKELLULOJ AKCEPTAS, KAJ LA POSTAN VESPERON ...

Estas facile ŝetapertebla
flugilo malantaŭe !

Tondre, ci ja
bornege frandas
la ĉokoladon !

4.15 Militpaŭzo kun la Medio

Jan de Hartog (1914-2002) estis multeverka romanverkisto nederlanda, kiu dummilite fuĝis al Britio kaj ek-de tiam skribis ankaŭ anglalingve. Li skribis egale verve kaj atentokapte teatraĵojn (*Skipper next to God, The fourposter*) kiel historiaĵojn (La Geŭzoj de Dio, La pacama Regno = pri Kvakeroj). Dum restado en Usono (1963), li verkis laŭvere pri la teruraj vivokondiĉoj en hospitalo de Houston (*The Hospital*) kio vekis tian venĝemon ke li devis fuĝi el la lando.

El liaj sukcesplenaj detektivromanoj antaŭmilitaj mi elektis *Spoken te koop* (Fantomoj por vendo), verkitaj sub pseŭdonimo F.R. Eckmar, pro la dialektecaj kaj slangaj dialogoj en ĝi [vd ankaŭ en Popido] – Eldono Elsevier, Amsterdamo 1972.

“Longa Daan, ci **polvizas** min, knabo !” diris Inspektisto Boyarski, sub admona minaco de sia montrofingreto. Ili staris apogante sin duope kontraŭ la bufedo de la “La Kabaredo” de Julieta; ekstere la suno ŝvebis alte en la ĉielo, sed en la “gaja amuzejo” ŝajnis regi daŭra nokto.

Longa Daan kun granda malestimo kraĉis demandosignon sur la polvan plankon.

“Suspektema homo ne meritas sian **manĝofon**.” Lia nodeca malgranda fingro indikis la “garnitan sandviĉon”, kiun li estis prezentinta kiel kulpopagan oferon al la malgranda viro.

Yarski suspiris, frapetis amike la ŝultron de la Longulo, ĝuste super la brustopoŝo de ties veŝto, vaka je butonoj. “Aĥ, Daan...” li murmuris kapobalancante, “Aĥ, Longulo... Tondre ! Kio sidas tie?” Liaj diligentaj fingroj pripalpis la verdebrilan surfacon de la brustokovraĵo de Daan.

“He ?” grumblis tiu konsternite, serĉkaptis en sia veŝtopoŝeto kaj elfiŝis malnovmodan broŝon, kiun li rigardis per grandaj mirigitaj okuloj, ree kaj ree ĝin turnante. “Krevu...” li balbutis. “Mi povus ĵuri, ke mi donacis tiun aĵon al Jetje !”

“Fi !” kriis la eta inspektisto indignite. “Fi, Daan ! Ci do tamen **kukumis** min !”

“Kiel do ?” informpetis la alia, subite suspektema.

“Ĉu ci ne diris, ke la **porketo**, kiun Jaapje Ladder kunportis el la Betuwe-regiono, estis subite malaperinta ?”

“Jes ! Nu, kaj ? “

Malica lumo ekardis en la akraj okuloj de la Longulo. Liaj pugnoj kunpremiĝis tiele ke la fingrartikoj krakis.

“Kiamaniere ci akiris tion, etulo ?!” siblis li. Lia varmega spirado viŝblovis trans la frunton de Yarski.

“Samkiel ci, Longulo,” venis la trankvila respondo.

Daan batalis en silento. Oni neniam scias ... homoj devas esti prudentaj kun tiaj **angilopetroj** kia tiu-ĉi...”

“Mi ĵus trovis ĝin en la poŝeto, dum ci ĉeestis,” li diris malafable.

“Kaj mi pensis ke ci kredas esti doninta ĝin al Jetje ?”

“Estis iu alia. Tiun-ĉi aĵon mi ĵus trovis en la poŝeto...”

“Strange; ankaŭ mi ĝin trovis en iu poŝeto, sciu !”

“Ĉu ci ?”

“Jes, mi.”

“Kieee ?!”

“En la subjupa poŝeto de Jetje.”

La Longulo grumblis. La vivo de Yarski pendis je silka fadeno. Tiam li kraĉis, kiel lamo post engluto de mustardo, kaj diris per forta amara voĉo: “Kaj tiuloj devas konduki nin al la rekta vojo !”

“Nu, jes, Longulo, celo sanktigas la rimedojn, knabo ...”

“Jen ĝuste kion ankaŭ mi kutimas diradi !”

La unuan fojon de-post tre longa tempo Inspektisto Boyarski de la Havenpolico ne trovis vortojn por respondi.

Longa Daan pro spito mem formangis la garnitan sandviĉon.

“Unue li ĝin **krastas** de sinjorino el sub ŝiaj jupoj, kaj poste li ĝin ĉifumas en mian veŝtopoŝeton ... Jen kion mi nomas imperinenta !” li kartavis per plena buŝo.

Wapenstilstand in het milieu

"Lange Daan, je *bedondert* me, jongen !" zei inspecteur Boyarski onder bestraffend dreigen van zijn wijsvingertje. Ze stonden ge-tweeën tegen de tapkast van Jetjes Cabaret geleund; buiten stond de zon hoog aan de hemel, maar in de leutige lokaliteit scheen het altijd nacht te zijn.

Lange Daan spooog met grote minachting een vraagteken op de stoffige vloer.

"Een kwaaddenkend mens, *is z'n bikkie niet waard.*" Zijn knoestige pink wees op het <broodje halfom>, dat hij de kleine man bij wijze van zoenoffer had aangeboden.

Yarski zuchtte, klopte de Lange vriendschappelijk op de schouder, juist boven het borstzakje op diens van knopen verstoken vest. "Ach Daan ..." mompelde hij hoofdschuddend. "Ach Lange, ... *verhip*, wat zit daar ?" Zijn vlugge vingers tastten over het groenglimmige oppervlak van Daan's borstbeksleedsel.

"Hè ?" bromde deze onthutst, grabbelde in zijn vestzakje en viste er een ouderwetse broche uit op, die hij met grote verbaasde ogen bekeek, terwijl hij haar om en om draaide. "*Verrek...*" stamelde hij. "Ik zou d'r op kenne zwere dat ik dat ding an Jetje kado had gedaan ..."

"Foei !" riep de kleine inspecteur verontwaardigd uit. "Foei, Daan ! Je hebt me dus toch *besjoemeld!*"

"Hoezo ?" informeerde de ander, plotseling achterdochtig.

"Zei je niet, dat de *poet*, die Jaapje Ladder meegebracht had uit de Betuwe, plotseling verdwenen was ?"

"Ja. Nou, en ?"

"Ja... èn !" meesmuilde de kleine man.

Een kwaadaardig licht gloeide in de scherpe ogen van de Lange. Zijn vuisten balden zich dat de knokkels kraakten.

"Hoe kom JIJ daaran, kleine ?!" siste hij. Zijn hete adem vleugde over Yarski's voorhoofd.

"Net zoals jij, Lange," kwam het rustig antwoord.

Daan vocht in stilte. Je kon nooit wete ... een mens most voor-zichtig weze met een *gladakker* as deze hier ...

"Ik vind 't zonet in me zakkie, waar je bij stong," zei hij nors.

"En ik dacht dat je 't aan Jetje gegeven meende te hebben?"

"Dat was een ander. Dit ding vind ik net in me zakkie..."

"Gek, ik heb 't ook in een zakkie gevonden, mot je weten."

"Jij ?!"

"Ja, ik."

"Waaroo ?"

"In Jetjes onderrokszakkie."

De Lange gromde. Yarski's leven hing aan een zijden draad. Toen spoog hij als een lama die mosterd geslikt heeft, en zei met grote, bittere stem: "En dat mot ons nou op 't rechte pad brenge !"


"Ja, Lange, 't doel wettigt de middelen, jongen ..."

"Da's nou krèk wat ik ook altijd zeg, hè."

Voor het eerst sinds zeer lange tijd was inspecteur Boyarski van de Havenrecherche om een wederwoord verlegen.

Lange Daan at uit protest 't broodje halfom zelf op.

"Eerst *jat*-ie 't een dame onder d'r rokken vandaan en dan *frommelt*-ie 't in m'n fessiezakkie... je mot maar pertaal weze !" snauwde hij met volle mond.



rjadovo en sia štalskatolo

4.16 Fatala Pokerludo

Tony, dura krimulo antaŭ nelonge forlasis la prizanon. Post lia multjara karcerpuno, lia famo kiel sentima gangstero sufiĉe paliĝis en la “medio”. Unuafoje li nun reludas pokeron kun samspecanoj, sed daŭre perdas altajn sumojn. Ĝis kiam li ricevas kaŝinformon, ke en la partio estas juna fals-ludanto.

Kun ŝultroj volbitaj, kapo klinita, la Etjenano ŝajnis okupi sin nur pri sia ludo. Oni vidis plu nenion de li, escepte la supron de lia kaŝtankolora feltoĉapelo. Ne sekvante, li atendis ĝis la disdonvico estos al la Nicano. Li vere ŝajnis interesiĝi sole pri siaj ĵetonoj, aranĝitaj antaŭ li. Sed sub la ŝlapo lia dekstra okulo ne ĉesis smotradi la **handojn** de la Nicano, kiu miksis la **kartonojn**. Subite, lia voĉo siblis kiel viprimeno: “Lasu ciajn **pinĉilojn** kie ili estas, etulo ! Ne plu moviĝu !”

Li ilin movis, la siajn, nia Tony. En lia pugno ekaperis **kalibro** kun mallonga muzelo, garnita per senbruigilo; donaco de Roger el **Frisko** [San Francisco en Usono].

“Ne provu preni cian **pafeŝon**, ci **Bordujano**,” ordonis li, vikle ekstarante. “Lasu ciajn **ungojn** sur la **mindado** ! Je la plej eta gesto, **estos cia festotago** !”

Senĉese okulrigardante la tablorondon, li lokigis sin malantaŭ la Bordoanon. La nuko de tiu **mutuo** estis alloga, rozeca, sen-obstrukcia. Tony ĝin frapis per sia armita pugno. La **oko** sinkis sur la seĝon. La **injektilo** de la Etjenano sidis denove en pafpozicio. Glitigante sian maldekstran manon sub la brakon de la Bordoano, li aperigis ties pafilon, ŝovitan malantaŭ la zono. Ĉu P.38 ? Bela ilo ! Per sia dikfingro li mallevis la sekurbutonon: la malgranda ruĝa F por “fajro” aperis. Li proksimiĝis al la Nicano. Ties-ĉi manoj, sur la **bundelo** de kartoj, tremis. Ŝvito likis de lia **melono**; ĝi tratremis lian perlogrizan bersalino-ĉapelon.

Per la P.38 la Etjenano seke frapis la fingrojn de la junulo. Li ordonis: “Returnu la pakajon da **lartoj**. Mi volas **jari** la tri lastajn!”

La alia obeis. La okuloj de la Etjenano ekflamis, rimarkante tri kunfiksitaĵojn. “Tiele do, ci volis **trabreĉi** min, juna **kojonulo** ! Ĉi kredis ke mi estus kaptebla per tia truko !”

“Sed, Tony...” klopodis la Nicano, konsternegita pro **miedo**.

“La **klapon** fermu !”

“Tamen, Tony...” klopodis siavice la estro de la **kajuto**.

La Etjenano **smotris** lin unu sekundon, sendis rigardon al la du aliaj **igratantoj**, **piĉistoj** kiuj laborigis siajn **damaĉojn** ie en Svisio, kaj grumblis: “Mi scias, ke vi tri ne estas en la komploto. Do, **staru je ripozo** ! Komprenite ?”

Per sia **vorujita** pugno li faris signon al la **kasoko**. “Kiom da **gipso** tenas ci en la **grapuĵo** ?”

La **Pjernulo**, kies flava haŭtkoloro ĝiris al griza, balbutis: “Dek du cent **Klabojn**.”

“Metu ilin antaŭ min kaj **preste** !”

“Tony...”

Unu el la **marorozoj** estis leviĝonta proreflekse. Antaŭ la **artilerio** subite direktita liaflanken, li residiĝis.

“Tiuĵ-ĉi **pismoj** estas al ni ĉiuj,” li spĉite havis la kuraĝon daŭrigi. “Ni estas **regulaj**. Ni ne **frandis la ĉokoladon** ke estas **kukumisto** en la partio. Ke ci reprenu cian **djengon**, estas juste. Sed ne la nian !”

La Etjenano aperigis komencon de cinika rideto elreviga. Mal-antaŭen paŝante, li iris dehokigi sian surtuton. En unu el la **fosuĵoj** li ŝtopis la P.38 kaj, surmetinte la vestaĵon, revenis al la tablo. Per sia libera **hando** li kunrastis la **kasafon**, kiun estis sur ĝin deponinta la lamulo.

“Vi **elmerdiĝu** inter vi !” li mordis el la buŝangulo. “Kaj nun ci, la...” La Bordozano elpuŝis ĝemon. Sango ruĝe makulis la blankan kolumon de lia silka **ŝirto**.

Tony lin **alsmotris**, poste reportis sian rigardon al la Nicano. Li reparolis: “Nun al ci, junulo, por evitigi al ci fanfaroni ke ci **kukumis** min ĉe la pokero, mi havigos al ci ...”

Odoro pli forta ol tiu de fumo kaj alkoholvaporo diskrevis la aeron. La Nicano estis kotaĉiginta sian **brukon**. Liaj **fenestroj** malfermiĝis terurigitaj. La **miedo** gluis sur lian retinon grizecan vualon; li certe plu ne multon distingis, tiu-ĉi specialisto de la **fiĝarado**.

Dekonon de sekundo la **ŝutilo** de Tony eksaltis en la kavaĵo de lia pugno. Estis ĉiam tiumaniere ke li kutimis pafi. Iom suben, por reveni al la celataĵo. Trifoje sinsekve li disĵetis la **karamelajon**. La

unua *stala fabo* estis *heririnta* la Nicanon en lia frunto, sub lia 'perlogriza'. La du sekvantaj, pli malsupre, ĉe la vangoj. La *fifrato* sinkis antaŭen, en siajn proprajn brakojn. Lia borsalino ruliĝis sur la tablon. Ero de cerbo platiĝis kontraŭ la tri asoj ...

La partie de poker fatale

Epaules voûtées, tête rentrée, le Stéphanois parut s'intéresser à son jeu. On ne voyait plus que le dessus de son feutre marron. Sans suivre, il attendit que la donne soit au Niçois. Il semblait vraiment ne s'occuper que des *plaques* disposées devant lui. Mais sous le bada, son oeil droit ne cessa pas de *bigler* les *paluches* du Niçois qui battait les *cartons*. Soudain, sa voix siffla comme une lanière:

"Laisse tes *pognes* où elles sont, p'tit. Bouge plus !"

Il les bougeait, les siennes, le Tony. Dans son poing venait de jaillir un *calibre* au muflé court, muni d'un silencieux: un cadeau de Roger de Frisco. "Essaie pas de prendre ton *flingue*, toi, l'Bordelais," ordonna-t-il, en se levant vivement. "Laisse tes *griffes* sur la *carante*. Au moindre geste, c'est ta fête!"

Sans cesser de surveiller la table, il vint se poster derrière le Bordelais. La nuque du *gonze* était tentante, rose, bien dégagée. Tony l'écrasa de son poing armé. Le *gniard* s'affaissa sur sa chaise. La *seringue* du Stéphanois était de nouveau en position de tir. Glissant sa main gauche sous le bras du Bordelais, il s'empara du *feu* planqué dans la ceinture. Un P.39 ? Bel outil ! Du pouce, il rabattit le cran de sûreté: l'F rouge minuscule apparut. Il s'approcha du Niçois. Les mains de celui-ci, sur la *packson* de cartes, tremblaient. La sueur giclait de son *trognon*, elle trempait son Borsalino gris perle.

Avec le P.38, le Stéphanois cogna sec les doigts du jeunot. Il ordonna: "Retourne-mois le paquet *d'brèmes*, j'veux *mater* les trois dernières."

L'autre obéit. L'oeil du Stéphanois prit feu en apercevant trois as accolés.

"Ainsi, tu voulais *m'doubler*, jeune *connard*. T'as cru que j'pouvais être nature à c'truc-là !"

"Mais Tony !..." tenta le Niçois, décomposé par le *tracsir*.

"Ta *gueule* !"

"Voyons, Tony ..." tenta à son tour le *taulier* du *clandé*.

Le Stéphanois le *zieuta* une seconde, expédia un coup de *châsses* aux deux autres *flambeurs*, des *daurés* qui avaient leurs *gonzesses* en Suisse, et grommela: "J'sais que vous trois, vous n'êtes pas dans l'coup. Alors, mettez-la en *veilleuse*. Compris ?"

De son poing *enfouaillé*, il fit signe au *carreur*. "Combien que t'as d'*pognon* dans ta carre ?"

La *Gambille*, dont le jaune du teint virait au gris, balbutia: "Douze cents *sacs*."

"Pose-les devant moi et *fissa*!"

"Tony ..." Un des *harengs* venait de se lever à demi, par réflexe. Devant l'artillerie subitement braquée de son côté, il se rassit. "Ces *lovés* sont à nous tous," eut-il néanmoins le courage de poursuivre. "Nous, on est *réguls*. On n'était pas *au parfum* qu'y avait un *turbin* dans la partie. Que tu récupères ton *aspine*, c'est juste. Mais pas la nôtre !"

Le Stéphanois amorça un sourire cynique, désabusé. A reculons, il alla décrocher son pardessus. Dans l'une des *glaudes*, il fourra le P.38 et, après avoir endossé le vêtement, revint vers la table. De sa *pogne* libre, il rafla le *fric* que venait d'y déposer le boiteux.

"Vous vous *démerderez* entre vous," lâcha-t-il du bout des *crocs*. "Maintenant, toi, le ..." Le Bordelais poussa un gémissement. Du sang tachait de rouge le col blanc de sa limace de soie.

Tony le *bigla*, puis ramena son regard sur le Niçois. Il reprit: "Maintenant toi, le jeunot, pour t'éviter de te vanter de m'avoir *cavé* au poker, j'vais te ..." Une odeur plus forte que celle de la fumée et des alcools creva dans l'air. Le Niçois venait de saloper son *froc*. Ses *carreaux* s'ouvrirent, horrifiés. La frousse plaquait sur sa rétine un voile grisâtre; il ne devait plus y voir grand-chose, le spécialiste du *flambe* !

Un dixième de seconde, le *flingue* de Tony sauta dans le creux de sa *pogne*. C'est toujours de cette façon qu'il tirait. Un peu bas, pour remonter à la cible. Trois fois de suite il *balança la sauce*. La première *bastos* avait *morflé* le Niçois au front, sous le <gris perle>. Les deux suivantes, plus en dessous, vers les joues.

Le *malfrat* s'écroula en avant, dans ses propres bras. Son Borsalino roula sur la table. Un brin de cervelle s'aplatit sur les trois as.

Kiam Tony konstatas, ke lia amatino Mado ne restis fidela, li iĝas venĝema kontraŭ la socio kaj, spite la danĝeron, decidas preni parton en ambicia krimo kiun planas liaj amikoj Jo kaj Mario. Ili detalege organizas prirabon de granda juvelejo, en kio asistos Cesar, itala eksperto pri monŝrankoj. La plano plenumatas tutperfekte kaj en absoluta silento. Sed post la sukceso kaj eskapo, Cesar estas tiel malprudenta donaci altvaloran ringon el la rabaĵo al amata kantistino. Pierre, la ĉefo de rivala bando tion rimarkas, divenas la devenon de la juvelo, kaj sub mort-minaco devigas non Cesar diri kiu kaŝas la juvelaron: Mario. Li tiam sendas sian anaron tien por perforte akapari la riĉaĵon. Sed Mario obstine rifuzas malkaŝi la kaŝejon, kio kostas al li la vivon. Pierre tiam prenas la fileton de Jo kiel ostaĝon, por ke tiu-ti transdonu la trezoron. Sed nun Tony ekagas; unue li mortpafas la perfidinton kaj tiam postĉasas la rivalan ĉefon. Okazas interpafado kiu mortigas ambaŭ Jo kaj Pierre. Sed ankaŭ Tony estas grave vundita. Li ankoraŭ sukcesas per lastaj fortoj redoni la infanon al ties patrino, sed tiam li mortas siavice en sia aŭtomobilo.

Fragmento prenita el *Du rififi chez les hommes* (Klabifado ĉe la knabegoj), fare de Auguste Le Breton — Eldono Gallimard, Parizo 1965.



La kartludantoj (Bruegel)

4.17 Pridemandado

Ĉiesulino (Martha) estas arestita, dum sia “komerco” kun konata fripono (Lennie), pro enketo rilate al murdo. Spiteme ŝi rifuzas vesti sin kaj do transportatas en preskaŭ natura stato al la policejo, kune kun sia amoranto.

La patrolistoj de la ter-etaĝo ĉiuj sukcesis, sub tiu aŭ alia preteksto, supreniri al la Pridemandada Ĉambro, por ĵeti rigardon al la grasa ruĝhara **smutulino**, kiu sidis tie respondante demandojn en sia nura kalsoneto. Kaj Parker diris al Miscolo en la Administrada Oficejo: “Se ni farus **krimokan pikĉon** de ŝi en tiu stato, ni povus brokanti la fotaĵojn kvin **Dogojn** popece.”

“Tiu-ĉi policejo akiris logoĉarmon, jen kion,” respondis Miscolo, kaj li reiris al sia tajpolaboro.

Parker kaj Hawes eliris en la urbon por peti traserĉan permesilon. Supre, Meyer kaj Carella kaj Leŭtenanto Byrnes pridemandis la du suspektatojn. Byrnes, ĉar li estis pliaĝa viro kaj do supozeble malpli impresebla de la mambesta ekspono, pridemandis Martha Livingston en la Pridemandada Ĉambro je ekstremaĵo de la koridoro, dum Meyer kaj Carella parolis al Leonard Cronin en angulo de la rotoĉambro, malproksime de ties troeksponita amorantino.

“Nun, kiel statas, Lennie ?” diris Meyer. “Ĉu vere ci havas permesilon por tiu-ĉi **ferujo** aŭ ĉu ci nur **polvumas** nin ? Diru jam, ci povas fidi nin.”

“**Dap**, mi havas permesilon,” diris Cronin. “Ĉu mi **kukumus** vin **ĉelovekojn** ?”

“Mi ne pensas ke ci klopodus **kukumi** nin, Lennie,” rimarkis Meyer afable. “Kaj ankaŭ ni ne klopodos **kukumi** cin. Mi ne povas multon malkaŝi al ci pri tio, sed povus esti tre serioza afero, je mia parolo !”

“Kion vi volas diri per serioza ?”

“Nu, ni diru ke ĝi povus ampleksi multe pli ol nuran perforteton de la leĝo pri malpermesita posedo de pafiloj. Mi priskribu ĝin tiumaniere.”

“Vi celas ke mi estis **rajdante** non Martha kiam vi eniris ? Ĉu estas tio ?”

“Ne, ankaŭ tio ne. Ni diru plivole ke temus tie-ĉi pri ege granda sukplena krimo, eble. Kaj ni diru ke ci povus ek trovi cin klak en ĝia centro. Konsentite ? Do, estu **regula** kun ni ek-de la komenco kaj ĉio povus glatiĝi por ci.”

“Mi ne scias pri kiu granda sukplena krimo vi parolas,” respondis Cronin.

“Nu, iomete pripensu,” aldonis Carella.

“Vi volas diri la **pafeŝo** ? Bone, mi ne havas permesilon. Ĉu jen kion vi deziras ?”

“Male, tio ankoraŭ ne estas sufiĉe grava, Lennie,” refutis Meyer, “Ne, ni ne pensis pri la pistolo.”

“Tiam pri kio ? Ĉu eble tial ĉar la edzo de Martha ne vere estas **repa** ? Ĉu eble tial ĉar vi kaptis nin ĉe adultado ?”

“Ne, eĉ tio ne estas tre grava, Lennie,” rediris Carella. “Pri tio oni povas diskuti.”

“Tiam kio ? Ĉu la **spaĉaĵo** ?”

“Ĉu **spaĉaĵo**, Lennie ?”

“**Dap**, en la ĉambro.”

“Heroino, Lennie ?”

“Ne, ne, ho ne, nenio tiel forta ! Estas **herbetaĵo**. Nur kelke da **cigoj**. Ĝuste por la **merieco**. Tio tamen ne estas seriozega, ĉu jes ?”

“Ne, tio povus esti tre minora, Lennie. Depende de la kvanto da marihuano kiun ci gardis en tiu ĉambro.”

“Ho, nur kelkajn **cigojn**.”

“Bone, tiukaze ci devos cerbumadi sole pri posedo-**fortigo**. Ci tamen ne planis iom vendi el tiu materialo, ĉu Lennie ?”

“Ne, ne, ho ne, estis ĝuste por la **merieco**, ĝuste antaŭ ol mi kaj Martha hopis inter la tukojn.”

“Estas tio ne tre grava, Lennie.”

“Do, kio estus grava ? “

“La knabo,”

“Kiu knabo ?”

“La filo de Martha. Richard. Jen lia nomo, ĉu ne ?”

“Kiel mi sciu ? Mi neniam renkontis lin.”

“Ci neniam renkontis lin ? Kiom longe ci konas non Martha ?”

“Mi renkontis ŝin hieraŭ vespere. En trinkejo. En iu **beberejo** nomata La Kurtmuzelo, se vi konas. Ĝin estras tiuj du viruloj kiuj antaŭe estadis en la Ĉin-Birman-Hinduĵo...”

“Ci do ekvidis ŝin nur hieraŭ vespere ?”

“Certe.”

“Ŝi diris ke ci estas la homo kiun ŝi amas ?” sugestis Carella.

“**Dap**, estis amo je l’unua ekvido.”

“Kaj ci neniam renkontis ŝian filon ?”

“Neniam.”

“Ĉu ci jam flugis, Lennie ?”

“Ĉu flugis ? Kion signifas ‘flugi’ ? Ĉu vi ree aludas la mariĥuanon?”

“Ne: flugi. En flugmaŝino.”

“Neniam; mi plivole mortus ol eniri tiaĵon !”

“Kiom longe ci jam preferas nigron, Lennie ?”

“Nigron ? Kion vi aludas nun ?”

“Ciajn vestaĵojn. Cian pantalonon, cian kravaton, cian pluvmantelon, cian pluvombrelon. Nigraj.”

“Mi aĉetis ilin por enteriga cermonio,” respondis Cronin.

“Kies enterigo ?”

“De iu mia **bubulo**. Ni kutimis kune ekspluati **jeboludon**.”

“Ci do ankaŭ organizis **jeboludon**, Lennie ? Ci estas multokupa vireto, ĉu ne vere ?”

“Ho, estis neniel kontraŭleĝe ! Ni neniam ludis por mono.”

“Kaj cia amiko mortis antaŭ nelonge, se mi aŭdis ĝuste ?”

“**Dap**, antaŭ kelkaj tagoj. Do, mi aĉetis la nigrajn vestaĵojn. Pro respekto. Vi povas kontroli. Mi povas diri al vi la butikon, kie mi aĉetis ilin.”

“Ni aprezus tion, Lennie. Sed ci ankoraŭ ne posedis tiun-ĉi kostumon je Merkredo, ĉu ?”

“Ĉu Merkredo ? Nu, mi pripensu iomete. Kiun tagon ni havas nun?”

“Hodiaŭ estas Sabato.”

“**Dap**, ĝuste, Sabato. Ne, mi aĉetis la kostumon je Vendredo. Vi povas kontroli. Oni probable ankoraŭ havas la registron.”

“Kaj kiel statas pri ci, Lennie ?”

“Kiel pri mi ? Kion vi volas diri ?”

“Ĉu ci havas krimulan registron ?”

“Nu jes, malgrandan.”

“Kiom malgrandan ?”

“Mi trasis **tikedon** iam. Pro **levigo**. Nenio grava.”

“Ci povus trasi iom pli,” konkludis Carella, “sed nenion gravan.”

Interrogation

The patrolmen downstairs all managed to drop up to the Interrogation Room on one pretence or another, to take a look at the fat red-headed *slob* who sat answering questions in her slip. And Parker said to Miscolo in the Clerical Office: “We take a *mug shot* of her like that, and we’ll be able to peddle the photos for five *bucks* apiece.

“This precinct got glamour, that’s what it got,” Miscolo answered and he went back to his typing.

Parker and Hawes went downstairs for the search warrant. Upstairs, Meyer and Carella and Lieutenant Byrnes interrogated the two suspects. Byrnes, because he was an older man and presumably less susceptible to the mammalian display, interrogated Martha Livingston in the Interrogation Room off the corridor. Meyer and Carella talked to Leonard Cronin in a corner of the squadroom, far from Lennie’s overexposed paramour.

“Now, about it, Lennie ?” Meyer said. “You really got a permit for this *rod*, or are you just *snowing* us ? Come on, you can talk to us.”

“Yeah, I got a permit,” Cronin said. “Would I kid you *guys* ?”

"I don't think you'd try to kid us, Lennie," Meyer said gently, "and we won't try to kid you, either. I can't tell you very much about this, but it can be very serious, take my word for it!"

"How do you mean, serious?"

"Well, let's say there could be a lot more involved here than just a Sullivan Act violation. Let's put it that way."

"You mean, because I was *banging* Martha when you come in? Is that what you mean?"

"No, not that either. Let's say there is a very big juicy crime involved here, maybe. And let's say you could find yourself right in the middle of it. Okay? So level with us from the start, and things may go easier for you."

"I don't know what big juicy crime you're talking about," Cronin said.

"Well, you think about it a little," Carella said.

"You mean the *gat*? Okay, I ain't got a permit. Is that what you mean?"

"Well, that's not too serious, Lennie," Meyer said. "No, we're not thinking about the pistol."

"Then what? You mean like because Martha's husband ain't really *croaked*? You mean like because you got us on adultery?"

"Well, even that isn't too serious, Lennie," Carella said. "That, we can talk about."

"Then what? The *junk*?"

"The *junk*, Lennie?"

"Yeah, in the room."

"Heroin, Lennie?"

"No, no, hey no, nothing big like that! The *mootah*, just a few *sticks*, though. Just for *kicks*. That ain't too serious, now is it?"

"No, that could be very minor, Lennie. Depending on how much marijuana you had there in the room."

"Oh, just a few *sticks*."

"Well, then, you've got only a possession *rap* to worry about. You weren't planning on selling any of that stuff, were you, Lennie?"

"No, no, hey no, it was just for *kicks*, just for me and Martha, like you know, for *kicks*. We lit a few *sticks* before we hopped between the sheets."

"Then, that's not too serious, Lennie."

"So, what's so serious?"

"The boy."

"What boy?"

"Martha's son. Richard, that's his name, isn't it?"

"How do I know? I never met the kid."

"You never met him? How long have you known Martha?"

"I met her last night. In a bar. A *joint*, The Short-snorter, you know it? It's run by these two guys, they used to be in the China-Burma-India ..."

"You only met her last night?"

"Sure."

"She said you were the man she loved," Carella suggested.

"Yeah, it was love at first sight."

"And you never met her son?"

"Never."

"You ever fly, Lennie?"

"Fly? How do you mean, fly? You talking about the marijuana again?"

"No, fly. In an airplane."

"Never! Just catch me dead in one of them things!"

"How long have you gone for black, Lennie?"

"Black? How do you mean, black?"

"Your clothes. Your pants, your tie, your raincoat, your umbrella. Black."

"I bought them for a funeral," Cronin said.

"Whose funeral?"

"A *buddy* of mine. We used to run a *crap game* together."

"You ran a *crap game*, too, Lennie ? You've been a busy little man, haven't you?"

"Oh, this wasn't nothing illegal. We never played for money."

"And you friend died recently, is that right ?"

"Yeah, the other day. So, I bought the black clothes. Out of respect. You can check. I can tell you the place where I bought them."

"We'd appreciate that, Lennie. But you didn't own these clothes on Wednesday, did you ?"

"Wednesday. Now, let me think a minute. What's today ?"

"Today is Saturday."

"Yeah, that's right, Saturday. No. I bought the clothes Thursday. You can check it. They probably got a record."

"How about you, Lennie ?"

"How about me ? How do you mean about me ?"

"Have you got a record ?"

"Well, a little one."

"How little ?"

"I done a little time once. A *stickup*. Nothing serious."

"You may do a little more," Carella said. "But nothing serious."

Prenita el <i>Give the Boys a Great Big Hand</i> (Donu grandan manon al la knabegoj) fare de Ed McBain — Penguin Books C 2310, Britio 1960.

Ed McBain, ĉefa kaŝnomo de la novjorka multverkisto Salvatore Lombino (1926-2005), furoras precipe pro siaj krimromanoj ĉirkaŭ fikcia 87-a Policejo en usona grandurbo, en kiu ĉefrolas Detektivo Carella. Liaj vervaj dialogoj kaj kvazaŭ dokumenta raportado pri la funkciado de tia policejo jam baldaŭ destinis liajn historiojn al filmado en formo de felietono. La aŭtoro eble plej bonkonatas pro lia verko kaj poste filmo *Blackboard Jungle* (Nigratabula Ĝangalo) el 1955. Apenaŭ sciate estas ke li liveris ankaŭ la skripton por la hororfilmulo *The Birds* (La Birdoj) de Alfred Hitchcock.

4.18 Ruzo de Policestro

François-Eugène Vidocq (Francujo 1775-1857) estis alterne krimulo kaj policano en sia vivo. Kiel junulo li forlasis la hejmon kun granda monsumo ŝtelita de sia patro, bakisto. Post elspezado li ekervis en la franca armeo, dezertis, kaj denove aniĝis. Post vundiĝo li edziĝis sed por ne longe. Denove en la armeo li akiris fifamon kiel ruzega kaj lerta trompisto, ŝtelisto, kaj falsigisto, kiuj krimoj kondamnis lin al punlaborado en fortikaĵo. El tie li tamen eskapis, estis rekaptita, kaj eskapis denove. Finfine, en 1809, laca pro la ĉiama persekutado, li ekhavis la brilan ideon oferti siajn spertojn pri la krimomedio al la ministro pri justico, kiu tiutempe ne sukcesis bridi la ondon de krimfaroj en Francujo. Oni efektive akceptis lin kiel konsiliston kaj informiston kio tiel bone fruktis, ke la registaro poste ebligis al li fondi iom sekretan polic-brigadon — la *Sûreté* — konsistantan el liberigitaj punlaboristoj, spertaj pri tiu aŭ alia “metio”, kun Vidocq mem kiel ĉefo. Lia “oficiala bando” reale bonsukcesis dum multaj jaroj, ne lastinstance pro la organiza talento de Vidocq, kiu inaŭguris metodojn (ekzemple registrado sur slipoj) ankoraŭ hodiaŭ aplikataj de policistoj. Fine la posteno tamen iĝis al li tro peza kaj li ekŝiĝis. Per la gajnita kapitalo li starigis paperfabrikejon, kiu bedaŭrinde ne prosperis. Li bankrotis kaj estis devigita en 1832 repreni sian rolon kiel brigadestron. Sed lia monavido iĝis lin entrepreni kun siaj kompanoj grandegan prirabon, kies farintojn li poste pretendis serĉadi. Oni tamen malkovris la veron kaj, pro la skandalo, nur forigis lin el la ŝtatservo. Ekzilita al Bruselo, li ŝajnas esti mem verkinta faman memuaron pri sia aventurema vivo. Estas ne mirige ke la Francoj en postaj jaroj realigis plurajn romanojn kaj filmojn pri tiu legenda kombinaĵo el krimulo kaj heroo. Li certe inspiris al postaj verkistoj krei similajn ruzajn detektivojn: Raffles, The Saint, Arsène Lupin, Sherlock Holmes kotopo.

En la ĉi-posta fragmento Vidocq elserĉas bandon, kiu rompoŝtelis en Parizo amason da valora plumbo. Li jam eksciis ke Hotot, konata fripono, partoprenis en ĝi, sed li ne konas la kaŝejon de la krimuloj. Hazarde Hotot ofertas siajn servojn al la polico, kiel perfidanto. Laŭ unu el siaj kutimoj Vidocq enpenetras koncernan medion, alivestinte sin tiamaniere, ke neniu plu rekonu la timatan policoficiron kaj nomante sin Jules.

Pripensinte la konduton de Hotot kontraŭ liaj kamaradoj, mi konkludis ke ĝi estas tia de ĝisosta krimulo. Eklumis al mi ke tiu-ĉi fiulo deziris iĝi sin mem interesa ĉe la komisaro, denunciante siajn komplicojn kaj akirante, per tiu rimedo, nepuneblecon por siaj krimaj agoj. Juĝante laŭ tio, kion mi memoris rilate al li, en

diversaj cirkonstancoj, mi pensis ke Hotot estas pli kulpa ol tiuj kiujn li havis la intencon denunci, kaj ke li mem eble estas la instiginto de la ĵusa rompoŝtelo.

Firmiginte en tiu-ĉi opinio, sekve de informoj kiujn mi akiris, mi decidis purigi la socion de tiaspeca monstro. Mi igis lin kaŝ-observi fare de kelkaj el miaj policanoj. Kaj sciante ke li havas kiel konkubinojn Emilie Simonet kaj Félicité Renaud, mi pensis bezone eksciti la ĵaluzon de unu el tiuj virinoj, profite al la justico.

Fininte ĉiujn preparojn, mi vizitas lin en la <Elizeaj Kampoj>, kie li min atendas. Mi konvinkas lin ke li lasu sin aresti kaj konduki al la provizora malliberejo, por tie konfesiĝi iun rabiston kiu alvenus baldaŭ poste. Hotot konsentas kaj petas nur la permeson interparoli kelkajn momentojn kun Félicité, kiu lin amas pasie.

“Iru,” mi diras, “sed ne restu tro longe apud ŝi. Poste ci iru, sen perdi eĉ unu minuton, al la malgranda tabakfumejo en la Bulvardo Montmartre, kontraŭ la Teatro de Varieteoj. Ci petos botelon da biero kaj lokigos cin en la fundo de la butikoj. Tuj kiam ci vidos eniri du inspektistojn kaj unu pacoficiron, ci indikos cin mem per la fingro, kvazaŭ por diri al ili ke ci estas tiu kiun ili serĉas. Tiam ili arestos cin, kaj tuje kondukos al la Policoficejo de la Liceo. Oni ricevis tie la ordonon gardi cin dum du aŭ tri horoj, por ke la **ladrono**, al kiu ci devas **eltiri karoton**, jam vidu cin tie ĉe alkonduko; tio malhelpos ke li ekhavu suspekton kontraŭ ci kiam ci pridemandos lin en la arestejo.”

“Estas bone,” respondis Hotot, “estu trankvila: mi ludos mian rolon por trompi eĉ la plej ruzan ... Vi estos kontenta pri mi. Jes, je la honoro de **ladrono**, vi povas fidi je mi !”

Post tiuj paroloj, ni disiras. Kaj dum Hotot adiaŭdiras al Félicité Renaud, mi kuras al la prefektejo por igi la inspektistojn, kiel mi al li anoncis, aresti lin en la tabakfumejo.

Volante certigi ĉu ĉio funkcias laŭ miaj planoj, mi postsekvas ilin. Kaj baldaŭ mi ĝuas la plezuron vidi la viron streĉligita kaj paŝanta, kun speco de triumfo, inter miaj viroj.

Ni lasu Hotot en la **fortepiano** luladi sin komence per espero kiu ne realiĝos, kaj poste ekkoleri kontraŭ la kaporalon, la serĝenton, kontraŭ la deĵoroficiron, kiuj obstine malpermesas al li eliri por manĝi peceton, kvankam li protestas troviĝi tie nur “por la **kazaco**”.

Fidele al la plano, kiun mi estis skizinta, mi iras al la Placo de la Kasteleto, kie loĝas Emilie. Mi renkontas ŝin ĉe Panjo Buntulino, kiu estas unu el tiuj mizeraj domaĉoj kie, sub preteksto trinki glaseton, akumuliĝas rubaĵoj de la prostituo.

Ĉar mi nun estis konata ĉe ili en mia travestio kiel vivĝojulo, Emilie akceptis sen formalajoj duonlitron da vino, kiu baldaŭ renoviĝis. Kiam mi vidis ke la vino komencas nebuligi ŝian cerbon, mi ekparolas pri Hotot kaj montras lin malinda je la korinklino kiun ŝi havas por li. Emilie volas scii, kial mi faras tian rakonton. Mi ŝajnigas diskretemon. Estas nur maniero por inciti ŝian scivolon ankoraŭ pli. Ŝi do insistas kaj iĝas tiel trudema, ke necesas kontentigi ŝin. Tiam mi diras al ŝi ke, revenante de <Elizeaj Kampoj>, mi renkontis Hotot kun Félicité Renaud kaj ke, post iom da kverelado pro ĵaluza motivo, ili finis per repaciĝo kaj ien iris dormi kune.

Jen, diris Emilie, kaj mi, kiu stulte kredis ke ili jam ne vidadas sin ! – Jes, ci estis ege **dumba** ... Laŭ iliaj diraĵoj, mi vetus ke ili **slipis** apud la Reĝa Palaco, en la pasinta nokto. – Ho, tamen ne, Jules, ĉar li pasigis ĝin kun iuj amikoj. – Ha, estas vere, mi forĝesis: kun Linois, Bicêtre, kaj Caffin. – Kiu diris tion al ci ? – Tondre, nu Hotot ! – Ĉu li ? – Sendube. – Jen kia li estas ! Al mi li tamen nepre malpermesis paroli pri tio al iu ajn ...! Sed diru mia kara Jules, ĉu ci scias kien li iris kun Félicité ? – Jes, ĉe Bicêtre, sed mi ne povas diri kie tiu loĝas, ĉar mi ja forĝesis demandi lian adreson. – Ho, sed mi scias: Bona-Putostrato, kvara etaĝo, ĉe Lahire. Venu kun mi kaj ci vidos kiel mi traktos ilin ! – Ne estas bona maniero: ni devas zorgi ne fari senbezonan **nojson**. Ci ja fidas min, ĉu ne ? ... Mi iros supren. Ci atendas min. Se mi restos, tio pruvos ke mi trovis la birdojn. Tiam ci povos ciavice supreniri. – Ci pravas, estas tiel: oni devas esti certa antaŭ ol **zagaki**.

Mi prenas Emilie ĉe la brako, kaj ni direktas nin al la Bona-Putostrato. Mi eniras kaj, post certiĝo ke Bicêtre estas hejme, mi returnen iras al Emilie: Ni havas misŝancon, diras mi proksimiĝante: Lahire, Bicêtre, kaj ties virino eliris por vespermanĝi ĉe Linois ... Ĉu ci scias kie li loĝas, tiu Linois ? – Jes, ĉe sia patrino, Joquelet-strato, sesa etaĝo. Venu ! – Mondon, ne, mi estas tro laca ! Ni reludu tion iom poste. – Ho, mia katocjo, ne rifuzu al mi tiun-ĉi servon, diras Emilie per peteganta voĉo. Kaj por decidigi min akompani ŝin, ŝi **faras al mi museton**. Mi ŝajnigas cedemon pro pura afablo.

Alveninte en la Joquelet-strato, mi supreniras al Linois, kiu konis min nur laŭnome. Li estis ĵus enlitiginta. Mi demandas ĉu li ne vidis Hotot kaj, je lia nea respondo, mi reiras suben, dezirante al li bonan nokton. “Estas kvazaŭ fatalo, mi diras al Emilie, ili iris for antaŭ preskaŭ kvaronhoro por kunpreni Caffin, kiu pagu por la vino.”

Emilie diras al mi ke ŝi ne scias la adreson de Caffin, sed ne malesperas akiri ĝin de la inoj sur la Bovidoplaco. Ŝi do petas min pluiri ĝis tie. Mi protestas. Emilie insistas. Kaj ĉar ege gravas malkovri non Caffin, ni direktas nin al la Bovidoplaco.

Dumvoje mi kompletigas la ebriigon de mia kunulino, kiu iĝas tiel komunikema ke ŝi havigas ĉiujn informojn kiujn mi deziras ekscii pri Hotot. Ŝi konfidas eĉ ke estis li, kiu instigis siajn kamaradojn al la rompoŝtelo, okazinta en la antaŭa nokto.

Iu ĉiesulino, Louison la Blagantino, kiun ni renkontas sur nia vojo kaj al kiu Emilie demandas novaĵojn pri Caffin, sciigas al ni ke li kredeble kuŝas kun Emilie **Hirjugeto**, ĉe la Buntulino aŭ ĉe la Blondulino. Iom plue, alia samfakulino, al kiu ni starigas la saman demandon, respondas ke ili troviĝas ĉe la Buntulino. Ni iras tien.

Emilie, nun krevante el sia haŭto pro dekduo da **kapromamoj**, malplenigitaj dum nia nokta ekskurso, postulas de la matrono ke ŝi redonu ŝian viron kaj minacas ĉion dispecigi se li ne aperos. La Buntulino protestas, tute prave, ke li ne estas ĉe ŝi kaj proponas al ŝi fari mem la kontrolon. Emilie iras supren kaj revenas, malmultan tempon poste, dirante ke ŝi vidis sole nur Caffin.

Havante nun plu neniun bezonon je ŝi, por malkovri la lokojn de la bandanoj, kaj dezirante malebligi al ŝi kontraŭi mian planon per tiu aŭ alia klaĉo, mi konvinkas ŝin iri al la Hotelo de Anglujo kie, diras mi, Hotot certe devas troviĝi. Emilie estus irinta ĝia la ekstremaĵoj de Tero, por elŝiri la okulojn al sia malfidelulo.

Ni foriras. Sed kompreneble ne pli da Hotot en tiu-ĉe rabistejo ol ĉe la Buntulino. Necesas fini la aferon. Mi pretendas ke mi volas informiĝi ĉu Félicité jam revenis hejmen. Sed anstataŭ plenumi tiun komision, kiu devus sigeli mian komplezemon, mi kuras al la policejo de la Akvokastelo. Mi malkaŝas mian identecon kaj donas la ordonon aresti Emilie kaj teni ŝin malantaŭ seruroj ĝis la sekvonta mateno.

De tie mi reiras al la Buntulino, akompanate de du policanoj en uniformo; mi grimpas al la ĉambro kie kuŝas Caffin kaj deklaras al li ke li estas mia arestito.

“Kio !?, elkrias tiu duondorme, ĉu min **enpakas** ci ?! Nunu, jen stranga **koloriĝo** ! – Ne estas mia kulpo ke oni **konfipis** cin. – Tamen, Jules, tio ne havigos bonŝancon al ci ! – Ĉu li estas **regula**, li ? – Kaj ĉu ne necesas ke mi faru mian devon ? – Estas ĝuste, sed amikoj estas amikoj. – Sed mi ja diris ke oni **servumis** cin; ĉu mi devas puŝi cian nazon sur la situacion, por ke ci komprenu ? Ĉu ci do ne **pinĉis sfinjecon** en la pasinta **lajlo** ? – Bone, mi vidas ke iu **maĉumis**. Nu, tiam ankaŭ mi **maĉumos** ! Venigu la **grandan polanon**, por ke mi enigu tiun friponan Hotot. Ĉar estas neniu krom li, kiu povis **tordiĝi** !”

* * * * *

La komisaro venas kaj ricevas la konfesojn de Caffin. Oni facile imagas al si ke Hotot ne ŝparatis. Linois kaj Bicêtre estis arestitaj en la sama nokto.

Ruse d'un chef de police

Ayant réfléchi sur la conduite de Hotot envers ses camarades, je trouvai qu'elle était celle d'un profond scélérat. Il me parut que ce misérable voulait se rendre intéressant auprès de Henry en dénonçant ses complices, et obtenir par ce moyen l'impunité de son crime. D'après ce qui m'était revenu sur son compte, dans diverses circonstances, je pensai que Hotot était plus coupable que ceux qu'il se proposait de dénoncer, et qu'il pouvait même avoir été l'instigateur du vol dont il s'agissait.

Rafferme dans cette opinion par suite des informations que je pris, je me résolus à purger la société d'un tel monstre. Je le fis garder à vue par quelques-uns de mes agents. Et sachant qu'il avait pour maîtresses Emilie Simonet et Félicité Renaud, je crus devoir exciter la jalousie de ces deux femmes, dans l'intérêt de la justice.

Toutes mes dispositions étant arrêtées, je vais rejoindre Hotot aux Champs-Elysées où il m'attend. Je l'engage à se faire arrêter et à se laisser conduire au dépôt, afin de confesser un voleur qui y arrivera peu d'instant après.

Hotot y consent et demande seulement la permission de s'entretenir un instant avec Félicité, qui l'aime passionnément.

"Va, lui dis-je, mais ne demeure pas longtemps avec elle. Tu te rendras ensuite, sans perdre une minute, dans la petite tabagie, boulevard Montmartre, en face le Théâtre des Variétés. Tu demanderas une bouteille de bière et te placeras dans le fond de la boutique. Dès que tu verras entrer deux inspecteurs et un officier de paix, tu t'indiqueras du doigt comme pour leur dire que c'est toi qu'ils cherchent. Alors ils t'arrêteront et te conduiront au poste du Lycée. Ils ont l'ordre de t'y laisser pendant deux ou trois heures, afin que le *grinche*, à qui tu dois *tirer une carotte*, t'y trouve lorsqu'on l'y mènera, ce qui l'empêchera de concevoir les moindres soupçons contre toi, quand tu le questionneras, au dépôt. - C'est bon, répondit Hotot, soyez tranquille: je jouerai mon rôle à tromper le plus fin ... Vous serez content de moi. Foi de *grinche*, je t'en réponds."

A ces mots, nous nous quittons. Et tandis que Hotot va faire ses adieux à Félicité Renaud, je cours à la préfecture et charge les inspecteurs que je lui ai désignés, d'aller l'arrêter dans la tabagie.

Voulant m'assurer si tout se passe au gré de mes désirs, je les suis. Et bientôt, j'ai la satisfaction de voir mon homme garrotté, et marchant avec une sorte de triomphe au milieu de ces messieurs.

* * * * *

Laissons Hotot, au *violon*, se bercer d'abord d'un espoir qui ne doit point se réaliser, et ensuite s'emporter contre le caporal, contre le sergent, contre l'officier du poste, qui s'obstinent à ne pas le laisser sortir pour aller manger un morceau, bien qu'il proteste n'être là que pour la frime.

